

# **La Patrino**

**Dramo en kvar aktoj  
de Santiago Rusiñol**

**Unuafoje prezentita en Barcelono  
en la Katalana Teatro (Romea) la 20<sup>an</sup> Februaro 1907<sup>a</sup>**

---

TRADUKITA DE

**Alfonso Sabadell**

**Prezidanto de la Grupo Esperantista Barcelona**



**1908.<sup>a</sup>**

**Presejo: FELIU & SUSANNA**

**Oficejo: Ronda San Pedro, n.º 36.—BARCELONA**

5007900102x91

*Severiano Amáis*

Kolekto ORBI...!

# **La Patrino**

**Dramo en kvar aktoj**

**de Santiago Rusiñol**

**Unuafoje prezentita en Barcelono**

**en la Katalana Teatro (Romea) la 20<sup>an</sup> Februaro 1907<sup>a</sup>**

---

**TRADUKITA DE**

**Alfonso Sabadell**

**Prezidanto de la Grupo Esperantista Barcelona**



**1908.<sup>a</sup>**

**Presejo: FELIU & SUSANNA**

**Oficejo: Ronda San Pedro, n.º 36.—BARCELONA**



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

*Al mia tre kara amiko*

*Licente Inglada. Ors*

*More dediças tiun ĉi tradukon.*

*La Tradukinto.*

## PERSONOJ

---

ROZO ( <i>La Patrino</i> ) . . . . .	60 jara.
MANUELO ( <i>filo de Rozo</i> ) . . . . .	23 »
IZIDRO ( <i>bakisto</i> ) . . . . .	70 »
BAJLET ( <i>baklernanto</i> ) . . . . .	14 »
SINJORO JOHANO . . . . .	60 »
SINJORO INSTRUISTO . . . . .	50 »
SINJORO KARMONA . . . . .	45 »
ALBERTO ( <i>pentristo</i> ). . . . .	28 »
SINJORO TRILLES (1) ( <i>kritikisto</i> ) . . . . .	40 »
ISABELO ( <i>modelulino por pentristoj</i> ) . . . . .	22 »
SINJORINO AMPARO ( <i>patrino de Isabelo</i> ) . . . . .	50 »
JOHANO ROMEU (2) ( <i>kritikisto</i> ) . . . . .	30 »
ALMOZULO.	

*Viroj, virinoj, knaboj kaj muzikistoj.*

---

(1) Elparolu Triljes.

(2) Elparolu Roméu.



## AKTO UNUA

---

*(La agado havas lokon en vilaĝa postpanfarejo. Tra granda arko, kiu staras en la fundo oni vidas la panvendejon, la bretojn, kaj la montratablon plenajn je panoj, kaj vitraĵon turnita al la strato. En la postpanvendejo oni vidas dekstre la bakejan faŭkon, kaj maldekstre la pordon al la ĉambraro. En la anguloj, estas farunsakoj, branĉfasoj, ĵus elbakitaj panoj, kaj trogo. Proksime de la rigardantoj alia trogo. Estas dum somero, kaj la vendejporo estas malfermita.)*

---

## SCENO UNUA

---

IZIDRO, MANUELO KAJ BAJLET

*(Izidro apud la forno transdonas panojn al Bajlet. Manuelo plej proksime de la rigardantoj desegnas sur paperujo apogita sur la malgranda trogo.)*

IZIDRO (*donante panojn al Bajlet*).

Prenu. Tiujn ĉi sesfuntajn panojn al la vendejo. Tiun ĉi dekdufuntan ĉi alportos al Paŭlino, kiu havas dekdu geinfanojn.

BAJLET

Ĉiu infano po unu funto, ĉu ne vere?

IZIDRO

Vere! Mi jam vidas ke ci scias kalkuli. Ĉiu infano po unu funto, kaj por la gepatroj la kruston!

BAJLET

Kaj la tortojn? Ĉu vi ankoraŭ ne elfornigas la tortojn?

IZIDRO

Ni nun elprenos (*Eltirante ĝin*) unu el la forno. Ne rapidu ĉar ci ja ne devas el ĝi manĝi. Rigardu ĝin! Jen ĝi estas.

BAJLET

Ha! Kiom da sukero surkuŝas!

MANUELO

Ĝi ja estas bela!

IZIDRO

Kion signifas bela! Bon! Tio ĉi ne estas torto! Ĝi estas konfitplataĵo!

BAJLET

Sciu, avo, ke mi dezirus fali en ĝin!

IZIDRO

Jes, sed kun frapo sur la kolon!

BAJLET

Aj, aj, la muŝoj ja falas sur la tortojn!

IZIDRO

La muŝoj ne estas baklernantoj, kiel ci, kaj ne havas mastron. Prenu, alportu ĝin al la paroĥestro, kaj zorgu pri ciaj fingroj, ĉu ci komprenas? Se mi trovas al vi ilin ŝmiritaj per sukero, mi ŝmiros cian vizaĝon per manfrapoj.



BAJLET

Ĉu ne restas aliaj en la forno?

IZIDRO

Ne atentu tion; nur ne okazu kiel antaŭ kelkaj tagoj, kiam ci forperdis pecon el ĝi sur la vojo.

BAJLET

Ĝi defalis.

IZIDRO

Ĝi defalis... Ĝi defalis en cian ventron (*Bajlet foriras kun la torto*) kaj ci, Manuelo, ankoraŭ ne venas min helpi?

MANUELO

Izidro, atendu, ĉar mi tuj finos.

IZIDRO

Se la leporoj tiel atendus! Ci jam scias, ke la forno ne povas atendi.

MANUELO

Nek ankaŭ la forno de la desegnarito!

IZIDRO

Silentu naivulo! Ĉu la pano ne estas antaŭ la fuŝdesegnaĵoj?

MANUELO

Por kelkaj, jes, sed por mi ne.

IZIDRO

Nu, senigu vin je nutraĵo, se vi kredas, por daŭrigi cian manion.

MANUELO

Estus grava afero! Vi jam scias, ke multfoje mi faris tion: kiam venas al mi tio, kion vi nomas manioj, estas por

mi nek pano, nek turto! Mi pli rapidas eltiri la desegnaĵon el mia penso, ol enmeti nutraĵon en mian buŝon!

IZIDRO

Sed ci estas feliĉegulo! Ci ne pripensas junulo!

MANUELO

Ĉu mi ne pripensas? Se mi ne pripensus, kiel vi diras, mi estus pli dika, ol mi estas!

IZIDRO

Mi intencas diri, ke ci ne pripensas, kiel pensas la saĝuloj, kiuj posedas sian tutan konscion. Nu, respondu tiun ĉi demandon: kion ci farus per cia tuta sciado, se ne helpus mi kaj cia kompatinda patrino de kiam, cia patro estas... li estu en gloro!

MANUELO

Nu, Izidro ne grumblu pli, ĉar grumbli maljunigas!

IZIDRO

Ĉu mi ne havas la rajton admoni al ci, post tiom da jaroj, kiam mi bakadas ĉi tie?

MANUELO

Jes, vi estas rajta, sed lasu min! Ĉu mi ne knedas dum la noktoj? Lasu, do, min labori dum la tagoj!

IZIDRO

Ĉu ci nomas labori tion, kion ci faras?

MANUELO

Jes, amiko, jes, pli ol la ceteron. Knedante, laboras la korpo, kaj pripensante, la intelekto.

IZIDRO

La apostolo numero unua min kompatu! Kiu ja parolas pri intelekto.

MANUELO

Vi estas maljuna, Izidro!

IZIDRO

Ĉu mi maljuna?

MANUELO

Ni vidu: kiomaĝa vi estas? Diru la veron.

IZIDRO

Mi ne volas ĝin diri! Dum la homo estas forta por la laborado, li ne estas maljuna. Ĉu mi estas prava aŭ ne?

MANUELO

Jes, vi estas prava, sed lasu min.

IZIDRO

Sed ĉi ne rememoras, kie ĉi loĝas, ke nun estas la vilaĝa ĉefesto, ke ni devas liveri la turtojn, nek pri la meso, nek pri io ajn, pro la manio pri *landkartoj!*

MANUELO

Ĉu vi neniam havis deziregojn?

IZIDRO

Neniam.

MANUELO

Nu, Izidro, ne diru tion, ĉar kiam vi eltiras la panon tre blonda, bone knedita, kaj bone kuirita, via salivo pro kontento, deglitas el vi en la fornon!

IZIDRO

Tio ĉi estas metiaj aferoj. Kaj por la metio, jes, por la metio mi oferas mian volon. Mi pli ŝatas vidante bakafon, el tiuj, kiujn ni inde nomas bakafon, ol ĉiujn bildonjn de la mondo. Kaj, ĉu ĉi komprenas, tio estas ĉar ĉiu pano enhavas multe da ŝvitoj: ŝvito pro la semado de la greno, ŝvito por ĝin vidi kreskantan, ŝvito por timo ke la hejlado

ĝin detruu, draŝa ŝvito, ŝvito por ĝin gardi, knedi, kuiri, kaj ŝvito, kiu estas pli forta ŝvito: ŝvito pro timo ne povi ĝin manĝi. Kiam la greno alvenas al la buŝo, ĝi enhavas pli da ŝvito, ol da faruno.

MANUELO

Tre bone, Izidro; sed tio, kion mi faras, kaj oni nomas laŭdkartoj, ĉu vi kredas, ke ĝi ne korpremas? Korpremo por la semado de la ideo. ĴKorpremo pro la semo, kiun ni sentas svarmantan interne de la kapo; pro la naskiĝa febro; por ĝin vidi sur la blanka papero; por ke ĝi fariĝu kolora; ĝin amigi al tiuj, kiuj ne vidas; kaj korpremo por ricevi ĝin bela, same kiel songante oni ĝin vidis. Kiam la semo alvenas al la aliaj, ĝi ne estas sole aĉetita per ŝvitoj: ĝi entenas gutajn sangojn de la vivo!

IZIDRO

Bone, nun mi ne komprenas vin.

MANUELO

Prenu! Rigardu tiun ĉi desegnaĵon!

IZIDRO

Mi vidu.

MANUELO

Kion vi vidas en ĝi?

IZIDRO

Nenion. Makulaĵojn.

MANUELO

Nu, tre bone parolita, ĉar nenion pli oni vidas. Sed se anstataŭ rigardi la paperon, estus eble al vi tien ĉi rigardi, (*en la kapon*) vi tiam vidus tutajn panojn, figurojn, okulojn, kaj animojn, kiuj tuj kiam ili eliras el la kraĵono, fariĝas tio, kion vi nomas makulaĵoj.

IZIDRO

Mi jam scias, kion ci intencas diri: trobrulitaj panoj.

MANUELO

Pli ol trobrulitaj! Ili cindriĝas!

IZIDRO

Nu, mi rediras al ci, ke mi nenion komprenas.

MANUELO

Ĉar ankoraŭ mi ne scias min komprenigi. Ĉu vi scias, kio estas semita en kampo, antaŭ ol vidi ĝin jam naskiĝintan?

IZIDRO

Certe ne!

MANUELO

Nu, vi ankaŭ ne povas scii, kion mi povas fari ĉar mi ankoraŭ ne elburĝonis.

IZIDRO

Kion ci devas burĝonigi, simplanimulo!

MANUELO

Mi ne scias, kion mi devas burĝonigi! Herbon au flo-rojn. Tio ĉi dependas de la semado!

---

## SCENO II.<sup>a</sup>

---

*(La samaj, BAJLET kaj baldaŭ ALMOZULO)*

BAJLET

La paroĥestro, havas jam la turton.

IZIDRO

Montru al mi la fingrojn.

BAJLET

Mi tute ne ĝin tuŝis.

IZIDRO

Eĉ per la nazo?

BAJLET

Des-malpli, ĉar ĝi estas tro proksime de la buŝo, kaj vi komprenas...?

IZIDRO

Vi kredeble perdus el ĝi peceton.

BAJLET

Peceton tiel longan kiel de tie ĉi ĝis la paroĥestrejo.

IZIDRO

Bone: Zorgu pri la vendejo, ĝis kiam la mastrino venos, ĉar Manuelo, havas alion por fari.

BAJLET

Lasu min vidi la bildon, kiun li faris!

IZIDRO

Tuj al la vendejo! Baldaŭ tie ĉi ne estos bakejo: estos tinkturejo. (*Bajlet aliras la vendejon*).

LA ALMOZULO (*enirante en la vendejon*)

Virgulino Mario estu laudata! Ĉu vi povus doni al mi peceton da pano?

BAJLET (*el la vendejo*)

Dio vin kompatu!

LA ALMOZULO (*enirante en la postvendejon*)

Ĉu vi povus doni peceton da pano al mi ĉar, hodiaŭ estas la ĉeffesto? Peceton por min nutri dum tiu ĉi tago?

IZIDRO

Dio vin kompatul

LA ALMOZULO (*al Manuelo*)

Kaj vi, junulo?

MANUELO

Ne, ĝin doni al vi, sed atendu unu momenton.

LA ALMOZULO

Nur peceton!

MANUELO

Atendu, ĉar mi povas fari, ke vi gajnu ĝin.

LA ALMOZULO

Se vi devigas min labori, tio ĉi ne estos ebla. Mi estas invalida, kaj tio ne taŭgas por mi.

MANUELO

Vi nur devos fari tion, kion mi diros al vi.

LA ALMOZULO

Kaj, kion mi devas fari?

MANUELO

Sidi.

LA ALMOZULO

Tio ĉi, certe taŭgas por mi.

MANUELO

Sidiĝu, kaj mi faros vian portreton. Nur momenton por desegni vian kapon!

LA ALMOZULO

Mi jam scias pri kio ci rilatas. La landkartistoj el alia vilaĝo jam kopiis min. Ili diris, ke mi multe plaĉis al ili pro mia mizera mieno.

MANUELO

Via mieno ne esprimas mizeron, sed doloron.

LA ALMOZULO

Mi ankaŭ tion havas.

MANUELO

Sed tiun de vi nomitan, oni ne povas desegni! Via vizaĝo esprimas moralan suferadon, kiu elmontrigas el la fruntaj traktoj, el la buŝo, kaj precipe el la okuloj! Vi havas okulojn, kiujn vi tute ilin ne meritas! Belegaj okuloj por desegni!

IZIDRO

Dio ĉiopova min kompatu!

LA ALMOZULO

Sed, ne estas la okuloj, kiuj suferigas min: estas la dorso kaj la kruroj!

MANUELO

La dorso, koj la kruroj ne interesas por tio.

LA ALMOZULO

Viro!

MANUELO

Vi ne devas atenti kial ili ne interesas! Mi ne scias ĉu vi havas ĉagrenojn, sed via vizaĝo certigas tion.

LA ALMOZULO

Kion mi havas, estas multe da mizero. Da 40 jaroj mi jam estas almozulo!



MANUELO

Kaj eble vi estis antaŭe riĉa!

LA ALMOZULO

Mi?... Neniam... Aŭtaŭ ol peti almozon, mi jam estis malriĉa!

MANUELO

Sed certe okazis al vi multe da renversoj!

LA ALMOZULO

Kion mi ja suferis, tio estis oftega malsato!

MANUELO

Tio ne malhelpas! Sidiĝu!

LA ALMOZULO

Ho! Jes, tio malhelpas.

MANUELO

Ne malhelpas; ĉar la mizero vin beligis! Tiujn ĉi trajtoj, kiujn vi havas, kiuj malsupreniras vizaĝsuben vi ne havus, ne suferinte. Mi ne scias ĉu ili estas pro doloro, sed tiel ili ŝajnas, kaj por desegni estas same kvazaŭ ili estus tiaj!

LA ALMOZULO

Ĉu ci volas moki min, junulo?

MANUELO

Mi parolas por mi mem. Ne zorgu pri tio, ĉar mi bone scias, ke vi ne povus min kompreni—Sidiĝu, mi diras!

LA ALMOZULO

Kien mi devas sidiĝi, diru?

MANUELO (*Sidigante lin*)

Tien ĉi.

LA ALMOZULO

Kaj, ĉu mi devas fikse rigardi?

MANUELO

Ne moviĝu, mi certigas vin, ke vi sidas tre bone!

LA ALMOZULO

Ne tre! Miaj kruroj ekdormiĝos.

MANUELO

Des pli bone! Vi estas bela, kiel apostolo!

IZIDRO

Ho ve! Kiom da naŭvuloj lasis la reĝo Herodo!

MANUELO (*febre desegnante*)

Ha! Kia beleco! Kia Karaktero! (*Isidro alproksimiĝas por vidi kiel li desegnas*). Se mi povus eltrovi tiun ĉi vivon! Tiujn ĉi liniojn, kiuj ne estas linioj! Tiun, mi ne scias kio de la esprimado! La okulojn! La frunton! La buŝon! La harmonian movadon..... Izidro, ĉu vi tion vidas? Ĉu vi vidas kiel silentante, estas kiam pli bone parolas la buŝon, kiam la frunto ŝajnas pripensi?

IZIDRO

Filo mia, ĉi estas feliĉegulo!

BAILET (*Kiu eniras kaj rigardas la desegnaĵon*).

Ho! Kiel ĝi estas bela!

IZIDRO

Kiel bela ĝi estas! Nu, iru tuj al la magazena tablo! Mi rediras, ke anstataŭ panvendejo, tio ĉi baldaŭ estos infana lernejo. (*Bajlet iras al la vendejo*).

SCENO III.<sup>a</sup>(*La samaj kaj SINJORO JOHANO*)

SINJORO JOHANO

Dio gardu vin! Ĉu la mastrino ankoraŭ ne revenis?

IZIDRO

Al la diservo ŝi iris sinjoro Johano, sed ŝi ne povas malfrui.

SINJORO JOHANO (*al Manuelo*)

Kion ci faras tie ĉi?

IZIDRO

Kion vi volas, ke li faru: la ĉiamajon.

SINJORO JOHANO

Sed, kio estas tio ĉi?

MANUELO

Nenion diru al mi, sinjoro Johano.

SINJORO JOHANO

Ĉu vi denove kun la mensogoj?

MANUELO

Ne malhelpu min, mi diras, mi vin petas.

SINJORO JOHANO

Nu, ĝuste mi venas por malhelpi cin, kaj por diri al ci denove tion, kion mi devas diri al ci ĉiutage: tiu ĉi domo tia, kia ĝi funkciadas ne estas bone.

IZIDRO

Certe, vi estas prava!

SINJORO JOHANO

Mi estis la amiko de cia patro, ci jam tion scias, kaj kvankam mi nur estis «la amiko de cia patro», mi estas devigata averti cin, nur tial, mi jam diris, pro la amikeco de cia patro.

MANUELO

Nenion diru al mi nun. Vi poste sciigos min pri tio.

SINJORO JOHANO

Kiel, poste! Poste kaj nun. En tiu ĉi domo estas neniu. Maljunulo, baklernanto, tro bona mastrino, kaj kiu devus zorgi pri ĉio, tio estas ci, nur zorgas makuli desegnotolaĵojn kaj plenigi paperojn je desegnaĵoj, la tutan sanktan tagon.

MANUELO (*al la Almozulo*)

La kapon iom pli mallevitani!

SINJORO JOHANO

La tuta klientaro plendas! La panon vi ne kuiras tiel, kiel antaŭe.

IZIDRO

Tio ĉi ne estas vero.

SINJORO JOHANO

Vi ne havas komplimentojn por la klientaro, tiajn komplimentojn, kiujn deziras la klientoj, tiu kiu pagas, la konsumanto... kaj, kion faras la konsumanto, kiam li plendas? Ne konsumi, jen estas la afero! Kaj, kio okazas kiam oni ne konsumas? Ke la produktanto ruiniĝas!

MANUELO (*leviĝante entuziasplena*)

Kia desegnaĵo! Rigardu, sinjoro Johano, kia desegnaĵo!

SINJORO JOHANO

Ĝuste, pri tio ĉi ni parolis, pri la desegnaĵo!

MANUELO

Nu, do, diru al mi, pri kio vi parolis?

SINJORO JOHANO

Pri nenio. Tial ke ci ne aŭskultas min... Mi jam parolos kun cia patrino.

MANUELO

Nenion diru al la patrino. Vi jam scias ke ŝi ekscitegiĝas, kaj mi tion ne volas.

SINJORO JOHANO

Ĉar vi aŭskultas neniun! Ĉar vi havas nur unu celon.

MANUELO

Mi petas cin, ke ci ne maldolĉigu ŝian vivon.

SINJORO JOHANO

Mi estas devigata ĉi tion al ŝi diri, kaj mi diros tion ĉi. Kaj ci jam scias, pro kio mi diros al ŝi tion.

MANUELO

Mi sufiĉe scias ĝin. Ĉar vi estis la amiko de mia patro!

LA ALMOZULO

Ĉu mi jam povas foriri?

MANUELO (*donante al li panon*)

Prenu, kaj foriru!

SINJORO JOHANO

Unu panon ci donacas al li?... Kompatinda domo!

MANUELO

Jes. Mi donas al li unu panon, kaj ankaŭ pli donus al li. Mi ne estas, kiu faras al li almozon, donante ĝin. Multe pli li faris por mi, lasinte ke mi kopiu lin. Estas divers-specaj almozoj!

---

## SCENO IV.<sup>a</sup>

*La samaj kaj Rozo*

Rozo

Kio okazas al vi? Pro kio vi disputas?

SINJORO JOHANO

Pro kio ni disputus! Mi alvenis por via bono, kiel tio koncernas min pro devo, kaj via filo vi jam scias kiel li estas, neniam oni povas kontraŭstari lian sufokpremon.

Rozo

Kion vi volas diri?

SINJORO JOHANO

Li tion diras al vi tial, ke vi forprenas al mi la rajton tion diri. (*Li iras al la vendejo, kaj sidigas proksime de la pordo. Iŝidro sekvas lin.*)

SCENO V.<sup>a</sup>

MANUELO kaj ROZO

Filo, kion li volas diri?

MANUELO

Kion vi volas, ke li diru! Ili volas diri... tion, kion ili diras al mi ĉiutage. Tiu ĉi malpaco, kiun li faras al mi, ĉar mi desegnas, kaj pentras.

ROZO

Kia malpaco?

MANUELO

La ĉiama. Tiun, kiu faras la homoj... ordinaraj al tiuj, kiuj ne pensas kiel ili.

ROZO

Sed pro kio?

MANUELO

Mi ja ne scias kiel! Ĉar ili kredas esti pravaj tial ke ili estas multe pli nombra ol ni. Vi jam scias ke mi neniam agis kiel junulo; ke anstataŭ iri al la balo, same kiel la aliaj junuloj, mi pasigis la noktojn leginte; ke mi ne scias, kio estas amindumi; ke nun okazas la vilaĝa ĉeffesto, kaj ke por mi la plej bona festo estas neniel ĝin festi aŭ festi ĝin laŭ mia maniero, nu, pro tio ili kontraŭstaras min, ĉar pri tiu, kiu ne kondutas kiel la ceteraj, la ceteraj ŝajnas ofendiĝi, kaj ankaŭ deziras liu turmentigi.

ROZO

Nu, ne penu pro tio.

MANUELO

Patrino, tio okazas tiel, kiel mi diras ĝin al vi. Mi ne scias pro kio nek kial, sed ĉiuj bone parolas pri... la artistoj, kaj neniu volas ilin ĉe sia hejmo. Kiam mi ekpentris parkere, vi tion scias, eĉ la gepatroj alkondukis siajn infa-

nojn por montri al ili miajn desegnaĵojn. Tiam la pentrarto ŝajnis al ili ĉarmo, ornamo, kaj lerteco; sed tuj kiam oni deziras supreniri, kaj ke suprenirante oni jam ne estas komprenata, tiam anstataŭ doni al vi kuraĝon, ŝajnas ke ili deziras vin enprofundiĝi.

Rozo

Tio estas vero, sed ne miru pro tio. Eĉ, mi kiu estas cia patrino, timiĝas pro la ekscitigo kiun ci havas.

MANUELO

Kaj kial?

Rozo

Mi ne scias, sed mi inulte timas laŭ cia vojo. Mi ne scias ĉu tio, kion ci faras estas bona aŭ ne. Por la patrinaj okuloj ĉio, kion faras la filoj, estas bona. Ci montrus al mi la bildojn returnitajn, kaj se la bildoj apartenus al ci, mi ilin trovus bone faritaj. Sed ne estas tio, kion ci faras, kio terurigas min: terurigas min, la vivo kiun oni devas fari, laŭ mi aŭdis rilati, kiam oni sekvas tiun ĉi metion, kiun mi ne scias kiel oni nomas ĝin, sed pri kiu mi scias, ke ĝi ne estas la nia, kaj ke ĝi estas plena je danĝeroj, kaj suferoj!

MANUELO

Se la vivo de la pentristo, estas la plej bela vivo patrino!

Rozo

Ĝi povas esti bela, sed ĝi devas esti malgaja.

MANUELO

Kaj pro kio vi timas! Nu, Diru.

Rozo

Mi tion ne scias. Oni diris al mi, ke tiu, kiu deziras sekvi, kion deziras, iri pentrante tra la mondo pli aŭ malpli baldaŭe li devas lasi sian domon!, li ĉion devas lasi, ĉion, filo mia!, por iri antaŭen kvazaŭ li estus soldato, suferante pro mizero, kaj pro malgajeco..... Oni diris al mi, ke la filoj dibočas, mi ne scias kie; ke en la urboj, kien ili devas iri, ili estas ĉirkaŭitaj je ĉiaj tentadoj; oni diris al mi (*ŝi ploras*)... oni diris al mi, ve al mi!, ke tuj kiam ili estas

malproksimaj ili neniam plu rememoras pri la anguleto, kie ili naskiĝis!.....

MANUELO

Malbone parolis tiuj, kiuj diris al vi tion. Tie kien iras, tiuj, kiuj tien iras kun bonaj deziroj, tiuj fariĝas homoj; ili vivadas! ili vivas kiel oui ne povas vivi en la vilaĝetoj; ĉiuj konas ilin, kaj admiras; ili vidas la belajn kolorojn de la mondo, kaj ili revenas, kaj estas la fiereco de siaj domoj.

Rozo

Ili ne revenas, filo mia, ili ne revenas! Mi jam scias tion! Kaj se eble ili revenas, ili trovas la patrinojn..... mortinta!

MANUELO

Nu, patrino, ne estu tia!

Rozo

Ne, se mi diras al vi tion, kaj malgraŭ tio, mi ne plendas. Mi jam scias, ke la patrino estas kiel arbo, kaj la filoj kiel la frukto; mi tion ja scias; kaj ke tuj kiam la arbo fruktodonis, ĝi jam faris ĝian devon, kaj tiam ĝi devas morti. Mi diras tion, ĉar ci jam scias ke mi ne povus vivi sen ci, kaj ke mi irus tien, kien ci volus; sed... ke aukaŭ mi amas tiun ĉi panvendejon, tiun, ĉi panvendejon, kiun starigis cia patro, li estu en ĉielo; kaj mi scias, ke laborante ni povas vivi, sed nur vivi; kaj mi scias, ke la dometo apartenas al ni, kaj ke nenio mankas al ni dank'al Dio; kaj ke nenio al ni mankos dum ci estos tie ĉi, sed ke se ci iam forirus mi devus dividi en du mian koron: unu kiu restis ĉi tie, kaj alia, kiun ci forportus kun ci

MANUELO

Patrino: kaj se mi povus foriri, kaj se anstataŭ esti tio, kio nun mi estas, revenus al vi filo pri kiu oni multe parolas, kaj ke anstataŭ lasi vin en tiu ĉi angulo de la mondo, li povus alkonduki vin ĉien, ĉu vi ne estus pli kontenta?



Rozo

Por ci mi estus tia, sed ne por mi.

MANUELO

Kaj se mi revenus fama kaj glorphena?

Rozo

Mi deziras cin honorita kaj belkreska. Mi havas nenian alian ambicion.

MANUELO

Patrino, mi ja estas bona kaj honesta. Mi tia estas. Mi ĵuras al vi ke mi estas tia. Sed mi korpremiĝas ĉi tie! Mi korpremiĝas! Kaj kedu, ke mi ne estas kulpa je tio; sed mi ne scias el kie tio devenas, ĉu ĝi estas ia puno aŭ sorto, sed oni malfermis al mi fenestron tra kiu oni ekvidas bluan ĉielon, kaj aŭ mi konsumiĝos en tiu ĉi vilaĝo, aŭ mi min ĵetos tra la fenestro por iri al la bluaĵo, aŭ por min mortigi!

Rozo

Kion ci diras?

MANUELO

Jes. Mi ne povas vivi! Mi ne povas fari alimaniere, sed mi ne povas vivi ĉi tie! Estas ia afero, kiun mi ne scias: oni nomas ĝin iri bataladi, vivi; arto, kio ajn ĝi estu; io, kion mi amas, kaj deziras; mi scias, ke ĝi estas kvazaŭ maro, vasta maro, kaj mi scias, ke mi volas min ĵeti en ĝin, kaj ke mi ne scias naĝi.

Rozo

Mi ne komprenas cin, sed ci terurigas min! Mi vidas ke ci malŝatas por io, kion ci amas pli ol min!

MANUELO

Ĉu mi amas la arton! Mi amas ĝin pli ol min mem.

Rozo

Kaj pli ol ĉion. Tion mi jam scias, tion mi scias, kaj mi ne estas ĵaluzo, kaj kredo ke por ne esti tia, oni devas ja esti patrino.

MANUELO

Se vi ne devas esti ĵaluzo. Se tiu ĉi deziro, kiun mi havas estas pli por vi, ol por mi!... Mi havas la inklinon, mi havas la fidon, kaj forton, interne de mia brusto, kiu enpuŝas min, kiu nur povas esti la esperol

Rozo

Filo mia!

MANUELO

Mia nomo, kiun neniu nun konas, kiel la rondoj disvantiĝantaj, kiun faras la fontaj gutoj falantaj sur akvon, etendiĝos ĉie, ĝis kiam ĝi alvenos tien ĉi en la vilaĝon; kaj poste ĝi heliĝos—jes, patrino heliĝos!—kaj la heleco alvenos ĝis vi, kaj ĝi donos varmecon al vi por konsoli vian maljunecon!

Rozo

Ĉu vi vidas, kiel ci ekscitegiĝas, filo mia!... (*Ŝi ploras*).

MANUELO

Kiel vi ploras?

Rozo

Mi ploras pro ĝojo cin aŭskulti, kaj pro malĝojo pri tio, kion ci diras al mi!

MANUELO

Tio estos! Ĉio tio ĉi ja estos!

Rozo

Ci estas malriĉa, kaj ni estas malriĉaj! Ĉu ci ne rememoras, ke ni estas malriĉaj?

MANUELO (*maldolĉe*).

Mi tion scias!

Rozo

Ĉu ci ne scias, ke estas neniu kiu helpos cin?

MANUELO

Tio estas vero!

Rozo

Ĉu ci ne rememoras, kie ci vivas? Ĉu ci ne vidas kie ni estas? Rigardu cin, kaj rigardu min! Ni estas panvendistoj. Pensu, ke ni estas nur panvendistoj.

MANUELO

Mi tion scias, sed estas momentoj, kiam mi songas, kaj mi kredas ke la songo estas realaĵo. Ni nur estas panvendistoj, kaj malriĉaj!; sed ĉu ne estas afero malgaja sin senti kun flugiloj, kaj esti naskiĝinta en kaĝo?

Rozo

Se mi estus povinta naski cin en palaco, kredu ci estus naskita tie.

MANUELO

Ne estas palacoj, nek riĉaĵoj: estas rimedoj, estas subtenaĵo, kion mia koro deziras!

Rozo

Kaj la mia, Manuelo, bezonas nur unu aferon, bezonas cin,.... cin.... kaj nenion plu, ol cin!... Mi ne scias pri ĉio, kion ci parolas, sed ĉiam mi scios unu aferon: esti kontenta se ci estas tia; plori se ci ploras, kaj morti se tiamaniere mi povus alporti al ci la gajecon!

MANUELO (*ĉirkaŭprenante ŝin*)

Vi ja estas patrino...!

Rozo

Mi estus estinta patrino por multaj filoj, kaj mi nur naskis cin: kalkulu do, ĉu mi ja devas esti patrino!

MANUELO

Pardonu min, kaj ni ne parolu pli pri tio, kaj nun. (*prenante branĉaĵon kaj jetante ĝin en la fornon*), kaj nun branĉarojn al la forno! Se oni povus baki panojn per iluzioj tiam mi ne bezonus lignaĵojn! Sed la iluzioj ne kuiras!... Patrino, kiom da pan oĵ oni devas baki tiun ĉi vesperon?

Rozo

Mi jam tion ne scias! Ci diras al mi aferojn tiel strangajn, ke ci ankaŭ igas min sonĝi ne dormanta. (*La Instruisto eniras en la vendejon, parolas kun Siujoro Johano, kaj ĉiuj eniras.*)

---

## SCENO VI.<sup>a</sup>

---

MANUELO, ROZO, LA INSTRUISTO, SINJORO JOHANO, IZIDRO,  
KAJ BAJLET

LA INSTRUISTO

Dio vin gardu ĉiujn de la malbonol

MANUELO

Bonan tagon, sinjoro Instruisto.

ROZO

Ĉu vi tie ĉi?

INSTRUISTO

Mi mem. Lasu ke mi sidiĝu, ĉar mi alvenas pro afero de granda intereso por vi, por mi, kaj eĉ por la vilaĝo.

ROZO

Ha! Dio mia! Sinjoro Instruisto ne terurigu min.

INSTRUISTO

Male, mi ja alportas al vi bonan novaĵon. Unu el tiuj novaĵoj, kiuj multfoje ŝanĝas la estontecon de familio.

MANUELO

Ĉu vi diras bonnovaĵon.

INSTRUISTO

Ĝus alvenis, por feliĉo de ĉiuj, por vidi la vilaĝan ĉeffeston, kiu, kiel vi scias estas unu el la plej originalaj kaj tradiciaj el la ĉirkaŭaĵo, la fama pentristo sinjoro Petro Karmona, la ne malpli fama kritikisto sinjoro Trilles, kaj iu alia tre inteligenta pri la plastikaj artoj.

MANUELO

Kaj, kion vi intencas diri?

INSTRUISTO

Ke, kiel vi bone scias, mi krom instruisto, ĉiam ŝatis la estetikon, kun ĝia aldoniĝo, la beleco... Mi iris ilin akcepti tiun ĉi matenon por gvidi ilin tra la vilaĝo. Ni ekkomencis parolante pri la arto, kaj de la arto ni pasis al la artistoj, kaj mi bone aranĝis la interparoladon, por paroli pri ci.

MANUELO

Ĉu vi diras, ke vi parolis al ili pri mi?

INSTRUISTO

Same, kiel ci diras, kaj jam mi diros al ci kial. Ci jam

scias, ke ĉiam mi memoras, ke mi gvidis ciajn unuajn pa-sojn tra la dornohava arta vojo, kaj kvankam ci ĉiam ne sekvis miajn estetikajn ideojn, mi amas cin, kaj cin ŝatas. Mi faris pli ol paroli pri ci. Mi petis ilin ke ili venu vidi ciajn verkojn.

MANUELO

Ĉu hejme?

INSTRUISTO

Kaj ili venos.

MANUELO

Ne estas eble!

ROZO

Kiel ni akceptos ilin?

SINJORO JOHANO

Nature! Mi ne scias, kiu vin komprometas.

INSTRUISTO

Mi jam havas miajn planojn. Lasu ke mi faru, ĉar mi scias, kien mi iras. Mi de longe jam malkaŝite laboras. Mi klopodis por ke vi estu pensiigita, kaj eĉ mi diros al ci, inter ni, ke miaj kloplodoj ne estis senfruktaj!

SINJORO JOHANO

Sed neniu donos ja al vi eĉ unu centimon!

INSTRUISTO

Kiam mi parolas, jam mi scias, kial mi parolas. Mi parolis jam al kelkaj monoferantoj por cin sendi al la urbo, al fremdolando, aŭ kie ajn ĝi estos. Oni eĉ disputis por decidi al kia fremdolando ni cin sendus. Mi pensis pri Romo, la notario nature ŝatis Ĝrekujon tial ke ĝi estas la arta lulilo, kaj ni ne povis eltiri lin el la lulilo; sed ĉar la horo estas ankoraŭ ne alveninta, mi jam pli ne klopodis.

SINJORO JOHANO

Kaj vi agis tre sankte.

MANUELO

Sed, ĉu vi kredas, ke oni pensiigos min?

INSTRUISTO

Tio dependas nur el unu afero. De la vizito de tiuj ĉi viroj, de tiuj ĉi famaj viroj, kiuj venos! Tio, kion ili diros estos bone. Ĉiuj konsentos antaŭ la prudenta opinio de spertaj, kaj saĝaj viroj, de veraj scienculoj, kiel estas tiuj ĉi eminentuloj; oni faros la manoferon, *kaj por iri Romon mankas artistoj!* Kiel ŝajnas al ci, tio?

MANUELO

Ne, sinjoro Instruisto, ke ili ne venu!

INSTRUISTO

Nu! Kiel ci diras!... Ĉu ci ne estos kontenta akcepti tiujn ĉi virojn?

MANUELO

Kalkulu ĉu mi estos kontenta! Sed, mi havas nenion por montri al ili.

INSTRUISTO

Kiel, ci havas nenion!... kaj la pentraĵoj? Kaj la pape-rujoj?

MANUELO

Ili estas nur ideoj pri aferoj. KREDU MIN, ke ili ankoraŭ ne venu.

## INSTRUISTO

Trankviliĝu, ĉar ili havas trafan ekrigardon. Tie kien ili vidas krajonaĵon, tuj ili jam trovas la eraron. *Nenion*, *Nenion*, hodiaŭ ne estas taŭga tago por senti: hodiaŭ estas tago por decidi! Preparu ĉion, kion ci havas, kaj rapidu! Mi iras ilin serĉi tuj.

## MANUELO

Sinjoro instruisto!... Patrino!...

## INSTRUISTO

Se mi ne faras tion nur por ci! Tion mi faras por ci, kaj por la vilaĝo! Tie ĉi ni havas neniun faman filon, kaj estas malgrandaj vilaĝetoj, kiuj jam havas ilin! Mi jam tion diris per presliteroj, ci jam tion scias, ĉar mi legis ĝin tie ĉi: «La plastikaj artoj, kun siaj aldonoj kaj fratinoj, estas la unuaj ornamoj de la popoloj! La popolamaso, kiu ne ŝatas la arton, ne eniras en la Eŭropan interkonsenton nek en la progresajn elmontraĵojn, kaj tiu, kiu ne amas siajn artistojn, tiu laŭ mia opinio, ne estas inda je seĝego en la kongreso de la estonteco.» Pro tio mi ilin iras serĉi.

## MANUELO

Sed...

## INSTRUISTO

Mi iras tien. Tio estas mia devo. Ĉu vi akompanas min, sinjoro Johano?

## SINJORO JOHANO

Ĉu mi?... Neniam!

## INSTRUISTO

Kaj ĉu vi ne deziros ĉeesti dum la vizito?



SINJORO JOHANO

Mi estos tie ĉar tio ĉi estas mia devo. Sed neŭtrale.

INSTRUISTO

Nu, vi devas do ankaŭ veni.

SINJORO JOHANO

Mi akompanos vin, sed denove mi ripetas al vi: neŭtrale!

INSTRUISTO

Tiel neŭtrale, kiel vi deziru. Ni iru!

MANUELO

Ĉu vi ne kredas saĝe, ke mi iru kun vi?

INSTRUISTO

Nel Vi preparu la pentraĵojn, kaj rememoru kiam *Rafaelo* estis prezentita al Mikaelo Angelo! (*La Instruisto foriras kaj Sinjoro Johano sekvas lin*).

---

## SCENO VII.<sup>a</sup>

---

ROZO, MANUELO, IZIDRO kaj BAJLET

MANUELO

Patrino: kion mi montros al tiuj ĉi pentristoj?

ROZO

Kion mi scias, ve al mi! Ĉion, kion ci faris, oni devas nenion kaŝi al la profesoroj.

MANUELO

Se ĉio estas studaĵoj, kaj nenio plu!

ROZO

Kaj la pentraĵoj?

MANUELO

Ili nur estas komencitaj!

ROZO

Kaj tiu Sankta Virgulino, kiu ploras?

MANUELO

Pri ĝi ili ridus!

ROZO

Kaj kial ili ridus, simplanimulo! Lasu fari al mi, kaj ci jam vidos (*kriante*) Bajlet! Alportu tiun pentraĵon el la alkovo. Tiu, kiu plej plaĉas al mi! (*Bajlet kurante eniras la ĉambron.*)

MANUELO

Sed se ĝi estas la unua kiun mi faris!

ROZO

Despli bone. Ci jam vidos, kiel mirigitaj ili estos tuj kiam ili vidos ĝin. Ĝi estas, la plej fervora figuraĵo, kiun mi iam vidis. Se ĝi estus sur altaro, ĝi farus miraklojn.

IZIDRO

Ĉu ci ne volas tiun homon, kiu knedas?

MANUELO

Ne.

IZIDRO

Ci mêm, viro, ci mem... Mi tion diras ĉar tio ĉi estas nia metio.

BAJLET (*elirante kun pentraĵo*)

Jen ĝi estas. La Sankta Virgulino alvenis.

MANUELO

Sed ĝi ne estas Sankta Virgulino.

BAJLET

Sed malgraŭ tio ĝi estas tre bela. Izidro, ĉu ĝi ne estas tre bela?

IZIDRO

Silentu, ĉar ci nenion komprenas pri tio!

BAJLET

Sed ĝi estas tre bela! (*Izidro minacas al Bajlet*).

ROZO

Nun alportu tiun de mia ĉambro, kaj tiun, kiu rigardas ĉien. (*Bajlet iras ilin serĉi.*)

MANUELO

Sed se tiu...

ROZO

Tiu estas tre bona.

MANUELO

Ĉiuj ŝajnas al vi bonaj, sed ili, same kiel vi, ne rigardos ilin.

BAJLET (*enirante kun du pentraĵoj.*)

Jen estas la figuraĵoj.

IZIDRO

Ci ne rapidas tiel multe por alporti turtojn!

MANUELO (*lokante la pentraĵojn*).

Ni loku ilin tie ĉi, ĉar ili estos bone lumigitaj.

ROZO (*returnante ilin*).

Tiel.

MANUELO

Kial do vi returnas ilin?

ROZO

Ĉar poste mi renversos ilin, kaj tiamaniere ili multe pli impresos, kiam oni rigardos ilin.

MANUELO

Se tio estus certa!

ROZO

Kiel mi povus pensi, antaŭ ol naskiĝi, ke mi estus devigita montri pentraĵojn! Ni patrinoj ne ekmarŝas ĝis kiam la paŝoj de la filoj nin gvidas!

MANUELO

Kompatinda patrino...!

ROZO

Kaj nun, ĉar ni jam pretigis la pentraĵojn, ci devus zorgi pri cia vesto, por akcepti tiujn sinjorojn.

MANUELO

Ne, tute ne; dece mi estas jam tiamaniere.

Rozo (*ordigante lian kravaton*).

Almenaŭ la kravaton.—Tiel.—Ĉu ci ne estas kontenta?

MANUELO

Multe mi estas, sed korpemata ankaŭ pro gajeco, timante ke ĝi ne fariĝu malgajeco. Kiam alproksimiĝas tio, kion oni multe deziras, eĉ ŝajnas ke oni timas tiun ĉi alproksimiĝon. Kio okazos? Kion ili diros?

ROZO

Nu, ne atentpensu, kaj trankviliĝu.

BAJLET (*kiu eniris, kaj eliras kun antikva kadro*).

Ĉu ni ankaŭ tiun ĉi pentraĵon devos montri?

IZIDRO

Bone! Al la vendejo, kaj rapidul (*Bajlet iras saltante al la vendejo. Izidro sekvas lin.*)

MANUELO

Patrino, hodiaŭ estas momento en kiu mi riskas la es-

tontecon de mia vivo. Vi, jam aŭdis la instruiston: tio, kion tiuj ĉi pentristoj diros, ili povos savi aŭ malsavi min.

ROZO

Kial ci diras tion?

MANUELO

Ĉar tiel ĝi estas. Mi scias, ke tiel ĝi estas. Se bedaŭrinde oni ne pensiigas min, mi por ĉiam restos tie ĉi en la vilaĝo por morti pro malaktiveco...

ROZO

Ĉu morti, ĉar ci restus tie ĉi?

MANUELO

Kaj se oni pensiigas min, se mi povos flugi kiel mi deziras, ha, tiam! ŝajnos ke oni malfermas al mi la kradon! Ne estos sufiĉe vasta ebenaĵo por la flugado, kiun mi entreprenos!

ROZO

Ĉu ci vidas kiel alvenas tio, kion mi diris? Ĉu ci vidas kiel la filoj pentristoj foriras, por iri tien, mi ne scias kie, kiel mi diris al ci?

MANUELO

Ĉu vi ne deziras min feliĉa?

ROZO

Kaj ci kuraĝas demandi al mi tion?

MANUELO

Ĉu vi deziras, ke mi tie ĉi restu?

ROZO

Mi tion ne scias.

MANUELO

Ĉu vi ne vidas, ke la birdoj forlasas la neston tuj kiam ili sin sentas kun flugiloj?, ke la tero estas multe pli vasta ol tiu ĉi butika anguleto?

ROZO

Tio ĉi estas vera! Tro vera!

MANUELO

Ĉu vi volas lasi min morti en tiu ĉi anguleto?

Rozo

Kial mi dezirus tion ĉi, se eĉ dirante tion, mi terurigas.  
(*Plorante*) Ci estas prava: ci ne estas, kiu devas mortil...

MANUELO

Se tio estos bono por ĉiuj! Se mi sentas ĉe la tempioj  
ĝian bruladon! Se mi sentas min kvazaŭ senpeza! Same  
kvazaŭ mi levigus! Se ni estos feliĉaj, patrino!... Ĉu vi ne  
volas, ke ili venu?

Rozo (*plorante*).

Nenion plu demandu al mi, ĉar ci min mortigas!... ke  
ili malfruu... sed ke ili venu!

SCENO VIII.<sup>a</sup>

ROZO, MANUELO, SINJORO INSTRUISTO, SINJORO JOHANO,  
SINJORO KARMONA, SINJORO TRILLES, ALBERTO,  
IZIDRO KAJ BAJLET

BAJLET (*en la pordo*).

Jen ili estas! Jen ili estas!

Rozo

Jam? kiel frue! Dio mial! Filo akceptu ilin, dum mi  
forpelas la polvon de la pentraĵoj.

INSTRUISTO (*enirante, al Sinjoro Trilles*)

Nu jes: vi kiel kritikisto, scias bone, kiu estis la fama  
Ricci'o, kaj kiu estis Johano el Toledo, la plej fama pen-  
tristo de bataloj.

SINJORO TRILLES

Mi konas ilin nome.

INSTRUISTO

Mi jam diris al vi tion: mi estas partiano de tio, kion  
oni nomas «belegeco».

SINJORO TRILLES

Mi estas certa, ke vi kaj mi, ni finus por interkonsenti.

INSTRUISTO (*lasante pasi Sinjoro Karmona'n*).

Pasu kaj eniru la unua. Ni, kiuj estas pigmeoj de la arto, devas malfermi la vojon al la kleruloj.

ROZO

Eniru kaj sidiĝu.

SINJORO KARMONA

Mastrino, sen ceremonie. La pentristoj ne uzas ceremoniajn. Ni estas kutimintaj je ĉio.

ROZO

Sidiĝu, kaj pardonu, ĉar ĉio estas farunplena.

SINJORO KARMONA

Jes, mi jam vidas, ke vi estas panvendistoj. Se via filo deziras fariĝi pentristo, kiel oni diras, almenaŭ ne mankos al li panon!

SINJORO TRILLES (*sidiĝante apud Sinjoro Karmona*)

Tio estas certa!

ALBERTO (*restante poste*)

Ĉiuj ne povas diri same!

INSTRUISTO

Ĉu vi vidas? (*Pri Manuelo*) Jen ni havas la lernanton, la amanton de la plastikaj artoj. Tiu ĉi knabo estas tiu, pri kiu mi parolis.

MANUELO

Vi estu bonvenintaj!

INSTRUISTO

Jen ci havas tiujn ĉi famajn artistojn, knako! Ci jam vidas tion. Ili venas en tiun ĉi altaron! Jen! Sinjoro Karmona, la eminenta Apeles'o; Sinjoro Trilles, la fama kritikisto, kaj tiu ĉi junulo, kiu.....

ALBERTO (*sin montrante al si mem*)

Pri tiu ĉi junulo, ne vin okupegu: li estas la aldonajo de la bando.

INSTRUISTO (*ridante*)

Tre bone! Tre bone! Sed ankaŭ artisto.....

ALBERTO

Almoza... artisto! Sed mi jam diristion, ne maltrankvigliĝu pri mi. Mi utilas nur kiel fono.

SINJORO KARMONA (*pri Sinjoro Johano*).

Kaj tiu ĉi sinjoro, estas aukaŭ el la niaj?

SINJORO JOHANO

Ĉu mi? Tute ne! Mi estas la amiko de la mortinto.

SINJORO KARMONA (*al Manuelo*)

Bone, dol! Ci jam scias, kiel ni venis. La Sinjoro Instruisto diris al ni, ke ci desegnas kaj pentras, kaj pro tio ĉi ni venas: por vidi kion ci faras, kaj se ni povas doni konsilon, doni ĝin al ci.

MANUELO

Mi..... kedu min..... ne estus kuraĝinta vin alvenigi... sed...

SINJORO TRILLES

Kaj kial?

SINJORO KARMONA

Ĉu ci estas hontema?

MANUELO

Por mi, ne, sed mi estas tiu, rilate miajn verkojn.

SINJORO KARMONA

Nu, junulo, ne ridigu min! kun ni, ci povas uzi sincerecon. La pentristoj, ni estas kvazaŭ familio.

ALBERTO

Iomete disigita.

SINJORO KARMONA

Ne iomete: tre; sed kaŝite, kiel preskaŭ ĉiuj familioj.

SINJORO TRILLES (*al Manuelo*)

Kaj aŭskultu. Kiujn instruistojn ci havis?

SINJORO KARMONA

Kaj kial li devus havi instruistojn? Ĉiu devas esti sia instruisto mem.



SINJORO TRILLES

Amiko, mi kredas ke la artisto naskiĝas, sed, ankaŭ li elfariĝas.

INSTRUISTO

Eble ne estas dece por mi ĝin diri, sed... estas mi la sola instruisto kiun li havis; kaj se li ne same pensas kiel mi, estas ĉar mi havas mian estetikon, kaj li...

SINJORO KARMONA

Lasu flanke la estetikon. (Al Manuelo) Kiel komencis cian aldonitecon?

ROZO

El la infaneco. Kiam li estis infano, li jam faris tiajn ornamojn, ke ni estis mirigitaj.

MANUELO

Patrino!

SINJORO KARMONA

Lasu ke li parolu. Ĉiam estas tre interesa scii la devenon de la inklino.

MANUELO

La patrino estas prava parolante kiel ŝi parolis. Estis kvazaŭ dezirego, kiun mi sentis por rememori ĉion, kion mi vidis. Sed dum la infanoj deziras rememori la vortojn, mi deziris rememori la kolorojn, la liniojn, kaj precipe la esprimadon. Anstataŭ literoj mi desegnis liniojn, kaj anstataŭ ol legi, mi jam skribis.

SINJORO TRILLES

Tre bone!

MANUELO

Poste mi ekkomencis iri en lernejon, kaj la instruisto faris kopii al mi, figuraĵojn, bildojn, kaj tiujn modelojn kiujn vi jam konas; sed tio ne min kontentigis, kaj li, kiu ĉeestas, min pardonu.

INSTRUISTO

Oni devas komenci per la komenco. Ĉu vi ne same opinias?

MANUELO

Eble jes; sed al mi tiu komenco, konsumis miajn ner-

vojn. Plaĉis al mi elpensi. Ne fari tion, kio estis antaŭ mi, sed tion, kion mi dezirus vidi. Ne, kio estis proksima, sed tion, kio estis malproksima.

SINJORO KARMONA

Ci sekvu.

MANUELO

Poste mi iris du aŭ tri fojon en urbon. Kiam mi vidis ekspozicion, mi manĝegis ĝin per la okuloj; mi sekvis ĉiujn pentraĵojn, unu post la alia, kvazaŭ ili estus floroj kaj mi abelo. Unuavide, ĉiuj ŝajnis al mi bonaĵ, belaj, kaj lumplenaj; sed la morgaŭan tagon mi alvenis al la vilaĝo, kaj kiam mi rememoris pri ili, kaj ilin mi komparis al tio, kion mi vidas, al la veraj homojn, al la homaj esprimadoj, al la ĉiela kaj nuba lumo, tiam ili ŝajnis al mi kvazaŭ kartona, nigraj, kaj ĉiuj samaj; precipe tio ĉi: ĉiuj samaj, kvazaŭ ili estus elirintaj el fabriko kaj ke oni ilin estus pentrintaj po horoj; kaj tiam mi febrigiĝis por pentri malsamajn aŭ frenezajn, strangajn aŭ kiajn ajn pentraĵojn, sed ne faritajn laŭ modelilo!

SINJORO KARMONA

Bravel Bravel! Ci deziras havi tion, kion oni nomas personeco, mi jam tion ĉi vidas.

MANUELO

Mi ne scias, tute precize, kion mi deziras havi, sed mi konas, kion mi malamas! Mi malamas ĉion, kio ne estas sincera, la artifikon, la elektitan temon, kaj komercigi per afero, kiu ŝajnas al mi tiel sankta, kiel la sanktfiguroj de la altaroj.

SINJORO KARMONA

Ci jam malamas sufiĉe da aferoj, malgraŭ ĉia junuleco!

MANUELO

Pardonu min, sed mi kredas esti devigita diri la veron pri tio, kion mi sentas. Mi nenion scias, sed mi deziras fariĝi artisto! Esti artisto, laŭ mi komprenas tiun ĉi vorton. Ne plimalaltiĝi pentrante aferojn, kiujn la koro ne sentas.

SINJORO KARMONA

Estas tre bone, kion ci diras. Estas kvazaŭ, estus al ci

antaŭ destinita! Sed ankaŭ, mi devas ion diri al ci, ermita lernanto! Mi devas diri al ci... ke unue ni devas scii, kio estas la vorto sincereco; plej sinceraj artistoj estas tiuj, kiu pentras *ex-votojn*'n (1) kaj tio devenas de tio, ke ili nenion alian scias pentri; mi devas diri al ci... ke sekvante la vojon pri kiu ci parolas, oni estas malriĉa dum la tuta vivo; kaj poste mi devas aldoni, ke ni ĉiuj ekkomencis per ekkrio al la sendependeco, sed, ho ve! naiva infaneto!, la publiko, la kritikistoj, la amikoj, eĉ la devo kaj la familio, ŝajnas kva-zaŭ ili puŝus la manon por ke ĝi rapidigu pentrante... kaj hodiaŭ konsenteto, kaj morgaŭ iomete da glitiĝo, filo mial kiam oni maljuniĝas, la mano rapidas, rapidas pli ol la volo, kaj kiam la cerbo tion ekvidas, jam la mano subiris por kolekti la monon! Antaŭ la bezonoj de la vivo, la artisto fine sin vendas.

MANUELO

Neniam mi min vendos.

SINJORO TRILLES

Mi konsentas kun ci.

SINJORO KARMONA

Ĉu ci? Nu, amiko ne faru predikojn. Ci, kiu intencas fari la kritikojn sinceraj, ankaŭ ci faras kunsentojn.

SINJORO TRILLES

Por la amikoj, mi ne neas.

SINJORO KARMONA

Kaj por la malamikoj, mi konfesos tion. Multfoje ci detruas famon: ci laŭdas unu por malaŭdi la alian.

ALBERTO

Bildego!

SINJORO KARMONA

Sed, bone: ni ne alvenis tien ĉi por diskuti. Nu; ni vidu tiujn ĉi verkojn.

---

(1) *Ex-voto* = nomo, kiun oni donas en katalana, hispana kaj franca lingvoj al ĉiuj oferdonoj, kiujn oni pendigas ĉe la altaroj, kiel dankosigno por sanktulo al kiu oni ion promesis, kaj kiu eltiris nin el danĝero, malsano, k. c. La aŭtoro uzas sprite tiun ĉi vorton por la pentraĵoj, kva-zaŭ ili ankaŭ estus pendaj oferdonaj.

INSTRUISTO

Aŭdante altajn interdiskutojn, mi pasigus la duono de mia vivo.

SINJORO KARMONA

Oni ilin alportul oni alportu tiun ĉi pentraĵojn!

MANUELO

Nel

INSTRUISTO

Kion ci diras?

MANUELO

Ili ne plaĉos. Mi jam tion scias!

SINJORO KARMONA

Kaj kiel ci scias, ke ili ne plaĉos al ni?

MANUELO

Antaŭe, tion ĉi mi timis, kaj nun... multe pli ol antaŭe, mi timas tion ĉi.

SINJORO TRILLES

Kaj kial?

MANUELO

Nenial. Ĉar mi komprenas ke vi trovos ilin naivaj *Ex-votoj*.

SINJORO KARMONA (*ridante*)

Ĉu ci ofendiĝis?

MANUELO

Mi ne havas ankoraŭ rajton por ofendiĝi.

ROZO

Mi montros ilin iom post iom, se vi volas, ĉar mi konas ilin parkere.

SINJORO KARMONA

Vi estas prava. Neniu pli taŭga ol vi, por montri ilin al ni! (*Dum Rozo elmontras la pentraĵojn, Ixidro kaj Bajlet eliras el la fundo, kaj iom post iom alproksimigas por ilin vidi.*)

ROZO

Mi komencos per la plej bela, kiu estas tiu ĉi. Mi ne

scias kion ĝi figuras, sed estas tiu ĉi, kiu plej ĉarmas min. Eĉ mi havas ĝin antaŭ mia lito, kaj ĉiumatene, kiam mi ekvekigas... mi ne scias... ĝi rigardas min, kvazaŭ ĝi dezirus paroli... kaj eĉ kontraŭ mia volo ĝi ravas min. Se mi kuraguŝ, mi eĉ preĝus antaŭ ĝi. Ĉu vi ne rimarkas ke ĝi elvekas fervoron?

SINJORO KARMONA (*malvarme*)

Ĝi estas tre bone farita.

SINJORO TRILLES (*malvarme*)

Tre bone.

Rozo

Nu, vi trovos tiun ĉi ankoraŭ pli bona. (*Forpelante la polvon*). Ĝi estas plena de polvo, ĉar la knabo ne ŝatas ĝin. Li diras ke ĝi estas tro zorgeme pentrita.

SINJORO TRILLES

Jes, ĝi estas plej bona!

MANUELO

Forportu ilin, patrino. Metu ilin en la alkoyon. La lumo ne taŭgas por tiuj ĉi pentraĵoj.

SINJORO KARMONA

Sed kial?

MANUELO

Nenial. Vi korprenas min rigardante ilin. Ŝajnas kvazaŭ se unuafoje oni ilin elmontrus al la publika honto!

SINJORO TRILLES

Nu, ne estu tiel modesta.

MANUELO

Ne, mi tion ne diras pro modesteco. Nur mi diras ĝin, ĉar ili neniam ŝajnis al mi tiel kuntiritaj. Ŝajnas ke eĉ mi ne rigardas ilin per miaj okuloj, kaj jen! ili ŝajnas al mi fremduloj.

SINJORO TRILLES

Tio ĉi estas strangal

Rozo (*per entuziasmo*)

Do, mi volas ankoraŭ montri al vi alian! jes, sinjoroj! Unu, kiun neniu estus kapabla fari! (*Ŝi montras alian*).

SINJORO KARMONA (*rigardante ĝin*)

Ĝi estas tre... sincera... kaj mi komprenas, ke vi laŭdu ĝin.

ROZO (*hontanta*)

Pardonu min, se tiamaniere mi ilin laŭdas. Mi estas patrino sinjoroj, kaj mi kredas, ke ni ne rigardas per la okuloj. Eble ni rigardas per la koro, aŭ per la sento, aŭ per kio ajn ĝi estas, sed koncerne la filojn, ni ne vidas kiel la aliaj personoj.

## MANUELO

Ilin eltiru, mi diras al vi, ĉar ili jam vidis ĉiujn!

## INSTRUISTO

Kaj la paperujon?

## MANUELO

La paperujon ankaŭ! Ĉion alportu, ĉar tiuj ĉi sinjoroj deziras rapidi.

## INSTRUISTO

Mi ne scias kion havas hodiaŭ tiu ĉi knabeto!

## ROZO

Li malordigas.

## MANUELO

Jes; okazas al mi tio ĉi, sed pardonu min!

## SINJORO KARMONA

Ne kolerigu, ĉar mi jam komprenas tiujn krizojn. Mi ilin elportis, kaj pro tio mi ilin akceptas. Artisto, aŭskultu min, aŭskultu min iomete; kaj mi ne multe predikos al ci, ĉar tio ne taŭgas al la artistoj: ci estas romantika. Ci havas talenton—tion mi ne diras per cin laŭdi—mi estas certa ke ci havas ĝin, sed ci ne havas la praktikan talenton, kaj hodiaŭ eĉ por esti idealisto, oni devas esti idealisto... praktika, malgraŭ ke por ci estas maldolĉa ĝin kredi. Vi ne estas riĉaj, ĉu ne vere?

## ROZO

Ni povas vivi.

## SINJORO KARMONA

Nu, mi multe bedaŭras diri, tion, kio mi estas devigata diri, tial ke vi deziras scii mian opinion. Pripensu multe fariĝi pentristo! La metio estas tre bela, tre, vidata el eksterel Je la komenco de la vivo, ci vidas ĝin kvazaŭ idealo,

kiu naĝas en ĉaro el oraj flamoj kun artantika matenkrepusko kiel fono. Sed tiu ĉi vizio mallonge daŭras! Se ci ne havas sufiĉe da talento, kaj muskoloj, ci enfalos en mizeron, kiu estas la plej kompatinda mizero: la hontiga mizero; kaj se ci ilin havas, se ci bedaŭrinde havas ilin, ha ve el ci! Kiel la amikoj, la envemaj, la malsprituloj, kaj eĉ la protektantoj, kaj la naivuloj pagigos ilin al ci! Oni batalas je la komencoloni batalas plej kiel eble! Pli ol oni povas! Sed poste li sin submetas, submetas, kaj kiam li ekmaljuniĝas, tiuj, kiuj malkonfesis lian spiriton diras al li ke li defalas, kaj kiam ili nomas lin defalinta, kaj ke li jam mortis, tiam jes, tiam ili altigas lin ĉar kiel la mortintoj ne kalkuliĝas, ne malhelpas al la vivantoj! Fine: dorna vojo por rikolti floron en la tombo.

MANUELO

Tio ĉi ne povas esti vera!

SINJORO KARMONA

Kredu al mi, ne deziru ĝin kontroli, kaj... ne fariĝu pentristo!

MANUELO

Tio, kion vi diras, estas neebla!

SINJORO KARMONA

La tempo diros al ci, ĉu tio estas ebla, ĉar mi vidas ke por nenio taŭgas la predikoj, kaj ke ci agos laŭ cia celo. Tiu, kiu deziras edziĝi aŭ esti artisto, ĉiam, kiam li demandas opinionon estas por ke oni pravigu lin, kaj se oni ne faras tion ĉi, tiam li ne aŭskultas. Mi jam donis al ci mian opinionon, kaj kredu ke mi amas cin agante tiel. Zorgu pri tiu romantikeco, kiu multe malhelpas la vivon; kaj se ci ne volas kredi al mi... ni jam retrovos nin! (*Etendante la manon al Manuelo*). Ĉu ci ne volas premi mian manon, ĉar mi diris al ci kion mi pensas?

MANUELO

Fartu bone.

SINJORO TRILLES

Ĉu ni foriras?

SINJORO KARMONA (*forirante*)

Vi ĉiuj pardonu min. (*Al Roĝo*) Kaj vi pli ol neniu. (*Li foriras*).

## INSTRUISTO

Vi jam aŭdis tion. Nenio jam pri tio, kiun mi proponis. La majstroj ĉiam estas majstroj, kaj antaŭ iliaj opinioj, ni devas kliniĝi la malkleruloj. (*Li foriras*).

## SINJORO JOHANO

Mi ne surpriziĝas. Mi jam kredis tion. Junulo al la panvendistejo, kiu estas afero pozitiva. (*Li foriras*).

MANUELO (*kortuŝita*)

Ne estas vero! Tio ne estas vero! Ĉar ili staras supren ili ne volas rigardi tiujn, kiuj estas malsupre!

## ALBERTO

Jes, estas vero, kion oni diris al ci, sed lasu min paroli, ĉar mi diris nenion. Estas kelkaj, kiuj diras ami sian arton, sed ili deziras esti koresponditaj de ĝi, kaj estas aliaj, kiuj nenion atendas, sed kontentigas amante ĝin. Tiuj ĉi estas kiuj faris promeson pri malriĉeco. La laikuloj de l'arto! La paroĥestretoj de l' pentrarto. Mi estas unu el tiaj. Se ci deziras veni kun mi, mi loĝigos cin ĉe mia subtegmento. Mi tie ne havas meblaron, sed mi havas helecon, kaj la heleco ankaŭ vivigas. Nu, ci jam scias tion: se iam ci deziras vivi kvazaŭ ermito, prenu (*donante al li viŝitkarton*) tie, mi rezervos por ci monaĥan cambreton. (*Li foriras*).

## MANUELO

Mi ne povas! Ili ne kredas al mi, kaj mi ne povas elmontri tion, kion mi povas fari ĉar mi estas kaptita tie ĉi en la vilaĝo...! (*Li iras plori kontraŭ la paperujo*) Neniu! neniŭ kredas al mi!...

Rozo (*irante trovi Manuelo'n*)

Trankviliĝu, filo mia! Mi kredas al ci! Se la personoj, kiujn oni nomas inteligentaj, al ci ne kredas, tio estas, ĉar ili ne havas koron! Sed mi kredas al ĝi, ĉar mi estas patrino!

MANUELO (*ĉirkaŭpremante ŝin*)

Patrino!



### Rozo

Iru! Iru tien, kien ci devas iri, kaj mi tie ĉi zorgos pri la domo! Iru tien ĉar nenio mankos al ci! Mi ĵuras al ci, ke nenio mankos al ci.

### IZIDRO

Junulo! Mi estas maljuna, sed tia mi ne estas! Mi laboros tie ĉi apud la bakejo! Iru knedi ciajn ideojn, ĉar ci havos panon dum mia vivo!

## Kurteno

## AKTO DUA

*(La sceno prezentas tre malriĉan loĝejon. Ĝi preskaŭ estas subtegmento, kiun oni aranĝis por pentrista laborejo. En la muro de la fundo estas granda fenestrego tra kiu oni vidas la urbajn sonorilejojn, kaj flanke de la muro pordeto. Unu flanke la stupara pordo, alia flanke tiuj de la ĉambroj. Tie ĉi kaj tie, en la laborejo, estas stablo, pendantaj skizoj, ventŝirmilo, kameno, subpiedaĵo por la modelo, paperoj, paperujoj, kaj aliaj malordigitaj studaĵ aferoj.)*

## SCENO UNUA

ALBERTO KAJ MANUELO

*(Kiam la kurteno levigas Alberto kopias pomojn kiuj kuŝas sur la tablo. Si ĉesas pentri prenas pomon, kaj mangas ĝin. Manuelo eniras.)*

MANUELO

Ho, Alberto! Ĉu ci jam manĝetas?

ALBERTO

Rigardu, mi estas manganta la modelon. Mi kopiis tiun ĉi dunaskitajn pomojn, kaj ĉar mi jam pentris ilin, mi ilin mangas!

MANUELO

Bone ci pensis!

ALBERTO

Junulo, ci jam tion komprenos, arton kaj vivon mi devas kunfratigi, kaj pro tio mi pentras drinkejojn. Unue mi satigas la okulojn, kaj poste mi kontentigas la stomakon.

MANUELO

Ĉiam ci estos filozofol!

ALBERTO

Se tia mi ne estus, tiam la mizero devigus min esti tia.  
Tial pli taŭgas esti propavole ĝi: kaj **ci**, el kie ci venas?

MANUELO

Se mi devas diri al ci la veron, mi ne scias tion. Promeni. Mi vagadis tra la stratoj. De kiam mi sendis la pentraĵon, mi ne povas trankviliĝi. Mi pasas antaŭ la ekspozicio, mi haltas antaŭ la facado kaj diras al mi mem: Baldaŭ la pordoj malfermiĝos kaj larĝe malfermiĝos same tiuj de preĝejo, kaj ĉiuj admiros cian verkon, kaj cian nomon, kiun nun neniu konas, la popolamaso elsilabos, kaj fine ĝin parkere konos.

ALBERTO

Ci ja estas proviziita je iluzioj!

MANUELO

El kio, do, ni vivus la pentristoj, se ne el iluzioj. La afero jen estas, ke neniam mi vidis la mondon tiel bela, kiel de tiam, kiam mia pentraĵo estas tie. Dum la tua tago mi renkontiĝas kun belaj virinoj, mi trovas florplenajn arbojn, personoj kiuj ridas kaj je junulojn, kiuj ĉirkaŭpremas sin unu la alia. Fine karulol! Mi ridas je la printempo! Estas printempo; kiam oni ĝin trovas.

ALBERTO

Sed per kio cin interesas, ke la pentraĵo plaĉos aŭ malplaĉos?

MANUELO

Kiel! La opinio faras la gloron!

ALBERTO

La gloro ne rapidas. Ĝi diras ke oni ne faras ĉefverkojn, ke ili fariĝas tiaj.

MANUELO

Tion mi jam scias, sed lasu min iom fantazii. Ĉu ci ne vidas, kiel mi penadis por tiu pentraĵo? Ke mi kreskigis ĝin, ke mi ĝin kreis; ke mi donis al ĝi, kion mi ne povis, ke mi pruntedonis eĉ mian junecon por ke ĝi fariĝu homo, kaj por montri ĝin! Lasu min iomete esti feliĉa!

ALBERTO

Estu feliĉa, estu, junulo, kaj longe.

MANUELO

Ĉu ci ne kredas ke ci fariĝos fama?

ALBERTO

Ĉu mi? Mi jam kredas tion. Sed mi ne rapidas pri tio. Duono da vivo pli aŭ malpli, ne estas grava afero por mi. Mi ankaŭ provis sendi pentraĵojn, sed kiam mi estis tre juna.

MANUELO

Ĉu maljuna, nun ci estas?

ALBERTO

Mi estas tridek jara, sed mi havas dudeknaŭ jarojn da spertado. Kiam mi sendis pentraĵojn en la tempo kiam mi estis lernanto, mi ĉiam petis por ili biletojn de iro kaj reveno, kaj mi estis prava, ĉar ĉiam oni resendis ilin al mi.

MANUELO

Kaj kial?

ALBERTO

Ĉar ili ne estis ĝustatempaj. Mi ĉiam faris ĉu fruan aŭ malfruan pentraĵon. (*Manuelo ekridegas*). Nur, iam, unu oni akceptis al mi, kaj tio estis ankoraŭ pro senatento.

MANUELO

Kaj kion ĝi reprezentis?

ALBERTO

Marpentraĵon. Marpenraĵon... komercan. Kiam oni malfermis la ekspozicion, tiam mi serĉis dum tri tagoj, ve al ĝi jen ĝi estis forgesita en angulo!

MANUELO

Surtere?

ALBERTO

Sur tero, kaj plena je araneaĵo. Feliĉe oni trovis najlon, nur unu najlon, tie supre apud trabo; alie oni ne estus farinta al ĝi eĉ la plej humilan honoron, kiun pentraĵo povas aspiri, t. e. pendigiĝi, kvazaŭ mortiginto! (*Ekridado de Manuelo*). Ne ridu, ne, ĉar momente mi preskaŭ verŝis oleajn larmoj, kvankam mi ne devus diri tion; sed poste mi ĉiam pensis ke la gloro estas tre alta, kaj ke mi havis filon tie.

MANUELO

Dio, konservu cian gajecon!

ALBERTO (*kun emfazo*)

La resignacion, ĉi entencas diri. Se la indeco, kiun ĉiu artisto devas havi, ne estus al mi malhelpinta, ĉu ĉi scias, kion mi intencis fari?

MANUELO

Kion mi scias?

ALBERTO (*resignacie*)

Almozpeti apud la pordo.

MANUELO

Kompatinda Alberto!

ALBERTO

Ne, amiko ne. Ne kompatu min, ĉar tio ne estas grava afero. La ŝanco, kiel la putsiteloj supreniras kaj malsupreniras. Aŭskultu, la sekvantan tagon post tiu elreviĝo pro dek centimetroj mi ne vendis la pentraĵon!

MANUELO

Kion ci diras! Kiom da mono oni proponis al ci?

ALBERTO

Nenion. Estas pro dek centimetroj nur, kial mi ne ĝin vendis, ĉar oni aĉetis tiun, kiu kuŝis apud malsupre de la mia.

MANUELO

Bone. ĉio okazos. Ne malkuraĝigu.

ALBERTO

Ĉu ci volas kuraĝigi min? Ĉu mi jam ne rakontis al ci miajn artistajn teoriojn? Ĉu ci ne scias, ke mi ne deziras esti generalo de l'arto, sed nur plej malalta soldato? Mi scias, ke mi nenian ion faros. Certe, tion mi jam scias; sed mi ŝatas pli pentri, kaj ne vivi ol fari, kion ĉiuj nomas vivadi! Ke mi ne povas fari pli al mi nun faras! Nu, mi faros malpli, kaj ĉiam antaŭen! Ĉu ne estas kiu vivas per panmolaĵoj? Nu, mi vivos per pentrafmolaĵoj!

MANUELO

La mizero, ankaŭ al mi ne timigas, kaj se mi estas kontenta kiel mi estas, tio estas ĉar mi memoras ke mi havaŝ patrinon, ke mi scias ke ŝi estas maljuna, ke ŝi loĝas tie apud la bakejo ĉiam rigardante tien, kie mi estas, kaj ke mi ne deziras la estonta gloro por mi: mi deziras ĝin por ŝi!

ALBERTO

Sed dume, ci ne skribas al ŝi!

MANUELO

Kion mi devas skribi al ŝi? Malĝojojn? Je la komenco de nia kunvivado, ci jam scias, ke ŝi sendis al mi monon; sed kiel mi povis akcepti monon de ŝi, kiun mi bone scias, ŝi eltiris el ŝia nutraĵo? Nun, ŝi kredas, ke mi bezonas nenion. Nu, ke ŝi sekvu tiel pensante!

ALBERTO

Kompatinda virino!

MANUELO

Kaj ci ja scias, ĉu ni nenion bezonas!

ALBERTO

Bedaŭrinde, mi tion scias!

MANUELO

Ni ŝuldas la ĉambran luigon. Ni ĉion ŝuldas! Mi eĉ la tolon, kaj la kadron de la pentraĵo mi ŝuldas! Kaj mi pli preferis silenti, ol esti devigata, mensogojn diri al ŝi. Ĉu ci ne opinias, ke mi bone agis?

ALBERTO

Ci agis bone, sed tio ne taŭgos. Oni ne trompas la patrinon. Kiam ili ion ne scias, tiam ili divenas ĉion: certe pli da larmoj ŝi verŝis, ol literoj ci ne skribis al ŝi.

MANUELO

Sed la larmoj de tiuj, kiuj estas patrinon, oni viŝas per ĉirkaŭpremo.

ALBERTO

Ci estas prova dirante tion, kaj pro tio mi ne volas familion. De la tempo kiam la miaj mortis, mi forpelis la kortuŝojn kaj la koriŝklinojn! Familio estas monda lukso malpermesata por ermito.

MANUELO

Ŝajnas al mi, ke mi rilate al luksoj...

ALBERTO

Ci? Ci havas la plej grandan lukson, kiun pentristo povas permesi al si. Ci havas la lukson ami. Ci amas la vilaĝon, cian familion, ci freneziĝas pro amo al la modelulino, ĉu ci pli da malordo deziras?

MANUELO

Jes, tio ĉi estas certa, kaj hodiaŭ pli ol iam, ĉar mi atendas! Kiam mi eksentas internan gajecon, tiam ŝajnas, ke mia brusto disvastiĝas, kaj ke ĉiuj povus enteni en ĝi!

ALBERTO

Kaj ne restas en ĝi loko por la Arto?

MANUELO

La ĉefa salono restas en ĝi, por la Arto?

ALBERTO

Nu, tio ne estas ebla. La Arto ne akceptas havi *serajlon* ne eĉ por la plej puraj korinklinoj. Ĉu ci kredas, ke ne estas deca afero por tio, kion mi havas, kaj kion oni nomas koro, eliri por rigardi tiujn ĉi okulojn, kaj restadi mirigita, farinte tion; kaj nun tiun ĉi buŝon... kaj ĝin kisi, kaj poste tiujn lipojn, kaj, ni rekomencu? Sed, karulo, enamiĝinto kaj pentristo samtempe ne estas ebla... Ili estas tro da metioj por homo. Se ci edziĝas, ci ofendas la Arton, kaj se ci mortiĝas, ci lasas vidvinon devigante ŝin, ke funebre je muŝflugilkoloro (1) sin vestu.

MANUELO

Lasu min fari. Mi estas juna. Mi kuraĝas kaj nenio timigas min... Ne, eĉ la malfeliĉo!

ALBERTO

Ci bone parolist

MANUELO

Mi havas la pentraĵon en la ekspozicio, kaj mi havas bolbruaajn ideojn, kiujn ci vidos kiam ili eksplodos. (*Oni sonorigas*).

ALBERTO

Kaj jen kredeble cia Juljino kiu alvenas. Ni jam vidos, ĉu estos ŝi, kiu ŝanĝos cin.

MANUELO

Ci jam scias ke la realeco ne tentas min.

---

(1) La aŭtoro rilatas la malriĉajn vidvinojn, kiuj ne povas renovigi la vestojn, kaj pro tio, post kelka tempo la nigra koloro fariĝas verda, same kiel la flugiloj de la muŝoj.



ALBERTO

Nu, agu kiel ci intencos, kaj... nu, mi salutas ŝin! Ĉi iru malfermi la pordon, ĉar mi ne deziras malhelpi cin! Dum vi faros la kolombidon, mi eniras por ekprepari la nutraĵojn, ĉar mia *modelo* elvekis mian apetiton.

## SCENO II.<sup>a</sup>

MANUELO, ISABELO KAJ SINJORINO AMPARO

ISABELO

Ho! Manuelo. Mi jam scias, ke ni ne devas labori sed tio ne malhelpas. Mi alvenas por vidi cin! Mi multe deziris vidi cin.

MANUELO

Ĝustatempe ci alvenas, ĉar se ci ne estus alveninte, tiam mi estus irinta trovi cin.

ISABELO

Ĉu okazas ia malbona afero?

MANUELO

Male! Ĉio bone marŝadas. Mi deziris venigi cin, ĉar mi devas fari donacon al ci.

ISABELO (*kontenta*)

Kio ĝi estas?

MANUELO

Ĝi estas gajeco! Ĝajeco, kiun mia animo ne povas enteni, kaj per kiu mi volas infekti cin!

ISABELO (*ridante*)

Ĉu nur tion ĉi? Ĉu ci ne scias, ke la gajeco malmankas al mi?

SINJORINO AMPARO (*enirante lacigita*)

Kia ŝtuparo! Pro filino nur oni povas supreniri tien ĉi!

MANUELO

Sed, virino, kial vi venis?

SINJORINO AMPARO

Unue pro devo. Ĉiam, kiam tio estas ebla al mi, mi ne deziras ke la knabino iru sola, kaj poste, ĉar, estas por mi la sama sidi tie ĉi aŭ ĉe mi.

MANUELO

Ĉu vi timas perdi la knabinon?

SINJORINO AMPARO

Mi timas nenion rilate al ŝi, kaj mi. Mi edukis ŝin per bonaj konsiloj, sed mi zorgas pri tio, kion oni povus diri Ni, kiuj edukas saĝajn filinojn, devas multe atenti pri la mondo.

ISABELO

Ŝajnas al mi, ke mi jam povas iri sola.

SINJORINO AMPARO

Ci povas iri, kaj ci iras sed, estas malbone ke ci iru. Ĉu ne estas mia devo resti apud ci? Nu, se mi ne faras tion, mi ne plenumas mian devon.

MANUELO

Bone, apudestu la seĝegon. Tie ĉi je via sidejo, sinjorino Amparo. (*Ŝi sidiĝas*).

ISABELO

Kaj dormu iomete, se vi volas, sed precipe ne grumblul

SINJORINO AMPARO

Mi estas feliĉa povi dormi tiel! Dum mi dormas mi ne pripensadas.

MANUELO

Sed, kion vi devas pripensadi?

SINJORINO AMPARO

Kion, ci diras? Ĉu mi ne devas pripensadi ke, mi, la sinjorino Amparo, la vidvino de kapitano de ĝendarmoj devas akompani la filinon?, kaj kien? Por ke ŝi utilu kiel *modelo*?

MANUELO

Ĉu ne estas inde utili kiel *modelo*?

SINJORINO AMPARO

Jes aŭ ne. Mi ne scias tion, sed mi ne edukis la knabinon por tio. De tiam, kiam ŝia patro mortis, kiel malmulte da rento ni havas, mi devigis ŝin iri al la konservatorio.....

ISABELO

Mil fojojn vi jam rakontis tion al ni.

SINJORINO AMPARO

Nu, mi deziras de nove rakonti ĝin. Mi devigis ŝin iri al la konservatorio, kaj ci jam vidas por kio tio taŭgis! Ŝi lernis iomete ludi fortepianon, kaj post kelkaj jaroj ŝi estus fariginta profesorino! Ŝi lernis kanti, kaj ŝi estus fariginta kontraŭto; sed ĉar mi maljuniĝis, kiam la juneco finiĝis, tiam ankaŭ finiĝis la kantoj.

ISABELO

Bone, sufiĉe!

SINJORINO AMPARO (*ekdormigante*)

Dum mi ne havis tiun ĉi dormemon, kiun mi jam scias ne estas natura, kie la mono ne sufiĉis, tie sufiĉis mia klopodo...

MANUELO (*al Isabelo ne aŭskultante tion, kion diras sinjorino Amparo*)

Kial ci ne venis hieraŭ vespere?

ISABELO

Sed, ĉu ci kredas, ke mi povas veni ĉiuhore?

SINJORINO AMPARO

Kaj poste, ĉar mi ne taŭgis por kudri, nek por esti ofi-  
cistino...

MANUELO (*irante kisi Isabelon*)

Ĉu ci pensis pri mi?

ISABELO (*malproksimiĝante*)

Atentu, ke ŝi ankoraŭ ne dormas.

SINJORINO AMPARO (*ekdormiĝante*)

La pentristoj diris, ke ŝi taŭgas... kaj poste ni cin ren-  
kontis... kaj jen ni estas... Mizero... kaj mizerol... (*Ŝi dor-  
miĝas*).

MANUELO

Kaj bonan nokton! Ŝi jam ekdormiĝis!

ISABELO

Kiel multe ŝi jam dormis ekster nia domo. Kompatinda  
virino! Estas momentoj, kiam mi eĉ kompatas ŝin.

MANUELO

Ci amas ŝin, ĉu ne vere?

ISABELO

Komprenable. Ŝi estas mia patfino.

MANUELO

Ĉu ci amas pli ŝin, ol min?

ISABELO

Kia demando! Se mi demandis cin pri tio, kion ci di-  
rus? Nu, respondu!

MANUELO

Mi dirus... ke mi amas cin ambaŭ.

ISABELO

Do, mi nel Mi preferas ne respondi!

MANUELO

Kial?

ISABELO

Ĉar mi devus pripensi, kaj mi ne amas enŭiĝi, ĉu mi ne amas cin? Do, lasu la ceteron!

MANUELO

Pardonu, se ci ofendiĝis!

ISABELO (*post ekridego*).

Nu, serioze ne parolu, ĉar ci scias ke ci, serioza, ne plaĉas al mi. Mi enamigis je ci, ĉar ci ridis, kaj ridante ci montris la okulojn, okuloj... nu pri tio ni ne parolu! Bone, ridu! Estas tagoj en kiuj sen mi, ci ŝajnus malgaja sanktofiguro!

MANUELO

Ĉu ankaŭ hodiaŭ?

ISABELO

Hodiaŭ ne tiel multe. Hodiaŭ oni vidas, ke ci estas kontenta.

MANUELO

Ĉar hodiaŭ mi atendas la ŝancon!

ISABELO

Kaj, el kie ĝi devas alveni al ni, ĉu el la pentraĵo?

MANUELO

Kompreneble.

ISABELO

De tiu pentraĵo pri kiu Alberto kaj la *martiraj* amikoj, predikas, ke ĝi estas ĉefverko?

MANUELO

Estas klare.

ISABELO

Ha! Mi ne estas kompetenta pri tio, sed ŝajnas al mi, ke ci ne gajnos monon.

MANUELO

Ne pensu pri la mono.

ISABELO (*ridante*).

Pri kio do, ci deziras ke mi pensu, pri la arto?

MANUELO

Silentu, virino!

ISABELO (*ekridegante*).

Pri la arto!

MANUELO

Isabelo!

ISABELO

Pardonu min, amiko, pardonu min, ĉar mi jam plu ne ŝercos pri cia amatino!

MANUELO

Sed, kion ci diras?

ISABELO

Pri cia... amatino! Ĉu ci pensas ke mi ne, scias ke kiam mi estas sur la pargeto, kaj ci devigas min, montri nur la blankaĵon de miaj okuloj, ĝi estas por ke mi ne vidu, ke ci eĉ ne rigardas min, ke ci rigardas la alian, la Idealon?

MANUELO

Isabelo, ne diru tion. Ci ne scias, kiel estas kunigitaj tiuj ĉi du vidpunktoj, l' Idealo kaj ci! Sen uhu ci ne estus virino, kaj sen la alia tiu, kiun mi revis. De la vilaĝo mi vidis cin, kiel ci estas, tia kia ci estas, kaj tiel, kiel mi deziras, ke ci estu: kaj ĝi devenas el tio ke, kiam mi rigardis cin, cin ne vidante, tiam mi jam vidis virinon, kiel ci, estanta spirito, sed kun vivo!

ISABELO (*ridegante*)

Virino kun flugiloj... ĉu ne vere?

MANUELO

Virino... ne estanta tial

ISABELO

Bone, ci jam denove fantazias!

MANUELO

Virino, mi parolas serioze!

ISABELO

Ĉu ci deziras, ke ankaŭ mi serioze parolu?

MANUELO

Ci ne scias!

ISABELO

Sufiĉe ci jam min instruas!

MANUELO

Diru.

ISABELO

Nu, serioze parolante: Sciu pentristo, ke el tio ĉi, kion ci nomas glori-laŭro, aŭ famo, aŭ nomo, aŭ tio, kion ci deziru nomi, ci ĝin havos: mi estas certa, ke ci ĝin havos: sed ju pli ci atingu tion, des pli mi perdos... Ju pli pentra-

Ĵojn ci pentros despli per ili ci fariĝos homo, kaj ĵupli mi utilos kiel *modelo* despli, ankaŭ mi fariĝos virino; sed same ne estas fariĝi homo aŭ virino: ĉar dum unu supreniras, la alia malsupreniras!

MANUELO

La feliĉeco estas ĉiam suprel

ISABELO

Mi ne scias kiel mi aŭskultas cin! Eĉ mi multafoje pensis, ke esti malriĉa plezurigas cin!... kaj, ke mi estu tia pro cia kulpol... ke ci havas la malmodestecon esti konsiderata kiel mizerulo!... la vanteco, mi ĵuras tion! la vanteco vesti cin per ŝiritaj vestaĵoj!

MANUELO

Kial ci diras tion al mi?

ISABELO

Ĉar ci povus vendi pentraĵojn, kaj ci ne faras tion; ci povus pentri agrablajn aferojn, kaj ci ne ĝin faras, kaj ĉar ci ŝatas agi kiel ci intencas, nur por la plezuro agi male!

MANUELO

Sed...

ISABELO

Ne, mi jam scias, kion ci diros al mi! Ke sendependa ci devas esti... Precipe tio: sendependa! Ni enmetos sendependencon en la kuirpoto!

MANUELO

Certe mi estas tial Ĝi estas mia dotaĵo, kaj de ĉiuj kiuj estas artistoj! Pli bone estas fali pro mizero, ol balanciĝi pro honto!

ISABELO

Belega! Ĉio, kion ci diras, estas belega! Se mi tiel pensus, kiu scias kie mi estus?



MANUELO

Nu, Isabelo, nenion pli, ni parolu pri tio. Ĉu ci ne amas min, kiel mi estas?

ISABELO

Silentu, ĉar multe mi devas cin ami por cin sekvi, ki el mi faras! Mi amas cin ĉar... tiamaniere ĝi estas; sed mi eĉ furiozas, pro tio, ke mi cin amas vidante cin tiel... mi ne scias kiel tion diril Mi eĉ kredas, ke multfoje ci drinkigis min per vortoj!

MANUELO

Ne: mi donis amon al ci, kiel trinkaĵon! Ĉu ci ne trinkas kun plezuro en miaj lipoj?

ISABELO

Ĉu ci jam tion ne scias?

MANUELO

Do, lasu, ke mi fantaziu, ĉar hodiaŭ estas taŭge por tiol Lasu min fantazii por ci, kaj kun ci Isabelol Ci obstiniĝas esti nur virino, kaj ci multe pli estas por mi ol virino. Ci estos la pentraĵo kiun mi serĉas, la spirito de la pentraĵo ci estos! Spirito ĉirkaŭita per koloroj, heleco, harmonioj kaj vivo, kaj ci estos la virino, kaj la bildo ci estos! Ĉio, ci estos sur la tolo. Kiel lipoj ĉirkaŭitaj de animo por tie kisi, kaj preĝil (*Isabelo ridas*). Kial ci ridas?

ISABELO

Ĉar ci amas min revante, kaj mi amas cin... ridante! Ĉiu amas siamaniere.

---

### SCENO III.<sup>a</sup>

LA SAMAJ KAJ ALBERTO

ALBERTO (*enirante kun granda kuirpoto*).

Bone, ĉu vi jam sufiĉe kantis? Nu, nun alvenas la materion!

MANUELO

Kion ci alportas en tiu ĉi kuirpoto?

ALBERTO

Paston hidraŭlikan!

MANUELO

Kion ci volas diri?

ALBERTO

Kuirpoton kun terpomoj, kiujn mi boligis. Ni havas nian vivon asekurita dum ok tagoj, kio estas jam multe asekuril (*Li eltiras tri aŭ kvar telerojn el ŝranko, kaj ilin lokas sur la tablon*). Rapidigu! Kiu deziras manĝi, tiu levu la fingron!

SINJORINO AMPARO (*ekvekigante*).

Kio estas tiu ĉi odoro?

ALBERTO

Ke alvenis manĝaĵoj, sinjorino Amparo! Ĉu vi klare vidas, kio estas la vivo? Dum vi fantaziis, ŝi dormis, ŝi flaras la realecon, kaj ŝi ekvekigas! Ĉerte telereton da ili vi manĝos!

SINJORINO AMPARO (*alproksimigante al la tablo*)

Ha! En tiu ĉi horo mi ne povus...

ALBERTO

Bone, virino, iomete, kaj denove vi povos ekformil

SINJORINO AMPARO (*sidigante apud la tablon*).

Nu, nur por ilin gustumi.

ALBERTO

Prenu! La hidraŭlika pasto malvarmigas. Kaj ĉu ci ne ĝin deziras?

ISABELO

Mi ne.

MANUELO

Mi ankaŭ ne.

ALBERTO

Estas vero, ke ci vivas per iluzioj.

MANUELO

Hodiaŭ jes.

ALBERTO

Nu, ni toastu por la iluzioj!

MANUELO

Ĉu ni devas toasti per terpomoj?

ALBERTO

Kaj per kio? La toastoj ne konsistas el tiu per kio oni toastas, sed por tio, al kio oni toastas! (*Toastante per la telero*). Mi trinkas por ke cia fama pentraĵo povu doni al ci hidraŭlikan paston, sed gloran paston!

SINJORO AMPARO

Kaj monon!

ISABELO

Kaj amon!

MANUELO

Kaj fidon!

ALBERTO

Tio estas! Vivu la idealo... kun terpomoj!

---

## SCENO IV.<sup>a</sup>

LA SAMAJ, SINJORO KARMONA, KAJ SINJORO TRILLES

SINJORO KARMONA

Ĉu oni povas eniri?

ALBERTO

Antaŭen!

SINJORO TRILLES

Dio gardu cin!

MANUELO

Kiel! Ĉu estas vi?

SINJORO KARMONA

Junuloj, vi loĝas tre alte!

ALBERTO

Samnivele, kiel kolombejo.

MANUELO

Rigardu, vi trovas nin manĝetantajn.

ALBERTO

Se vi deziras manĝi, senceremonie. Ni havas nutraĵon por dekkvin tagoj. Terpomoj je la kremo kun tatara saŭco!

SINJORO KARMONA

Jes, mi ekvidas ke ci diboĉetas!

ALBERTO

Sidiĝu, ĉar ankoraŭ estas seĝoj. (*Ili sidiĝas.*)

MANUELO

Kio okazas? Al kio ni ŝuldas tian honoron?

SINJORO TRILLES

Tion, ci jam vidis!

SINJORO KARMONA

Ci jam scias, ke ĉiam, kiam mi povas, mi venas por cin vidi. De longe mi amas Alberto'n, kaj ankaŭ cin, eĉ se ci dezirus al mi malbonon. Nenio estas tiel taŭga por tiuj, kiuj komencas maljuniĝi, kiel viziti la junulojn. Tio estas nervaj ekvekigoj.

SINJORO TRILLES

La juneco kuraĝigas.

SINJORO KARMONA

Sed, hodiaŭ mi venas devigita. Devigita, pro devo, kaj eĉ por trankvileco. Mi venas... por doni al ci novaĵon, kiun mi kredas esti devigata doni al ci antaŭ ol, ci ekscios ĝin per la aliaj. Kaj kredu, ke mi tutkore bedaŭras, esti devigita ĝin alporti.

MANUELO

Diru. Kion vi intencas diri?

SINJORO KARMONA

Ci jam scias, ke mi estas el la juĝantaro. Ofico kiun mi perforte akceptis, kaj estus plaĉinte al ĉielo, ke mi ne estus akceptinta ĝin.

MANUELO

Mi ĝin scias! Diru!

SINJORO KARMONA

Nu... neniol! Ke miaj juĝantaraj amikoj, aŭ malamikoj, batalinte kontraŭ mi dum tri horoj, post malhonsentado, kaj furioziĝado, nu... ili ĵus malakceptis cian pentraĵon!

MANUELO

Kion vi diras!... La pentraĵon!... Vi diras, mian pentraĵon?

ALBERTO

Ne estas eble!

SINJORO KARMONA

Ne estis eble, sed estas.

SINJORO TRILLES

Mallerteco, jen ĉiel!

MANUELO

Sed, ĉu vi certe scias tion?... kaj ĉu tio estas ebla?... La pentraĵo! Ĉu ili rifuzis mian pentraĵon?

## SINJORO KARMONA

Mi protestis, diskutis, ekkriis, mi defendis ĝin kiel filon mian, sed la voĉdonoj, voĉdonoj estas, kaj ili estas pli nombraj! Ni voĉdonis, kaj... nenio! ili atingis la plimulton!

## MANUELO

Sed... se tio ne estas ebla! Se ne estas ebla!

## SINJORO TRILLES

Kvietecon!

SINJORINO AMPARO (*al Isabelo*)

Ĉu ci vidas? Ĉu ci vidas, kion mi diris al ci?

## MANUELO

Sed, ĉu ili ne scias, ke la pentraĵo, mia pentraĵo estas pli ol mia vivo, multe pli ol mia vivo, kaj ke per ĝi ili savas min aŭ min pereigas? Ĉu ili ne vidas, ke ili mortigas min, kaj ke ili piedpremas mian estontecon, kaj mian koron ili elsiras dispecete?... Patrino! Patrino!

## SINJORO KARMONA

Nu, amiko, ne estu infano!

## MANUELO

Sed diru al mi, almenaŭ diru al mi, kion ili rimarkis, kion ili povas esti trovintaj por ne akcepti ĝin!

## SINJORO KARMONA

Ili trovas, kvankam tion ĉi ili ne diris, ke ci havas grandan talenton, eĉ genion malbone *kulturitan*, sed ke ci faras pentraĵojn... tiel... propajn, tiel personajn, tiel malsamajn de ĉiuj aliaj, ke la kvalitojn, kiujn ĝi enhavas, intimajn, nur admiras la malmultaj kiuj ilin vidas, sed ke tiuj, kiuj nenion scias vidi inter la koloroj... tiuj ridas! Ili timas, ke oni ridus pri la pentraĵo. Ci jam tion scias.

## MANUELO

Kiu?

## SINJORO KARMONA

La pli multo. Ĉiuj!

ALBERTO

La malsaĝuloj!

SINJORO KARMONA

La malsaĝuloj, kiuj estas la pli multnombraj!

MANUELO (*ekscitigante*).

Sed, ĉu tiuj ĉi sinjoroj de la juĝantaro neniam estis junaj? Ĉu ili ne volas rememori, ke ankaŭ ili bataladis, kaj suferis? Ĉu la Arto ekdormigis iliajn sentojn austataŭ ilin ekvekigi?

SINJORO KARMONA

Ĝi estas vero.

MANUELO (*ekscitiginta*).

Ĉu ili ankaŭ vendas po decimetroj, kiel teron por komerci, tiun ĉi anguleton, kiun ni petas por tien pendi nian *exvoto*—jes, mi jam rememoras, mia *exvoto*!—kaj ili deziras ŝanĝi nian templon je kompatema salono?

SINJORO KARMONA

Ci estas prava! Ci estas tute prava!

SINJORO TRILLES

Tute prava!

MANUELO

Do, kial ili forpelas min de tien, ĉu, kiel malbona?

SINJORO KARMONA

Ne.

MANUELO

Kiel malsprita?

SINJORO KARMONA

Ankaŭ ne.

MANUELO

Ĉu, ĉar mi estas novulo?

## SINJORO KARMONA

Jes, pro tio. Nun ci tion diris, ĉar ci estas novulo.

## MANUELO

Ĉiela Dio! Sed, ĉu tiuj ĉi homoj, pensas ke ili povas ligi la pensadon? Ĉu ili ne vidas ke malgraŭ ke ili ĵetos la pentraĵojn, ili ne ĵetos la artististojn? Ĉu ili ne vidas ke se ili ventumus la cindrojn de la ideoj, kiujn ilin malhelpas, la cindroj sufokus ilin? Ĉu ili estas spiritaj bastardoj, aŭ mallongvidaj aŭ malriĉanimaj aŭ sensentaj tiuj ĉi rutinaj kolonegoj?

## SINJORO KARMONA

Trankviliĝu, junulo, trankviliĝu. Oni jam scias ke tio estas ĉeno.

## MANUELO

La ĉeno de la malsprituloj, kiu ilin subtenas, por ke ili ne falu!

## SINJORO TRILLES

Per la ĵurnalo mi defendos cin ĝis, kie la ĵurnalo permesos.

## MANUELO

Nel Mi ne volas, ke vi defendu min! Mi estus dezirinta defendi min mem! Jes, mi! Mi tiam estus dirinta al la ĵuĝantaro, al tiuj ĉi ŝveligaj anonimoj, ke li povas eltiri la pentraĵon, feti ĝin, ĝin doni por paŝtigi sian ŝafaron, sed ke, kiu bonulo ne estas, tiu ne estas artisto; mi estus dirinta al ili, ke ekzekutistoj ili estas, jes!, ekzekutistoj de tiuj, kiuj havas fidon; ke ili ne estas la masjtroj de tiuj, kiuj sentas la belecon, sed nur jonglistoj de tiuj, kiuj pagas; ke se mankas al ili loko por loĝigi la vantecon, ili iru al la reĝaj palacoj, kaj ili lasu anguleton por la malriĉaj! (*irante plori en anguleton*) kaj mi estus dirinta al ili, ke la mizero estas pli granda, kiam la malĝusteco alportas ĝin!

SINJORO KARMONA (*irante lin trovi*)

Nu, junulo, trankviliĝu, kaj ordiĝu! Jam, mi diris al ci, ke la vivo de la pentristo estas pli maldolĉa ol ci kredis. Mi jam diris al ci, ke la malgranda peceto da famo, kiun



oni donus al ci, ja multe penigus cin. Ci estas romantika —ankaŭ mi diris al ci tion—, sed ci havas talenton. Krom tio, kion ci pentras, ci povas samtempe fari pentraĵojn ne tiel puritenan.

MANUELO

Ne laciĝu, mi jam vidas kien vi celas!

SINJORO KARMONA

Lasu min diri, kaj poste ci decidus. Mi konis cian patri-non, mi konas cian situacion, kaj mi scias ke ci ne povas vivi, kiel ci vivas. Mi por plibonigi cian sorton, metas je mia flanko ĉiujn rimedojn, kiuj estas eblaj al mi; ci faru ian konsenton, kaj poste ci dankos min pro tio. Mi havas vendiston, la mian, kiu aĉetos ĉiujn ciajn pentraĵojn, ĉar mi faros ke li aĉetu ilin, kaj eĉ donos al ci antaŭmonon, sed... ci devas kontentigi lin, kaj pentri tion, kion oni postulas de li.

MANUELO

Neniam!

SINJORO KARMONA

Mi jam atendis tion; sed mi devas rememorigi cin, ke ci estas malriĉa.

MANUELO

Neniam, mi diras!

SINJORO KARMONA

Ke ci havas devojn pri cia hejmo!

ISABELO

Jes amiko, faru gin! Kial ne?

MANUELO

Neniam, mi rediras!

ALBERTO

Tre bone!

## SINJORO KARMONA

Mi ne kredas ke estas ia malbonaĵo honeste perlabori al si la vivon.

## MANUELO

Ne estas malhonoro. Mi jam scias, ke ĝi ne estas tio, sed ne turmentu min, ĉar estas senutile. Mi havas teoriojn, kiuj eble estas fantaziaj, kaj se vere ili estas tiaj, ne devigu min faligi ilin, ĉar tuje estus al mi neeble. Ne kredu min sendanka, ĉar mi ne estas tia. Mi estas revema, mi tion akceptas, sed mi ankoraŭ ne transpasis la landlimojn de la vivaj elreviĝoj. Eble pli malfrue, mi ilin transpasos, sed mi deziras defendi min dum mi povos.

## SINJORO KARMONA

Mi komprenas cian ekscitiĝon; sed se iam ci trovos cin en premiteco, ci jam scias, ke mi povas doni laboron al ci.

## MANUELO

Dankon.

## SINJORO KARMONA

Se ci finos fantazii, kaj despli bone se ci ne finos, mi povos doni al ci tion, kio vivigas. Laboro... el tiu, kiu vivigas! Ĉu ni foriros Trilles?

## SINJORO TRILLES

Ni foriru. Kaj kuraĝon, do, ĉar por tio, ci estas junal

SINJORINO AMPARO (*al Sinjoro Karmona*)

Mi ankaŭ iros kun vi. Mi devas paroli al vi pri la knabino.

## SINJORO KARMONA

Nu, bonan vesperon al ĉiuj, (*premante la manon de Manuelo*) kaj adiaŭ!

MANUELO (*donante al li la manon*)

Mi dankas. (*Manuelo promenas ekscilita*).

ISABELO (*alproksimigante al li*).

Manuelo, kial ci ne faras tion, kion oni diras al ci?

MANUELO

Cil Ankaŭ cil

ISABELO

Nature, mi ankaŭ! Kiun malbonon ili proponas al ci, nu, diru? Bone vivi! ke ci fariĝu homo!

ALBERTO

Manuelo, ci tre bone agis.

ISABELO

Nu, li agis tre malbone. Ĉiu, kiu amas lin diros, ke li devas akcepti tion, kion oni diras al li. Nu, pro kio li ne akceptos tion?

MANUELO

Kion mi diros al ci, se ci ne komprenus!

ALBERTO

Certe ne!

ISABELO

Pli ol vi ĉiuj, mi komprenas tion. Vi scias ke neniam mi plendas, ke mi neniam plendis, eĉ estante prava; sed jam ne estas eble sekvi cin en tiun kalvarion, kiam ci mem serĉas la malĝojojn.

MANUELO

Kion ci volas diri?

ISABELO

Mi volas diri... Nenion mi volas diri.

MANUELO

Ke ci jam laciĝas, ĉu ne vere?

ISABELO

Mi ne scias. Divenu ĝin!

MANUELO

Ke... ke ci eĉ forlasus min!

ISABELO

Ci estas, kiu lasos min! Ci pensas nur pri ci: pri cia arto...

ALBERTO (*forirante tra la pordeto*)

Estas neniu, kiu povu suferi tion!

ISABELO

...pri ciaj pentrojoj, pri cia vojo! pri cia ambicio de gloro, kiu fariĝas egoismo.

MANUELO

Nel! Ne estas ebla! Ne nomu min egoista!

ISABELO

Nu, pruvu, ke ci ne estas tia, kontraŭe...

MANUELO

Ne! Ne finu la frazon! Ne lasu min sola! Je Dio! ne lasu min! Mi tion petas de ci! Je mia savado! Mi petas tion de ci...!

ISABELO

Mi havas motivojn, kiujn ci ne komprenas! Oni ja ne vivas per la ĉiela aero! Ĉiuj forlasos cin! Sekvante ciajn maniojn, ci trovos neniun kiu helpos al ci.

Rozo (*ekkriigante el ekstere*).

Knabol...

MANUELO (*kvaŝaŭ li revus*)

Ĉu ci ne aŭdas? Ĉu ci ne aŭdas tion? Ĉu mi songas?

Rozo (*enirante*)

Knabol

MANUELO (*kvaŝaŭ ekvekiĝante*)

Mi ne songas, nel Estas mia patrino! (*Rozo eniras, kaj ĉirkaŭpremas Manuelon. Isabelo post unu momento rigardos Rozo'n, kaj ŝi eniros la ĉambreton de la fundo.*)

## SCENO V.<sup>a</sup>

MANUELO *kaj* Rozo

Rozo

Knabo! Filo mia!...

MANUELO

Ĉu vi patrino? Ĉu estas vi?

Rozo

Mi mem!

MANUELO

Sed, kio okazis? Kio... okazis?

Rozo

Kaj kio ci volas, ke okazu? Nenio okazas! Sed mi korprenigis, kaj mi havis dezirojn vidi cin! Ke mi ne povis atendi plu, kaj mi alvenas por ĉirkaŭpremi cin... kaj jen mi estas!

MANUELO

Patrinol

Rozo

Ha! Mi laciĝas!

MANUELO

Sidiĝu, sidiĝu tien ĉi kun mi!

Rozo

Do jes: estas jam de longe ke ci ne skribis al mi, kaj kiam oni ne ricevas leteron, ĉiam oni pensas la plej malbonan aferon. Eble ci ne fartas bone, ĉu okazas io al ci? Kaj kion mi scias! Eĉ mi ekpensis ke ci forĝesis min!

MANUELO,

Ĉu vi povis tion pensi?

Rozo

Ne, filo! Kiel mi povas esti pensinta tiele? Estas nur tio, kion mi diris al ci: ke mi sopiris al ci... kaj nenio plu... ke mi estus mortinta de sopirado, se mi ne estus alveninta vidi cin! Ĉu ci bedaŭras mian alvenon?

MANUELO

Ĉu mi bedaŭras tion, vi demandas min? Se mi estus povinta pensi gajecon tiel grandan, kiel tiun, kiun vi donas al mi, mi ne estus havinta penson por elekti ĝin!

Rozo

Ĉu ci vidas kiel mi bone agis alveninte?

MANUELO

Pli ol vi pensas!

Rozo

Kaj tio, malgraŭ ke ĉiuj, diris al mi, ke mi ne iru al la urbo. «Kien vi iros sola?» oni diris al mi; kaj. «Atentu, ke vi estas tro maljuna» kaj. «Pensu ke vi ne havas fortojn.» jFortojn ili diras! Por veni vidi cin, mi estus eltirintaj ilin el la vivo!

MANUELO

Kaj, kiu diris al vi, ke vi ne venu?

Rozo

Aj, aj! kiu, tion devis diri al mi. Ĉiuj tiuj malsaguloj, kiujn ci jam konas. La spirituloj de la vilaĝo. Precipe sinjoro Johano; eĉ li deziris riproĉi min ĉar... li estis la amiko de cia patro!

MANUELO

Kaj Izidro? Kaj la sinjoro Instruisto? Kaj Bajlet? Kion ili faras?

Rozo

Ĉiuj same kiel, kiam ci estis tie. Ili nek kreskadas, nek maljuniĝas. Ili faris al mi tiom da komisioj por ci, ke mi ne scias, ĉu mi havas sufiĉan memoron... Izidro duone plorante diris al mi, ke kiam ci fariĝos fama pentristo, tiam

li mendas al ci portreton de filo, kiu mortis antaŭ tridek jaroj. Bajlet estas frapita de la suno, kaj blonda kiel pano kiam oni eltiras ĝin el la forno. Kaj la sinjoro instruisto, mi eĉ ne scias, kion li komisiis! Ĉion, kion li diras ĉiutage: ke ci rememoru pri liaj konsiloj, kaj ke ci pentru historian pentraĵojn.

MANUELO

Kompatinda personaro! Kiel bela mi vidas nun tiun vilaĝeton, kiam mi rigardas ĝin de tie ĉi. Ĉiun aferon pri kiu mi ne atentis, nun mi vidas helan, kaj belan, kvazaŭ mi ĝin estus songinta! Mi ĉion vidas, patrino, ĉion! Mi vidas ĝin pli luman, ol ĝi estus antaŭ mi! Mi vidas la kolegojn, kiujn mi ne sekvis, kurantajn antaŭen sur la kamparo, kaj saltantajn bedojn, kun dianto sur la supraĵo de l'orelo, kiel la kokoj portas siajn krestojn, kaj la knabinojn ridantajn ĉe ilia flanko, kiel fonto de gajeco! kaj mi vidas la placon, ĉu vi scias? tiun placon sunigitan, kun tiu preĝa kvieteco, kaj tiujn grisajn kaj mallargajn stratojn, kaj la konatajn vizaĝojn, kaj ĉion, kion tiam mi ne vidis! Patrino, la vilaĝo estas tre bela de malproksime!

Rozo

De malproksime, ci estas prava! Sed la personoj tute ne estas, kiel ci imagas. Estas ankaŭ malbonaj personoj en la vilaĝo! Estas en ĝi, multe pli da ili ol ci kredas.

MANUELO

Kial vi diras tion? Ĉar tio estas la vero! kiom ili suferigis min, mi kiu neniam malbonaĵon faris al tiu ĉi personoj, tiel bonaj... el malproksime! Kaj tiel... mi ne scias, kiel tion diri... elproksime!

MANUELO

Kaj; kion ili diris al vi?

Rozo

Ne deziru scii, kion ili diris al mi ke ci dibociĝis; ke ci suferis multe da mizero; ke ci ne laboris; ke ci estis malsana; ke ci ne dormis; ĉion, kion povus pli suferigi min. Ĉiu virino, kiu venis aĉeti ĉe mi, ŝi forportis panon, kaj pagis al mi per gallo! «Nu, kiam finos sian lernadon la knabo?»

«Nu, kiam li ricevos la ateston? Kiam li estos oficisto de la metio?» «Kiam li finos la ellernadon?» Ili serĉis, ĉion, kio povis vundi min. Ŝajnas ke ili volis puni min, ĉar mi amas cin!

MANUELO

Malnobluloj!

ROZO

Kaj ankoraŭ, kiam ili diris tion, mi ne aŭskultis ilin; tio, kio plej malordigis min estas kiam per kompatata mieno, ŝajnas ke ili volas min kompati! «kompatinda virino!», kaj pli da. «Kompatinda virino!», kaj ili ne scias diri alian aferon! «Kompatinda virino pro kio?—mi respondis—ĉu kompatinda, ĉar mi havas plon, kiu estos saĝulo? kiu tia jam estas? ke en la urbo ĉiuj amas lin? ke ĉiuj laŭdas liajn pentraĵojn? Vi estas la kompatindaj,—mi diris al ili,—ĉar ĉiam vi estos tiaj, kiaj vi estas!» Ĉu ne estas vero tio, kion mi respondas?

MANUELO

Jes, certe.

ROZO

Ĉu mi ne estas prava, kiam mi diras, ke ci faris grandan pentraĵon, kiun oni eumetos en palacon, kaj ke ĉiuj tien iros por vidi ĝin?

MANUELO (*maldolĉe*)

Ne, patrino! Neniu tien iros!

ROZO

Nu, malgraŭ ke neniu irus, mi tien irus! kaj ci akompanus min, ĉu ne vere? Ĉu ci hontigos, tien iri kun mi, malgraŭ ke mi estas vestita duone kampanine?

MANUELO

Estas mi kiu devas hontiĝi!

ROZO

Sed... kio okazas al ci? Mi vidas cin, mi ne scias, kiel! Kial ci respondas al mi tiamaniere?



MANUELO

Ĉu mi? Nenio. Mi estas mi ne scias, kiel ĉar... mi kredas ke vi havas penojn.

Rozo

Ha, malsaĝulo. Ni havas neniam suferon. Ĉio bone funkciadas ĉe ni! Ni havas pli da klientoj, ol neniam! La forno ĉiam bakas! Kaj eĉ ni devis aldoni du bretojn en la vendejo. Tiel, kiel mi diras: du bretojn. Se ci vidus tion! Ŝajnas maig (maig (1)). Ĉu ci rememoras, ke ĉiam ci diris, ke ĉe ni flaris kvazaŭ ĝi estus muelilo, kaj ke oni plezurigis tie spirante? Nu, nun pli ol neniam! Nun... mankas nur unu afero... ke ci ĉeestu tie. Sed mi jam scias, ke ci ne povas esti tie.

MANUELO

Sed mi tie estos! Tie mi estos kiam...! Mi ne scias kiam!

Rozo

Filo mia, okazas al ci, io grava! Mi ne scias kion, sed la koro diras tion al mi, kaj ĝi ne trompas min!

MANUELO

Mi havas nenion. Mi ĵuras al vi, ke mi havas nenion! Mi estas kontenta, kaj mi bonfartas!

Rozo

Kaj ci diras al mi, ke ci havas gajecon? Mi tion ne kvedas.

MANUELO

Gajeco... ne estas tio, kion mi havas. Sed mi vivas kun espero.

Rozo

Filo, ne trompu min! Ne volu trompi min plu! Mi ne-

---

(1) Maig=Majo. Malgranda altareto ornamita per greno semita la Martan monaton, kaj kies verdecio multe ornamas.

niam havis sekretojn por ci! Nu, ci ne deziru havi ilin por mi! Kial ci ne havas tiun rigardon, tiun dolĉan rigardon, kiu plorigis min je gajeco? Kial malaperis tiu saneca koloro, tiu frukta koloro, en cia vizaĝo kaj tiu rido. kiu neniam estingiĝis? Ĉu estas vero tio, kion oni diris al mi, ke la filoj diboĉiĝas en la urboj, kaj ke ili suferas pro malsanoj, kiujn neniam ili havas en la vilaĝoj?

MANUELO (*kaŝante sian vizaĝon kaj plorante*).

Jes, patrino! Jes, tio estas la vero!

ROZO

Ĉu ci ploras?

MANUELO

Mi ne povas plu!

ROZO

Knabol... Filo!...

MANUELO

Patrino!, mi ne povas plu! Mi ne povas plu...! Mi estas tre malfeliĉa. Multe, mi estas tia!...

ROZO

Ĉu ci vidas? Ĉu ci vidas, kiel mi divenis?

MANUELO

Mi vin trompis, kaj mi ne volas trompi vin! Nenio el tio, kion mi diris estas certa! Oni ne akceptas la pentraĵon pri kiu vi parolis! Tiuj, kiujn mi amas volas lasi min! Kaj ne estas tio, kio pli suferigas min! Ĝi estas, ke mi ektimas, ke mi ne havos fortojn por bataladi! kaj eĉ estas momentoj kiam mi perdas tion, kion mi neniam perdis: la esperon!, patrino, la esperon!...

ROZO

Dio, nia Sinjoro, kompatu cin! Ĉu ci havas nur tion ĉi? Mi jam vidas, ke alveninte, mi agis tre bone!

MANUELO

Vi ne scias kiel mi estas! Mi bataladas kontraŭ la neko-

ĥaĝon! kontraŭ la fortoj, kiuj forlasas min! Kontraŭ la febro! Kontraŭ mi, kontraŭ ĉiuj!

Rozo

Nu, sufiĉe, ĉar mi jam scias, kion ci havas! Ci scias, ke mi neniam eraras. Alvenu, tie ĉi venu, petoluleto! Tie ĉi, mi alportas al ci medikamenton, kiun ci bezonas!

MANUELO

Ne estas eble!

Rozo

Knabo, ci vidos, ci tion vidos! Ĉu ci vidas? Interne de tiu ĉi naztuko, ci trovos monerojn. Ili ne estas multaj, ĉar mi ne volas, ke oni sciu pri tio, sed ci havos por sufiĉe da tempo! Nu, prenu, gardu ilin, kaj ke ci povu utiligi ilin!

MANUELO

Mi ne volas ilin.

Rozo

Kion ci diras?

MANUELO

Mi diras al vi, ke mi ne akceptas ilin!

Rozo

Ili estas de ĉia hejmo! Ĉu mi ne diris al ci, ke ni aldosis du bretojn en la vendejo?

MANUELO

Ne! Mi ilin ne prenos! Ne donu ilin al mi!

Rozo

Ĉu ci jam ne scias, ke ili apartenos al ci tuj, kiam mi mortos? Ĉu ci deziras vidi min mortintan? Ĉu mi estos devigata forporti ilin kun mi? (*Isabelo eniras por preni objektan kaj foriras. Rozo rigardas ŝin mirigita.*)

MANUELO (*ekvidante Isabelo'n*)

Pruntu ilin al mi! Nur pruntu ilin al mi! Mi ilin akceptas! Mi prenas ilin, ĉar mi devas ilin preni aŭ morti,

kaj mi ne elŝiras mian koron ilin prenante, ĉar la koro jam ne estas mia, patrinol

Rozo

Mi ne komprenas cin, kaj eĉ mi ne deziras cin kompreni! Mi vidas, ke ci suferadas, kaj mi ne scias, kio ĝi estas; mi cin vidas malbone vestitan, kaj ci ne devus vesti tiama-niere; kaj mi vidas tion, kion mi jam diris: ke mi tre bone agis alveninte! Lasu ke mi ekzameni la domon, ordigu ĝin, kaj vidu kio mankas al ci, ĉar tie ĉi devas esti neniu virino, kaj se ĵaj tien ĉi alvenas, ili ne zorgas pri ci!

## SCENO VI.<sup>a</sup>

MANUELO KAJ ISABEL

MANUELO (*ekkriante el la pordo*)

Isabelo!

ISABELO

Kio estas?

MANUELO

Antaŭ ne longe ci komprenigis min, ke ci deziras foriri, kaj mi komprenas ke estas, ĉar ci ne povas vivi kun mi tial, ke nenion mi povas fari por ci.

ISABELO

Por mi, nel Mi estas pli libera el priokupoj ol ci, kaj estas la sama por mi vivi kiel ne vivi. Mi kontentiĝas per ridego!

MANUELO

Nu, mi nun povas!

ISABELO (*gaja*).

Ĉu ci fine decidis fari kion oni diris al ci?

MANUELO

Ne zorgu pri tiol! Nun mi povas doni al ci monon, kaj

poste mi povos doni al ci, multe pli, sed ne lasu min! precipe ne lasu min, ĉar mi mortus pro suferado!

ISABELO

Ĉu ci ne komprenis do, kion mi diris al ci? Mi nenion deziras por mi! Se mi ne bezonas ilin! Se ne estas por mi, kiam mi petas de ci ion!

MANUELO

Do, por kiu?

ISABELO

Por kiu ili devus esti! Por la patrino!

MANUELO

Ĉu ci diras, por cia patrino? Ke tio, kion ci deziras ne estas por ci: ĝi estas por helpi al cia patrino!, kaj tio, kion mi intencis doni al ci, mi prenis... Ĉiela Dio! Kiel mi estas ja malnobla!, malhumilega!, kaj mizera! Isabelo, ci estas multe pli honesta, ol mi!

ISABELO

Kion ci havas? Se ci deziras doni al mi nenion, agu tiel!

MANUELO

Jes, mi volas! Nun mi volas! Sed ne akceptante ĝin malkuraĝe de tiu, el kiu mi ne devis akcepti.

ISABELO

Mi ne komprenas cin!

MANUELO

Despli bone (*kriante*). Patrino! Patrino!

---

## SCENO VII.<sup>a</sup>

MANUELO, ISABELO, ALBERTO KAJ ROZO

ROZO

Kion ci deziras?

MANUELO

Prenu. Mi jam ne bezonas tion ĉi. Mi ĝin redonas al vil

ROZO

Sed...

MANUELO

Prenu ĝin, ĉar mi ne havas la rajton havi ĝin!

ROZO

Sed aŭskultu...

MANUELO (*ekkriante*)

Alberto! Alberto!

ALBERTO

Kio?

MANUELO

Ci devus fari al mi favoron.

ALBERTO

Diru.

MANUELO

Mi ne povas foriri, ĉar mia patrino alvenis. Ci iros al sinjoro Karmona kaj ci diros al ci, ke post pripensado mi akceptas liajn kondiĉojn.

ALBERTO

Ha, mi ne iras tien!

MANUELO

Mi cin petas!

ALBERTO

Mi diras, ke mi ne iros tien! kaj ci jam scias la kialon.

ISABELO (*saltante pro kontenteco*)

Mi iros! Mi tuj iros tien!

MANUELO

Jes, tien iru! Ci iru! kaj diru al li en mia nomo, ke mi pentros kion ajn oni petos de mi: pentraĵojn por komerci, por sufoki min, por konfuzigi per ili, por vendi mian animon de artisto! Mi ne havas la rajton esti virtal! La pentristo, kiu havas koron, ne povas esti pentristo! (*Isabelo foriras kurante*).

Rozo

Filo mia, mi ne scias, kion ci volas, sed mi ĝin suspek-  
tas! Se tiu ĉi amiko, kiu mi scias amas cin, ne deziras iri  
tien, kien ŝi iras, tio estas, ĉar ŝi deziras al ci malbonon.  
Mi vidas, ke mi faris tre bone veninte. Ci ankoraŭ ne estas  
viro, por ke mi lasu cin!

**Kurteno**

## AKTO TRIA

---

*(La sceno prezentas pentristlaborejon largan, kaj vastan. Funde, en unu flanko granda vitraĵaro provizita per kurtenoj, kaj sube kanapo. En la alia angulo de la fundo granda tapiŝo, kiu kovras la pordon de l'vestĉambro de la modelulino. La pordoj de la ĉambro dekstre, proksimaj al la rigardantoj, kaj tiu de la ŝtuparo maldekstre. Sur la muroj, skizoj, taburetoj de laborejo, paletroj kaj historiaj vestoj, kaj en angulo granda blanka tolo lokita sur stablo.)*

---

## SCENO UNUA

MANUELO, ISABELO KAJ SINJORINO AMPARO

*(Kiam la kurteno leviĝas, sinjorino Amparo dormas sur seĝo de l'fundo. Isabelo vestita per Imperia vestaĵo, staras sur la pargeto. Manuelo faras ŝian portreton sur tre malgranda tolo, enmetita en granda kadro sur stablo. Li penikas du aŭ tri foje kaj ripozas).*

MANUELO

Bone, sufiĉel Mi ne povas pli. Tri horoj de punlaboroj estas jam sufiĉe.

ISABELO

Se ci deziras labori pli, daŭrigu, ĉar mi ankoraŭ ne estas laca.

MANUELO

Do, mi jes. Ripozu.



ISABELO

Sed, se mi diras al ci ke mi ne...

MANUELO

Estas mi, kiu deziras ripozi.

ISABELO (*malsuprenirante el la pargeto ameme*).

Kiel ci estas mallaboremal

MANUELO

(*lasante la paletron teren, kaj elĵetante sin sur la kanapon*).

Jes, mi fariĝas mallaborema.

ISABELO

Pensu, ke hodiaŭ ci devas liveri la pentraĵojn!

MANUELO

Mi scias. Mi devas liveri la pentraĵojn, kaj iri enspezi la monon. Precipe tio: iri enspezi same kiel tiu, kiu enspezas semajnan salajron!

ISABELO

Pro kio ci plendas? Ci havas tiom da laboro, kiom ci deziras...

MANUELO

Pro tio: ke mi havas tiom da laboro kiom mi deziras. Nun mi ne pentras: mi faras laboron. (*Li ekbruligas cigaron.*)

ISABELO

Kiel ci estas simplanimal

MANUELO

Nun mi estas polaboristo. Mi laboras po peco. Aj! kien iris tiuj tagoj dum kiuj mi revis bataladi, venki, trudi mian skolon! Tiam, rigardante la fumon de l'cigaro, en ĝi mi vidis, internubajn figurojn, iluziojn je glora koloro, kaj... kion mi scias! kaj nun la cigaro ŝajnas al mi nombro, kaj la ringoj de l'fumo nuloj. La Arto fariĝis ciferoj!

ISABELO (*ŝidigante apud li*)

Hal malsagal Ĉu ci estus trovinta iun, kiu estus aminta

cin tiel, kaj tiel longedaŭre, kaj tiel... cin sola, kiel mi finiĝis amante cin? Ĉu tio ne valoras fari, kion ci nomas ofero, se gajni manon estas ofero por tiu, kiu oferis al ci la solan doton, kiun ŝi havas, t. e. ridi?

MANUELO

Jes, ci estas prava!

ISABELO

Kaj la amo, kiun mi havis por ci, kaj mi ankoraŭ havas, ĉu tio nenion valoras? Kaj la penoj, kiujn mi eltiris el ci, ĉu ili ne kalkuliĝas? (*Alproksimiĝante al li*). Ĉu ci povus kalkuli la nombron de la karesoj, kiujn mi faris al ci? Ĉar ankaŭ estas... laboro la kisoj, simplanimulo mia!

MANUELO

Isabelo, ne atentu tion, kion mi diras. Ili estas bedaŭroj, sed ili estas la lastaj. Mi kredas, kaj se ci ridos pro tio, ridu, ke mi devis havi floron en la kapo, kaj ke mi elŝiris de ĝi la foliojn. Sed ĉiam restas iun kiel specimeno, kiu ankoraŭ ne velkis.

ISABELO

Aŭskultu. Ĉu ci ne uzas kalendaron?

MANUELO

Mi jam tion ne scias!

ISABELO (*tre ameme*)

Do, se ci uzus ĝin, ci vidus ke ni ankoraŭ ne estas en aŭtuno!

MANUELO (*prenante al ŝi la manon*)

Ne, ni ne estas en aŭtuno!

ISABELO

Ni estas en somero! En nia somero! Kun trairanta ama aero, kiun se ni ne profitus, ni estus frenezaj aŭ ni agus tiele! Nu, rigardu min! Rigardu min, ĉar ne taŭgas revii. Rigardu min per festaj okuloj! Tiamaniere: per tiu rigardo per kiu interne de ili, mi vidas min ridante! Kaj ne fantaziu, ĉar ci ne plaĉas al mi fantaziante. Mi cin amas tre ve-kita por ke ci rigardu min!

MANUELO (*irante kisi sin*)

Isabelo mia!... Ci estas prava dirante, kion ci diras! Ni vivu! Ni kune vivu, kaj la ceteron, ni elviŝu.

ISABELO

Tiel mi deziras cin! Gaja kaj tute mial! Lasu la aferojn, kaj ni vivu! Kial ci devas atenti pri la pentraĵoj? La pentraĵoj devas utili por ni, kaj ni ne devas morti por ili! Ĉu ci ne scias kion ci promesis al mi?

MANUELO

Kion ci deziros! Mi promesas al ci ĉion, kion ci deziros!

ISABELO

Ke ni kunvivos, ci promesis.

MANUELO

Ni tiele vivos!

ISABELO

Kiam? Diru al mi kiam?

MANUELO

Tuj, kiam foriros la patrino, kiu venis nur por kelke da tagoj.

ISABELO

Kaj se cia patrino ne forirus?

MANUELO

Tiam, kia plezuro! Sed ŝi foriros.

ISABELO

Kia plezuro tiam, kaj mi ne povus esti kun ci? Tio estas diri al mi, ke ci ne amas min!

MANUELO

Mi amas cin, pleje kiel eble, sed mi ne povas forpeli sin pro ci! Ĉu ci forlasus cian?

ISABELO

La mia ne estas sama. Ŝi ne malhelpas!

MANUELO

Isabelo!

ISABELO (*proksime al la orelo*)

Amu min! Sole min! Ŝi pli bone estos en sia velaĝo....  
 Ŝi konas ĉiujn, tie ŝi havas siajn amikinojn, kaj ĉion sian...  
 Kaj mi nur amas cin, amo mia! Mi havas la rajton deziri  
 cin... sola! Diru al mi tion, kiel mi ĝin diras al ci! Diru al  
 mi tutkore, ke ci nur amas min sola.

MANUELO

Ne frenezigu min, nek devigu min diri, kion mi ne  
 povas. Tio, kion mi ne diros al ci Isabelo!

ISABELO

Jes, ci estas mia! Mi jam scias, ke ci estas mia. Kaj  
 kiam ni estos kune, sed tute kune, tiam ci ankoraŭ estos  
 pli mia! Ĉu ci ne vidas, ke mi venkos cian koron? Ke ci  
 nur gajecon vidos? Ke mi kantos, dancos, kaj plenigos  
 cian vivon je plezuro?... Atentu, ĉe ni, ĉe nia domo, kiu  
 estos malgaja, tiun, ni ne akceptos. Ĉia kompatinda patri-  
 no cin kreskigis surversante cin per larmoj, kaj mi faros  
 cin homo per ridoj!

MANUELO

Isabelo, pro Dio, ne tentu min plu!

ISABELO

Nu, sufiĉe, sinjoro troobstina. Diru al mi, ke ci amas  
 nur min, kaj ke mi restos proksima al ci! Montru ĝin al  
 mi per la rigardado, ĉar ci ne volas ĝin diri al mi parole!  
 Ĉu ne vere, ke mi estos sola tie ĉi en la hejmo? Jes, mi  
 tiel estos! Mi ĝin divenas al ci!

MANUELO

Mi ne scias, Isabelo!

ISABELO

Mi ja tion, scias! Ĉirkaŭpremu min! Ĉirkaŭpremu min  
 antaŭ ol diri ĝin!

MANUELO (*ĉirkaŭpremante ŝin*)

Mi amas cin! Mi amas cin pli, ol ci pensas. Mi amas cin ĝis tio deziri, kion ci deziros! Ĝis mia diboĉigado... kaj morto.

## SCENO II.<sup>a</sup>

LA SAMAJ kaj ALBERTO

ALBERTO

Bonan vesperon!

ISABELO (*eklevigante malkontenta*)

Alberto!

ALBERTO (*trovante en sia vojo sinjorinon Amparo'n*)

Vi jam povas vekigi, sinjorino Amparo.

SINJORINO AMPARO

Kia ektimo! Mi ne scias, kiun mi kredis ĉeestanta tie ĉi!

ALBERTO

Do estas neniuj! Estas mi!

MANUELO

Alberto, el kie ci eliras?

ALBERTO

El kie ci volas, ke mi eliru! El la bieno! Mi deflankigis iom, kaj mi alvenas por cin vidi dum unu momento. Kiel ci fartas? Isabelo kiel ci estas?

ISABELO

Ne tiel bone, kaj tiel malsprita kiel ĉi!

ALBERTO

Hol! Kion ci havas?

ISABELO

Ke ci elvekas la personoj eĉ ne dirante: Dio cin gardu!

## SINJORINO AMPARO

Ne, se tute ne malutilas al mi, ke oni min elveku! Mi ree dornos. Tio ĉi ne malhelpas!

ISABELO

Do, tio ĉi ja malutilas al mi, jen la afero! (*Forirante*) Ni iru, patrino. Ni lasu ilin paroli... ĉar nun Manuelo havas jam... samprofesionanon!

MANUELO

Kien ci iras?

ISABELO

Kien ci volas, ke mi iru? Ŝangi la vestaĵojn! Nun ci havas cian Alberto'n.

ALBERTO

Ci diras do, ke estas Alberto, kiu malhelpas cin? Post duono da jaro, kiam mi ne venis.

ISABELO

Ci malhelpi min? (*ŝi ekridegas*). Mi ne tiom valoras cin!

ALBERTO

Sed, kion ci volas diri?

ISABELO

Komprenu ĝin, kaj se ci ne scias legi, eklernu. (*Ŝi eniras la ĉambron por vesti sin. Sinjorino Amparo sekvas sin.*)

## SCENO III.\*

MANUELO kaj ALBERTO

ALBERTO

Kio estas? Kio okazis? Ĉu jaluzo? Ĉu petoj por mono?

MANUELO

Pri tio, ne atentu. Ili estas virinoj.

ALBERTO

Se ci ne atentus pli pri la virinoj ol mi, ŝajnas al mi, ke ili malkariĝust Rigardu kiel malfeliĉa mi estas! Tiom da tempo, kiam mi ne venis vidi cin, kaj tuj, kiam mi alvenas, mi jam malhelpas.

MANUELO

Kaj, kial ci ne venis ĝis hodiaŭ?

ALBERTO

Kaj, kion ja mi devas fari tie ĉi, de kiam ci ne agas kiel artisto? Ci jam scias ke mi ne ŝatas viziti vendejojn!

MANUELO

Nu, Alberto! Mi laboras. Hodiaŭ mi finis tiun ĉi pentraĵon.

ALBERTO

Tion enkadrigitan per oro, ci nomas pentraĵo?

MANUELO

Ĉu ci deziras vidi ĝin?

ALBERTO

Mi ne estas lerta pri komerco.

MANUELO

Ne turmentu min, ci ankaŭ.

ALBERTO

Mi ankaŭ, ĉu ci diras? Ĉu iu alia turmentas cin?

MANUELO

Multe da aferoj turmentas min! Pli... Pli da ili, ol ci povas pensil!

ALBERTO

Nu, plifaciligu iom cian koron, ĉar mi jam konas, ke plezurege ci deziras tion ĉi fari. Se oni riproĉegas cin, kulpigu min!

MANUELO

Kaj, kion mi devas diri al ci, ne pensitan jam de ci? Neniun motivon mi havas esti malgaja. Ĉio por mi bone funkciadas, laŭ oni diras al mi. Oni alvenas viziti min, mi havas rondon, apartajn kritikistojn, privatan publikon, enviantojn, mendojn, nomon, ĉion, kion ci deziras; ĉio esceptinte gajecon!

ALBERTO

Mi jam konas cian malsanon.

MANUELO

Mi ankaŭ konas ĝin!

ALBERTO

Ci havas pentrajn konscienciproĉojn.

MANUELO

Ne, tion nel Ci jam scias, kial mi ŝanĝis la vojon... La patrino...

ALBERTO

Silentul Cia patrino, pensas kiel mi. Ankaŭ ŝi scias trapasi mizeron.

MANUELO

Sed mi ne povas permesi, ke ŝi suferu pro tio.

ALBERTO

Sed, cin vidi malriĉa aŭ vidi cin malgaja, kio estas pli dolora por ŝi?

MANUELO

Kion mi scias?

ALBERTO

Do, mi ja scias tion! Patrinoj, kun malriĉaj filoj, multe da ili ci vidos kiuj vivas, kaj kun malgajaj filoj, ci vidos neniun el ili, escepte se ci iras al la tombejo. Pro tio la mia mortis: ĉar ŝi jam antaŭpensis mian estonton.

MANUELO

Sed, kion mi devas fari se tio, estas tiela?



ALBERTO

Pentiĝi!

MANUELO

Mankas al mi ekpuŝo, forto, kuraĝo! Mi estas morala malliberulo. Malliberulo, kiu teksas por si la kradojn. Rigardu, ĉu ci vidas tiun ĉi tolon? (*montrante al li la blankan tolon*). Nu, ĝi estas la lasta klopodo, kiun mi faris por min eltiri el la malliberejoj! Ci jam scias, ke nenio estas pli bela, nek pli fantazia por ni, ol rigardi blankan tolon. Ĉar oni ja vidas tion, kion ĝi povas enhavi, la kreaĵon, tion, kio ankoraŭ estas mistero, oni vidas ĝin multe pli bela, ĉar oni vidas la nekonaton, kaj tion, kio ne estas difektita pro la vereco de l'elreviĝo! Nu, nun mi rigardas ĝin, kaj mi nenion vidas sur ĝi! Ĝi atendas min, kaj mi ne scias tien iril, kaj nek plorante antaŭ ĝi, nek genufleksante min al ĝi, ĝi donas al mi la konsolon, kiun mi serĉas!

ALBERTO

Ĉar ci pekis, kaj ĝi punas ciajn kulpojn! Ci devas pentofari. Jes, pentofaro de malŝparema artisto! Ekfasti. Nur pano kaj oleo! Honesta pano kaj pentra oleo!

MANUELO

Alberto, mi ne deziras ŝerci.

ALBERTO

Forpelu ĉiujn, kiuj malhelpas cin, kaj restos al ci tri aferoj, sed tri veraj aferoj: cia patrino, kiu estas la emblemo de l'amo; mi... lasu min esti la emblemo de l'amikeco, kaj la gloro, kiu venos cin trovi, kiam ci purigos ĝian vojon, kaj kiu estas la emblemo de la riĉeco. Ĉu ci pli da emblemoj deziras? Kun patrino, kun amiko, kaj kun laŭro en cia ĝardeneto, ci ja ne povas plendi je la vivo! Mi havis nenion el tio ĉi, kaj mi maljuniĝas esperante, kaj estas ja bona afero esperi! Duonhoron antaŭ ol morti, mi pripensos la postmortan pentraĵon. Mi eĉ konfidas al la morto!

MANUELO

Ci jes, sed mi, estas degradita.

ALBERTO

Eĉ pri tio ĉi ci revas!

## MANUELO

Alberto mi estas degradita! Ci ne scias, kiom mi estas degradita! Mi ne sole vendis mian arton, sed ĉion mi vendis! Ĉion! Jus kiam ci alvenis, mi estis preta por vendi... jes por vendi, eĉ malvarmigas tion pensi... Mi estis promesonta... la plej malbonan, kiun filo povas promesi... Mi estis... (*Lasante sin fali sur la kanapon*). Malbonaĵol Malhonoro, kiun mi hontas rakonti al ci! Kaj rigardu, se mi estas jam degradita, ke malgraŭ ke mi scias, ke tio estas malbonaĵo, mi elŝiras mian vivon, ne farante ĝin! (*Alberto konsolas Manuelo'n, ĉirkŭpremante lin, kaj en tiu ĉi momento eniros Rozo*).

SCENO IV.<sup>a</sup>

*La samaj kaj Rozo*

Rozo

Alberto, ĉu ci tie ĉi? Kion havas la knabo? (*Al Manuelo*). Kion ci havas?

MANUELO (*levigante*)

Nenion! Mi havas nenion!

Rozo (*al Alberto*)

Kio okazas al li? Ĉu li ne bonfartas?

ALBERTO

Li diros.

Rozo

Knabo: kion ci havas?

MANUELO

Mi tion jam diris: nenion! Mi havas nenion. (*Manuelo prenas la ĉapelon por foriri*).

Rozo

Kaj, kial ci foriras, se oni povas tion scii?

MANUELO

Mi devas eliri... pro unu afero.

ROZO

Ne estas vero.

ALBERTO

Ne atentu pri tio, ĉar li estas... priokupita pro la pen-  
traĵoj.

Rozo

Ankaŭ tio ne estas vero.

MANUELO

Mi devas foriri... ĉar... ĉar, mi ne povas esti tie ĉi, kaj  
mi devas foriri.

Rozo

Sed, kien?

MANUELO

Tien, kie mi ne vidos vin.

Rozo

Ĉu tiom mi malhelpas al ci, filo mia?

MANUELO

Ne, patrino! Estas mi, kiu malhelpas tie ĉi! Mi hontas  
pri mi mem! Lasu min trankvila, kaj ne turmentu min,  
ĉar mi eĉ ne estas inda vidi vin! (*Li eliras kvaŝaŭ forku-  
rante*).

ALBERTO

Malkuraĝa!

Rozo (*petante*)

Knabo! Knabo!

## SCENO V.<sup>a</sup>

Rozo kaj ALBERTO

ALBERTO

Lasu lin, ĉar li revenos. Li nun estas konfuzita, sed li jam scias, ke tie ĉi oni atendas lin!

Rozo

Jes, li revenos. Tion mi jam scias. Kaj mi scias, ke li ne revenos por mi!

ALBERTO

Virino, kial ne?

Rozo

Ne, Alberto! Por ŝi Nur por ŝi! Ĉiam por ŝi! Por tiu, kiu ŝtelas mian filon, kaj ŝi mortigos lin, inter siaj brakoj!

ALBERTO

Kaj, kiel ŝi mortigus lin, sankta kristanino!

Rozo

Mi ja ne plendas, ke ŝi ŝtelu lin al mi! Kion mi pli dezirus ol tio, ke ŝi ŝtelu lin al mi, por fari lin felica! Mi eĉ kisus la piedplandojn de la virino lin amanta! Sed ŝi ne amas lin, Alberto, ŝi ne amas lin! Deziri viron, tio ĉi ne estas lin ami: tio estas aĉeti por si la plezuron, lin posedi.

ALBERTO

Mi jam atendis tion ĉi!

Rozo

Alberto, mia filo ne estas malbona.

ALBERTO

Li ja ne estas malbona!

Rozo

Ne, li ne estas tia, sed oni devigos lin fariĝi tia. Ŝi trompas lin, kaj ŝi faros lin tia. Kaj mi ne volas tion! Mi

tion ne volas, nek povas akcepti! Ĉar li ne havas karakteron, mi do, devas havi tion. Kiam io koncernas min, nur min, tiam mi estas nur kompatindulino, sed por li mi faros tion, kio mi estas devigata esti: egoista, sovaĝa besto, kaj eĉ malbona.

ALBERTO

Sed kion vi intencas fari?

Rozo

Mian devon. Savi lin! Savi lin, kiel ajn ĝi estos. Se li tion ne akceptas volonte, mi perfortos lin! (*Eniras sinjoron Karmona'n. Rozo, vidante lin, eniras en la ĉambron*).

---

## SCENO VI.<sup>a</sup>

ALBERTO kaj SINJORO KARMONA

SINJORO KARMONA

Dio gardu vin!

ALBERTO (*duone nerva*)

Dio gardu vin, sinjoro Karmona.

SINJORO KARMONA

Alberto, ĉu ci tie ĉi?

ALBERTO

Vi miras, min trovi, ĉu ne vere?

SINJORO KARMONA

Amiko, ci estas tiel malofte videbla...

ALBERTO

Ha! Mi pagigas kare miajn alvizitojn.

SINJORO KARMONA

Kie estas Manuelo?

ALBERTO

Li foriris.

SINJORO KARMONA

Ĉu, ci venis por vidi liajn lastajn verkojn, ĉu ne vere?

ALBERTO (*rigardante la plafonon*).

Ĉu Manuelo konstruiĝis? Mi ne vidas la konstruafojn! (1)

SINJORO KARMONA

Bone, ci ĉiam estas la sama.

ALBERTO

Mi tute ne mirus, se li konstruigus, celante, kiel li celas fariĝi bienulo.

SINJORO KARMONA

Kaj, kien ci celas, nu diru?

ALBERTO

Mi, por malkara luanto.

SINJORO KARMONA

Alberto, kiel ci estas feliĉa!

ALBERTO

Dio ĝin konservu al mi! Kaj ĉu vi ne scias kial mi estas tia? Ĉar mi flegas mian moralon. En la mondo estas, kiu nutras kanariojn, kaj aliaj kiuj devigas sin pro bezonoj. Do, mi nenion nutras, se nur tion, kion mi povas nutri, kaj pro tio ne havante ambicion, mi ne havas korenuojn.

SINJORO KARMONA

Ci estas prava, knabo.

ALBERTO

Ha! Pri praveco, ĉiuj ja konsentas kun mi, sed ili ne sekvas mian ekzemplon! Ne estas semajna tago, eĉ festa, en kiu mi ne trovis grasajn virojn, riĉajn, kontentajn, kaj dikajn, kiuj diras al mi, ke ili envias min ĉar estante mal-

---

(1) La katalana frazo *fer obras* (verki) signifas ankaŭ «konstruigi.»

riĉa, mi estas feliĉa; sed malgraŭ tio, ili ne forlasas la monon.

SINJORO KARMONA (*per ridego*)

Ne ĉiuj havas cian virton!

ALBERTO

Ĉu vi diris virton? Vi devas diri, la timon. Por eviti la polvon ili sin enmetas per piedegoj en la bedon! Jen, vi havas Manuelo'n ekzemple. De la tempo kiam vi faris el li homon, de tiam li ne havas momenton d- vikteco.

SINJORO KARMONA

Mi supozas, ke ĉi ne kulpigas min pro tio?

ALBERTO

Mi estas *maŭra*: mi kulpigas la fatalon. La fatalo koni vin, la fatalo koni ŝin, la fatalo ke vi konis ŝin kaj lin, feris tian fatalajn intermiksaĵojn, ke li jam sufiĉe havas per tio, por trapasi malĝaĵojn. (*Vidante eliri sinjorinon Amparo'n*). Hal kaj mi forgesas la plej bonan aferon: la fatalo, doni al li bopatrino, ĉar tio ĉi estas fatalo je konservaĵo. (*Alberto iras al la kanapo, per komika sintenado kvazaŭ li forirus de sinjorino Amparo*).

---

## SCENO VII.<sup>a</sup>

LA SAMAJ, SINJORINO AMPARO KAJ POSTE ROZO

SINJORINO AMPARO

Kion li diras? Kion diras tiu ĉi malspritulo?

SINJORO KARMONA

Ne atentu tion, sinjorino Amparo. Li ĉiam estas bonhumora.

SINJORO AMPARO (*aparte al sinjoro Karmona*)

Mi jam malŝatas tion, sed tiel mi ne devus agi! Antaŭ kelkaj tagoj, en tiu ĉi domo okazas sekreta konspiro.

SINJORO KARMONA

Kontraŭ kiu?

SINJORINO AMPARO

Kontraŭ mi, kontraŭ la knabino, kaj kontraŭ vi. Ili suspektas. Oni suspektas ke vi estas la unua... kiu protektis Isabelo'n, kaj la jaluzio ne lasas ilin vivi.

SINJORO KARMONA

Vi estas kulpa pri tio. Venu ĉe mi, kaj oni ne vidos nin.

SINJORINO AMPARO

Mi ja ĉiam estus en via hejmo, sed la knabino multe ŝatas kuri, kaj kion mi devas fari, kompatinda je mi, se ŝi estas la pupilo de miaj okuloj. Aj! Vi ne scias, kio estas esti patrinol

SINJORO KARMONA

Ne zorgu pri tio, kaj venu pli ofte.

SINJORINO AMPARO

Hodiaŭ mem ni iros, petoletal Aj! kia viro vi ja estas!

SINJORO KARMONA

En ŝranko mi havas likvoron, el tiu, kiun vi ŝatas!

SINJORINO AMPARO (*ekvidante Sron. Trilles kiu eniras*)

Nenion plu diru, ĉar oni observas nin.

---

## SCENO VIII.\*

LA SAMAJ, SRO. TRILLES KAJ SRO. ROMEŬ

SINJORO TRILLES

Ĉu oni povas eniri?

ALBERTO

Antaŭen?

SINJORO TRILLES

Ĉu Manuelo ne estas tie ĉi?



ALBERTO

Li eliris.

SINJORO TRILLES

Kiel strange?

ALBERTO

Ĉiuj trovas tion stranga, sed li eliris.

SINJORO TRILLES

Mi bedaŭras, ĉar mi alvenas por konatigi lin kun amiko: Sinjoro Johano Romeŭ, Sinjoro Alberto. La fama arta kritikisto, kiu deziras vidi liajn verkojn. (*Alberto faras grandan saluton*).

SINJORO KARMONA (*trante saluti lin*)

Ĉu vi tie ĉi, Sinjoro Romeŭ?

SINJORO ROMEŬ

Kiel vi fartas, majstro?

SINJORO KARMONA

Ankaŭ mi, alvenis por la sama: por vidi la pentraĵojn de Manuelo, sed la artisto estas for.

SINJORINO AMPARO

Tio ĉi, multe mirigas min, ĉar li neniam eliras. Mi ekdormiĝis dum momento, kaj kiam mi vekigis, jam li ne estis ĉi tie.

ALBERTO

Ĉu li aŭ vi ne estis?

SINJORINO AMPARO

Kion ci intenzas diri?

ALBERTO

Ke kelkafoje, vi ĉeestas kvazaŭ vi ne ĉeestus!

SINJORINO AMPARO

Malspritulol

SINJORO ROMEŬ (*al Sro. Trilles*)

Ĉu tiu ĉi junulo estas ankaŭ artisto?

ALBERTO

Laŭ tio, kion vi komprenas kiel artiston. Estas jam multaj klasoj el tio.

SINJORO TRILLES

Li estas Alberto...

ALBERTO

Ĝuste. Mi estas Alberto.

SINJORO ROMEŬ

Ŝajnas al mi koni vian nomon!

ALBERTO

Ne, vi ne konas ĝin. Mi certigas vin, ke vi ne ĝin konas. Mi tre konas vin.

SINJORO ROMEŬ

Mi ne miras. Eble, eĉ mi parolis pri viaj pentraĵoj.

ALBERTO

Ne sinjoro, vi neniam parolis pri ili, ĉar mi ne elmontras pentraĵojn. Mi pentras... intime. Miaj pentraĵoj malvarmumiĝas en la heleco.

SINJORO ROMEŬ

Nu, kie vi konatigas vin?

ALBERTO

Nenie... kaj pro tio estas... ke oni ne konas min.

SINJORO TRILLES

Li estas tre originala...

ALBERTO

Pli malpli sufiĉe.

SINJORO ROMEŬ

Sinjoro, estus por mi aparta plezuro vidi viajn verkojn.

ALBERTO

Estas afero malfacila. Ĉio, kion mi faras estas mendoj

SINJORO ROMEŬ

Bravel Vi laboras por granda pentraŭvendisto?

ALBERTO

Ne, sinjoro: por vendistino!

SINJORO ROMEŬ

Ha!

ALBERTO

Mi laboras por la posteularo.

SINJORO TRILLES (*ridante*)

Ci ŝa multe pretendas.

ALBERTO

Koncerne pretendecon, neniŭ ŝa min superas. Rigardu, kiom da ĝi mi devas havi, kiam mi ne vendas miajn pentraŭfojn. Mi ilin tenas ĉe mi!

SINJORO TRILLES

Nature.

ALBERTO

Nel Ne tiel nature, kiel ĝi ŝajnas! Ĉu vi scias, kiel malfacila estas scii gardi kun si la pentraŭfojn, kaj kiom da aferoj oni devas scii por ne porti ilin al la strata publikvendejo? Oni devas scii havi paciencon, ne manĝi, ne enamigi; oni devas esti konsiderata kiel simplulo, kaj ŝajni tia, kaj trakti kun multaj, kiuj estas tiaj, kaj kiuj ne avertas ke tiaj ili estas!

SINJORO ROMEŬ (*per ridego*)

Tre bone! Vi parolis tre bone!

ALBERTO (*salutante*)

Dankojn!

SINJORO ROMEŬ

Se vi pentras tiel bone, kiel vi parolas...

ALBERTO

Nel Vi ne ŝatus, kion mi pentras. Ĝi similas al tio, kion Manuelo pentris, kiam oni elkrevigis lin.

SINJORO TRILLES (*ridante*)

Vi estas terura!

SINJORINO AMPARO

Li estas senhontulo!

ALBERTO

Atentu, sinjorino Amparo, ke ne estas taŭge por vi maldormiĝi.

SINJORO TRILLES

Bone, bone! Ni rigardu la pentraĵojn de Manuelo, kaj ni ne parolu plu, nek diskutu! Alberto, ĉu ci mem deziras montri ilin al ni? (*Rozo eniras*).

ALBERTO

Mi ne montras pentraĵojn. Jen vi havas lian patrinon, kiu vi jam scias, estas tre lerta por montri ilin! kaj nun ne same okazos, kiel tiam. Nun vi juĝos ilin pli bonaj, ĉar nun li ne pentras ilin tiel *ex-votoj*.

SINJORO TRILLES

Sinjorino Rozo, kie estas la pentraĵojn de la knabo?

ROZO

Mi tion ne scias.

SINJORO KARMONA

Sed, kio okazas en tiu ĉi domo? Kion signifas ĉiuj, tiuj ĉi misteroj?

ROZO

Tio signifas, ke mi estas kompatinda virino, kiu akiris spertadon. Antaŭe, en tiuj tempoj, kiujn vi scias, mi montris la pentraĵojn de la knabo, kvazaŭ mi montrus sanktofiguron, kaj nun... nun mi eklernis, ke por vidi pentraĵojn, oni devas havi fervoron, kaj ke vi ja ne estas fervoraj.

SINJORO KARMONA

Kaj, kiel vi diras al mi tion, sinjorino Rozo?

Rozo

Ĉar, kiam vi venis tien ĉi, ĉiam mia filo elverŝis larmojn.

SINJORO KARMONA

Ĉu pro ni?

Rozo

Jes, pro vi. La knabo ne estas plu, kiel li estis, de la tempo kiam vi protektas lin!

SINJORO TRILLES

Kion vi diras! Ni ĉiuj helpis lin!

Rozo

Por ke li falu.

SINJORO KARMONA

Kiom signifas tio ĉi? Ni senkulpigas vin pri tiuj ĉi vortoj ĉar malordigas vin via patrineco. Se via filo suferadas, pro kio ni estas kulpaj? Mi devas memoriĝi vin pri tio, kion mi diris antaŭ kelkaj jaroj al vi la tagon, kiam mi iris ĉe vi: ke li ne deziru esti pentristo, ĉar li multe suferadus dum la vivo.

Rozo

Li suferadus! suferadus! Sed vi forgesis diri al li, ke ne estus la pentrarto, kiu suferadigus lin, se nur tiuj, kiuj sin nomas bonfaruloj. Tiuj, kiuj atestante sindonemon por li, ne defendis lian pentraĵon. Tiun pentraĵon, kiun vi jam konas.

SINJORO KARMONA

Kion vi kuraĝas diri!

Rozo

Jes. Tiuj, kiuj montris al li vojon, kiun ili ne devis montri. Tiuj, kiuj ne diris al li la veron en la deca mo-

mento, kaj tiuj, kiuj konante knabinon pli ol ili devus sin koni, faris kunulecon kun ŝia patrino!

SINJORINO AMPARO (*malsidiĝante*)

Kion vi diras!

SINJORO TRILLES (*al Romeŭ*)

Pardonu min, Romeŭ...

SINJORO KARMONA

Sinjinoro Rozo, parolu klare, ĉar se vi diras tion pri mi vi eraras! Mi ĉiam laboris por Manuĉelo. Mi atingis por li situacion!

ROZO

Ni ne volas situacion. Vestafoj, loĝejo, meblaro, kaj vizitoj nenio el tio ĉi tentas nin! Bonajn vestitajn sinjorojn ni ne ŝatas, kiuj amike parolas al ni sed, kiuj kaŝite nin perfidas.

SINJORINO AMPARO

Ĉu vi parolas pri mi, se oni tion povas scii?

ROZO

Vi jam tion scias!

SINJORINO AMPARO

Diru!

ROZO

Ne timu, ĉar mi ja diras al vi ĉion, kion mi havas por diri, kiam tiuj ĉi sinjoroj estos foririntaj!

SINJORO KARMONA (*ekprenante la ĉapelon*)

Baldaŭ ni estos foririntaj!

SINJORO TRILLES

Ni iru, ĉar tiu ĉi virino estas frenezal!

SINJORINO AMPARO

Malatentu tion, ĉar ŝi ne havas edukitecon.

Rozo

Por ĉiuj kiuj estas kiel, ni devas esti, pli decaj estas la  
filoj, ol la edukitecol

SINJORO TRILLES

Je Dio, sinjorino Rozo!

SINJORO KARMONA

Vi deziras, ke ni foriru, ĉu ne vere?

Rozo

Mi deziras paroli kun sinjorino Amparo!

SINJORO KARMONA (*forirante*)

Nu, parolu kun ŝi, kaj Dio kompatu vin!

Rozo

Fartu bone!

SINJORO TRILLES

Pensu ke pro via senkonscienco, vi kaŭzas grandan  
malgajon al Manuelo!

Rozo

Vi kaŭzis al li, unu ĉiutage kaj ĝi ne estis por lia feliĉo.  
Mi donos al li nur unu, unu! sed la mia estos por savi lin!  
(*Sro. Trilles foriras kun Johano Romeŭ. Alberto eniras  
la ĉambron frotante siajn manojn.*)

---

## SCENO IX.<sup>a</sup>

ROZO, SINJORINO AMPARO KAJ POSTE ALBERTO

SINJORINO AMPARO

Bone, ili jam foriris. Kion vi deziras diri al mi?

Rozo

Mi volas... mi volas peti de vi grandan servon. Servo  
pro kiu mi estos al vi danka dum mia vivo, se vi ĝin faros  
al mi!

## SINJORINO AMPARO

Diru.

Rozo

Ke vi, kaj via filino foriru el tiu ĉi domo.

SINJORINO AMPARO

Kion vi diras?

Rozo

Ke vi foriru, kaj forlasu mian filon! ke vi lasu lin vivi! ke vi ne malordigu lin! ke se vi, tiel amas lin kiel, vi diras, vi savu lin, redonante al li la sanon, kiun vi elprenas de li?

SINJORINO AMPARO

Sed ĉu vi vere tion diras? Ĉu vi serioze parolas?

Rozo

(*Genufleksante antaŭ la piedoj de sinjorino Amparo*).  
Genufleksita mi petos tion! Plurante per la koro, kun mia vivo! Lasu lin, je mia savol! Mia filo estas la sola afero, kiun mi havas! Li estas la heleco, kiu restas al mi!

SINJORINO AMPARO

Sed aŭskultu. Ĉu vi frenezigiĝis? Kiu elprenis vian filon, por paroli kiel vi parolas?

Rozo

Vil! Vi iom prenas lin al mi! Vi enŝlosis lin tie ĉi kiel pentrafiganta malliberejo! Ne unu tagon vi permesas, ke li iru hejmen kie estas tiom da brakoj, kiuj lin atendas! Vi mortigas kaj malordigas lin! Vi diboĉigas lin!

SINJORINO AMPARO

Sinjorino Rozo!

Rozo

Pardonu min, ĉar mi ne volas ofendi vin! Mi nur deziras, ke vi redonu al mi Manuelo'n. Mian Manuelo'n ke vi ne redonu lin, se vi ne volas, al mi, sed ke vi lasu lin solal ke se mi kontentiĝos vidante lin, kaj mi mortus se mi



ne vidus lin, pli facile vi povus lasi lin ĉar vi nur havas lin  
por kapricol

SINJORINO AMPARO

Nu, silentu, kaj ne diru sensencaĵojn! Kiu ajn aŭskultus  
vin, kredus ke ni estas kio ajn!

Sciu, sinjorino Rozo, ke mia filino estas tiel honesta,  
kiel iu ajn alia!

Rozo

Nu, se ŝi estas tiel bona, kiel vi diras, ke ŝi lasu lin, li ja  
ne estos, la unua, kiun ŝi lasis!

SINJORINO AMPARO

Ne insultu min, kaj pensu ke ni estas edukitaj!

Rozo

Foriru, kaj mi ne insultos vin!

SINJORO AMPARO

Kaj pro kio ni forirus, infanino! Se vi havas tion en la  
kapo, enmetu ĝin en la piedojn! Ĉu vi jam ne atentis, ke  
vi sencece parolas!

Rozo

Pensu ke mi parolas al vi per la koro, kaj ke alimaniere  
mi parolos! Pensu ke mi akceptos keoni piedpremu min sed  
ne, ke oni piedpremu lin! Ke mi jam sufiĉe suferadis, kaj  
ke mi ne povas plu! ke se vi amike ne foriras, mi perfortos  
vin toriri! ke mi estas vilaĝanino, kaj malgraŭ ke mi ne  
scias legi leteron, mi scias legi la perfidajn vizaĝojn, eĉ se  
ili estas maskovestitaj!

SINJORINO AMPARO

Silentu, vi ne estas edukita! Se ili ambaŭ enamiĝis,  
kion mi faris por ke ili enamiĝu?

Rozo

Dormil

SINJORINO AMPARO

Reĝino de l'ĉieloj Sed, ĉu via filo, estas ankoraŭ infano?

Rozo

Por mi jes!

SINJORINO AMPARO

Ĉu Isabelo ne estas honesta knabino?

Rozo

Ne!

SINJORINO AMPARO

Jesu! Ĉu ŝi, kiu ĉiam provizis por mi, ne estas pli inda ol la juvelo, via Manuelo, kiun vi estis devigita nutri?

Rozo

Ne, mi rediras al vi. Se vi estus maljuna aŭ paralizita, kaj ke ŝi nutrus vin laborante, tiel, kiel ni kamparanoj komprenas la vorton «laborante» tiam vi povus paroli tiel, kiel nun vi parolas; sed vi nur suferas pro dormemo .. pro dormemo, kaj en la vilaĝo, tie en mia vilaĝo, ni ne kredas je la dumtagaj dormadoj.

Kiuj suferadas pri tio, kaj bonfartas, tiujn ni nomas mallaboremaj kaj malnoblaj.

SINJORINO AMPARO

Kia senhonteco!

Rozo

Tie, kvankam ni ne eklernis tion, ni scias, ke sendante filojn en la mondon, ni devas oferi nin. Kaj ĉu vi scias kiel sinjorino Amparo? Ĉar, tial ke kiam ni sendas ilin ni, ne petas iliajn konsentojn, ni devas vivi ĉar ni donis al ili la vivon!

SINJORINO AMPARO

Kaj, ĉu mi ankaŭ ne oferis min por la feliĉo de mia filino? Sciu, ke per helpi ŝin, mi enmetis flanken mian fiercon, ke mi vidis kaj nenion mi diris, ke mi eĉ kaŝis mian honton, por ke ŝi estu kontental Ĉu vi kredas ke la sola patrino vi estas.

Rozo

Eliru, ĉar tiu ĉi nomo ne decas al vi!

SINJORINO AMPARO (*malplilaŭtigante la voĉon*)

Nu, ni trankviliĝu kaj ni forgesu! Pensu pri la ambaŭ feliĉo, ĉar ili povas ankoraŭ esti feliĉaj!

Rozo (*energie*)

Neniam! Ĉar ne sufiĉas forgesi! Oni forgesas la kulpojn, sed oni ne ŝanĝas la karakterojn. Mia knabo, kiel li vidis la ekzemplon, naskiĝis por labori, kaj via Isabelo por afekti, ĉar ankaŭ ŝi vidis tiun ĉi ekzemplon: la ekzemplon kiun vi donas al ŝi akompanante ŝin ĉe virajn hejmojn, ne pro timo ke ŝi perdiĝu, sed pro timo ke vi mem perdiĝu! Post tio ĉi mi diras al vi eliru, kaj ni finu!

SINJORO AMPARO

Insultema! Maldelikatal! Senhonta!

Rozo

Foriru! Voku vian Isabelo'n kaj vi ambaŭ foriru!

SINJORINO AMPARO

Certe vi ne atingos tion ĉi.

Rozo

Vi kuraĝas diri, ke mi ne atingos tion ĉi?

SINJORINO AMPARO

Malfeliĉulino vi neniam atingos tion ĉi! Vi estas la mastrino de la bakejo, sed tie ĉi ni ne estas en la bakejo!

Rozo

Mi eĉ forpeligos vin el la domo!

SINJORINO AMPARO

Se l'knabo konsentas pri tiol!

Rozo

Mi ne atendas la knabon! (*Prenante al ŝi je la brako*)  
Nun! Ekster la domon, mi diras al vi!

ALBERTO (*elirante kaj ilin dissigante*).

Bone, sufiĉe! Vi atendu Manuelo'n kiu ne povas malfrui!

Rozo

Nel For mi diras!

SINJORINO AMPARO (*kurante al la pordo de la ĉambreto*)

Isabelo! Isabelo!

SCENO X.<sup>a</sup>*La Savaj kaj ISABELO*ISABELO (*elirante vestita per strato vesto*)

Kion vi deziras? Kio estas tiuj ĉi ekkrioj?

Rozo

For, vi ambaŭ!

SINJORINO AMPARO (*sufokigante*)

Aj, ĉiela Jesuo!

ISABELO

Ĉu tio okazas!

SINJORINO AMPARO

Tiu ĉi virino insultas min! Insultas nin! Li diris por ni la vortojn pli malhumilegajn kaj maldelikatajn! Kaj ŝi volas forpeli nin el tiu ĉi domo! Ŝi volis forpeli nin kvazaŭ ni estus hundoj!

ISABELO (*post ekridego*).

Ĉu vi malpacas pro tio? Ne korpreniĝu, mi jam atendis tion! Antaŭ longe, ŝi sekvas min, kaj tial ke ne sufiĉas al ŝi malhelpi, nun ŝi spionas!

Rozo

Mi nur plenigas mian devon estante vigla. For!

ISABELO

Ne mallerte agu sinjorino Rozo, ĉar tie ĉi ni ne estas en la kamparo!

ROZO

Mi estas ĉe mi! Mia estas ĉe mia filol

ISABELO

Ĉe li, mi konsentas; sed li ne estas vi, dank'al Dio! Multe ja estas la diferencol

SINJORINO AMPARO

Certe ĝi estas multe!

ROZO

Mia filo agos kiel mi diros al lil

ISABELO

Ho ve; mi eĉ kompatas vin!

ALBERTO (*al Isabelo*)

Silentigul

ISABELO

Kredu, ke vi estas malbone lokita tie ĉi! Vi similas al terpota verbeno enmetita en oranĝeriol

Rozo (*duone plorante*).

Knabol ¡Knabol...

ISABELO

Ni jam gardos al vi vian knabon! Ni gardos lin, por vi, enmetita en kotono! Per kotono aŭ fajlo, ĉu vi komprenas? Ni peklos lin por ke la raŭpo ne mangu lin! (*Si ekridegas*).  
Kia ridinda virinol

ALBERTO

Silentu, mi diras!

ISABELO

Jes, mi silentos, ĉar ci tion ordonas al mi, kaj mi sekvos ciajn konsilojn. Kiel ci jam donis ilin tiel bonajn al Manuelo, kaj tiel rebrilis liaj vestaĵoj, kiam li sekvis la arton, kiun ci predikas, ci ja povas ekkrii, malspritulol

ALBERTO

Se la vestaĵoj ne rebrilis al mi tio, estas ĉar mi ne luigis la korpon por ilin vesti!

SINJORINO AMPARO

Malbonulo!

ISABELO

Ne malpacu patrinol! Kompatindaj! nek unu, nek la alia  
varolas pafadon!

ROZO (*plorante*)

Knabo! Knabo! (*Manuelo eniras*).

SINJORINO AMPARO

Silentu se vi povas, maldelikata! Jen vi havas vian filon!  
Vian fileton!

ALBERTO

Petolulinoj!

Rozo (*plorante*).

Fi-virinoj! Fi-virinoj! Pli ol fi-virinoj!

---

## SCENO XI.<sup>a</sup>

*La Samaj kaj MANUELO*

MANUELO

Patrinol Isabelo!

Rozo

Knabo! Filo mia! Dio sendas vin! Rapidu je Dio! Por  
cia! Por mi! Forpelu tiujn ĉi virinojn el la domo!

MANUELO

Kion vi diras?

Rozo

Ilin forpelu, por cia savo!

MANUELO

Kion vi diris!

Rozo

Ili trompas cin! Ne amas cin! Kaj deziras diboĉigi cin!  
Ili ankaŭ malamas min!

MANUELO (*al Isabelo kaj al Sinjorino Amparo*)

Ĉu vi?

ISABELO

Lasu diri!

Rozo

Jes, ili trompas cin, kaj diboĉigos cin, filo mia!

MANUELO

Ĉu ili trompas min? Kun kiu ŝi trompas min? Diru,  
kun kiu?

Rozo

Kun ciaj amikoj! Kun ĉiuj!

MANUELO

Patrino, ne diru tion, kion vi ne scias.

SINJORINO AMPARO

Verel!

Rozo

Nu, jes, mi scias tion. Demandu ĝin al sinjoro Kar-  
mona.

MANUELO

Silentu, se vi certe ĝin ne scias. Malvere, vi ne atestu.

Rozo (*plorema*)

Jes mi scias tion!

MANUELO

Mi ne kredas vin! Kun sinjoro Karmona, ne eble!

Rozo (*energie*)

Do, bone: tial ke ci ne kredas min, ke mi perdis la kre-  
ditaĵon antaŭ ciaj okuloj, mi nur havas por diri ke ci elektu:  
ili aŭ mi, ekster la domo!

MANUELO

Nek ili, nek vi.

ROZO

Mi rediras al ci, ili aŭ mi.

MANUELO

Sed donu al mi la tempon, kaj mi pripensos. Kiel vi volas, ke mi decidu tielan dubon!

ISABELO

Mi jam decidos anstataŭ ci! Mi ne volas homojn, kiuj dubas! Mi foriras! Kaj mi foriras por ĉiam tial, ke ci ŝatas tiun ĉi virinon!

MANUELO

Rememoru, kiu estas, tiu ĉi virino!

ISABELO

Do restu kun ŝi (*al sinjorino Amparo*) kaj ni foriru!

MANUELO

Sed aŭskultu! Aŭskultu unu momenton! Atendu!

ISABELO

Mi ne scias, kial mi tiom atendis cin nek, kial mi aŭskultis tiom da sensencaĵoj! Restu kun ŝi, kompatinduleto! Kun la kalumniantino... kun la... mi ne volas tion diri, kaj denove faru pentraĵojn... malgajajn kun cia amiko... mizeral, kun tiaj malspritaĵoj idealojn, kaj kun la Sinjorino Abstinencol (*Ŝi ekridegas*). Kompatinda artisto! Se ci ne penigus, ci naŭzigos al mi! Ni iru patrinol! En tiu ĉi virta domo oni ne povas jam vivi plu!

MANUELO

Aŭskultu...

ISABELO

Ni iru, patrinol!

SINJORINO AMPARO (*al Isabelo*)

Sed...



ISABELO (*al sinjorino Amparo*)

Se ili sendos por ke ni revenu...

MANUELO (*irante al la pordo*)

Isabelo! (*Alberto prenas lin kaj elŝetas lin internen*).

ISABELO (*de la pordo*)

Malriĉuloj! (*Ŝi foriras kun sinjorino Amparo*).

---

## SCENO XII.<sup>a</sup>

ROZO, MANUELO kaj ALBERTO

MANUELO

Kion vi faris patrino, kion vi faris? Kion ili faris al vi por forpeli ilin tiamaniere? kaj, kion mi faris por ke vi ilin forpelu?

Rozo (*timigita*)

Filol

MANUELO

Ĉu vi ne vidas, ke ili ne revenos! Ne! Ne revenos! Kaj mi deziras, ke ili revenu! Ili estu kiel ajn, sed ke ili ne forirul! Mi tion ne volas! Vi ne havis la rajton forpeli ilin!

Rozo (*plorante*)

Pardonu min, filo mia!

MANUELO

Vi ne havas la rajton malbone paroli pri ili! Ili nenion faris al vi! Ne ankaŭ al mi!

ALBERTO

Ĉu ci kuraĝas diri ke ili nenion faris al ci? Do, sciu, ke cia patrino lasis multe por diri?

MANUELO (*indigninta*)

Alberto!

ALBERTO

Ne, se ci ne silentigos min! Se ci ne ŝatas tion, kion mi diras, mi reiros al mia mansardo, kaj nenion ni ŝuldas unu al la alian... Ĉu ci deziras aliajn certigojn pri kiuj ili estas post la adiaŭo, kiujn ili faras al ci?

MANUELO

Oni insultis ilin, kaj ili defendigis! Kion alian ili povos fari ol defendi sin mem!

ALBERTO

Sed Manuelo, ne estu malspritulo. Ĉu ci kredas ke ci havis virtulinon ĉe ci?

MANUELO

Ne! Mi tion ne kredis! Mi la ŝian jam konas. Sed malgraŭ tio mi ŝin amas! Ŝi revenos ĉar mi amas ŝin. Mi kutimiĝis al ŝia ridado! al ŝia rigardado! Al ŝil! Al ĉio ŝia! Eĉ mi kutimust! al ŝiaj malvirtoj! Ŝi alportas al mi la sanon, la vivon! kaj sen ŝi mi ne povos vivi! (*Roxo iras al fundo kaj tie ŝi restas plorante.*)

ALBERTO

Ĉu ci kredas esti artisto? Ĉu ci parolas pri idealoj, kaj antaŭ peco de materio, ci ne rememoras pri tio kion ci predikas? Se oni nomas tion esti artisto, mi eksigas el la korporacio!

MANUELO

Sed, se estas ŝi, mi juras ke ŝi estas, kiu kuraĝigas min labori!

ALBERTO

Silentu almenaŭ, kaj hontu! Montru al mi la pentraĵojn, kiujn ci faris per ŝil! Pentraĵoj por vendisto! Malindaj pentreĵoj! Foiraj pentraĵoj por rekolti monon, por ke ŝi povu pagi siajn kapricojn!

ALBERTO

Ne, Alberto, ŝi ne estas kulpa: estas mi!

ALBERTO

Ci ambaŭ, kaj la pliaĵo, kiu akompanas vin! Se ci venis en la mondon por fari la marioneton, klare parolu al mi, kaj serĉu amikon por ci: sed se ci havas ankoraŭ iom da nobleco, kaj ci deziras labori kiel decas al ci, laksiĝu cia intelekto el sensecaĵoj kaj plialtiĝu, malbono fulmo! kaj ne malhonoru la klason!

MANUELO

Mi diras al ci, ke ŝi ne estas kulpa!

ALBERTO

Nu, kiu? Ĉu mi? Ĉu tiu Isidro de cia vilaĝo, kiu rostiĝadas apud la forno ĉar ci fidas pri ci kvankam li ne komprenas cin?

MANUELO

Tio estas vera!

ALBERTO

Ĉu cia kompatinda patrino, kiu elŝiris sian vivon por ĝin sendi al ci monate, per rebrolantaj moneroj je ŝvito? Ĉu ci ne ĉagreniĝas diri antaŭ ŝi la insultojn la sensecaĵojn, kaj la mizerajn vortojn, kiujn ci diras? Kompatinda!... se restas ankoraŭ al ci iom da honto, rigardu ŝin!

Rozo

Knabo! Se ci estas malgaja, mi iros serĉi ŝin por ci!

ALBERTO

Ĉu ci ne aŭdas kion ŝi diras al ci, kvazaŭhomo?

MANUELO (*irante al Rozo*)

Pardonon patrinol Estas mi kiu devas peti de vi pardonon!

Rozo

Ne, filo mia. Kion ci devas fari, tio estas reordiĝi!

ALBERTO

Ĉu ci ne aŭdas tion?

MANUELO

*(genufleksante antaŭ la piedoj de sia Patrino)*

Pardonon! Mi estis konfuzita! Mi ne scias kion mi faras kaj nek, kion mi diras! sed ne suspektu unu momenton ke mi deziris ofendi vin! Vi estas ĉio, por mi, en la mondol Per ŝi mi deziris krei la verkoni la pentraĵon, kiu eltiros min el la malheleco! kaj de vi la altaron por alporti ĝin tien!... kaj mi vidas ke mi eraris!

ALBERTO

*(kiu antaŭ la tolo estis observante lian patrinon)*

Ĉu ŝi la aferon de la pentraĵo? Alvenu. *(Manuelo alproksimiĝas Alberto'n)*. Alvenu mi, diras al ci! *(Montrante Roĝo'n)* Ĉu ci ankoraŭ ne vidas la pentraĵon?

MANUELO

Estas verol

*ALBERTO (aldonante karbakraĵonon al Manuelo)*

Do prenu, granda infano! Jen ci havas la pentraĵon! Cian pentraĵon!... Se mi havus patrinon, ankaŭ mi fariĝus fama farante ŝian portreton! .

*(Manuelo per la mano atentigas la patrinon ke ŝi ne moviĝu, li kisas la tolon kaj komenĉas desegni ŝin)*.

**Kurteno**

## AKTO KVARA

---

*(Sama sceno kiel en la unua akto. Forpasis, cirkaŭe ses jaroj, sed ĉio estas sama kiel antaŭe; la trogoj, ŝoveliloj kaj sakoj estas lokitaj kiel, kiam la agado Komenciĝis).*

---

## SCENO UNUA

---

ISIDRO, BAJLET KAJ, SINJORO JOHANO

*(Kiam la kurteno levigas, Bajlet donas brancarojn al Izidro, kiu ilin enmetas en la fornon. Sinjoro Johano sidas en la vendejo legante la ĵurnalon).*

IZIDRO

Rapidu! Iom post iom donu al mi ŝtipojn... Kaj al la forno!

BAJLET

Ne laciĝu, avo. Donu ilin al mi. Mi jam ilin enmetos!

IZIDRO

Kio estas, laciĝi? Antaŭ multe da jaroj mi enmetas en la fornon ŝtipojn, kaj nun mi laciĝus?

BAJLET *(ridante)*

Pro tio, mi ĝin diras al vi, ĉar de longe vi faras tion.

IZIDRO

Nu, kie ŝtipojn oni jam enmetis tie, oni sekvas ilin enmeti.

## BAJLET

Sed ĉu vi ne vidas, ke vi estas, jam duone kuiritan pro maljuneco? Ke vi jam estas same kiel senmolaĵa pano!

## IZIDRO

Sed la krusto, kiun restas al mi, estas kolorita, bone kuirita kaj firma! Ĝi ne estas kiel tiu de la nuntempaj junuloj, kiuj estas faritaj same kiel biskvitaĵo! Mi devas morti apud la forno! Ĉiu devas morti apud sia forno, kaj la tago, kiam alvenos mia lasta horo, ĝi ne estos pro manko de vivo, sed nur de ŝtipoj!

## BOJLET

Rilate la panknedado, vi ja multe knedadis!

## IZIDRO

Nenon alian mi faris ol knedi. Se knedi por tiuj, kiuj malŝatas, estas kompatemaj faroj, la ĉielo bone akceptos min «Kion vi faris en tiu mondo?—demandos min Sankta Petro, tuj kiam li aŭdos la sonoriton—Knedi panon.—mi respondos a. li!—Kiom da ĵaroj?—Vi men kalkulu ilin, Sankta Petro.—Ĉu ni kalkulos sepdek?—Ni tiele kalkulu.—Nu, eniru, kaj Dio estu laŭdata!»

## BAJLET

Bonege parolita!

## IZIDRO

Kompatinda domo, se en ĝi ne estus estinta mia knedado! Mi ja havas nenion por diri, nek pri la mastrino, nek pri la knabo nek pri ci, nek pri mi mem. Ĉiuj bonaj personoj... sed kompatinda domo!

## BAJLET

Sed vi jam vidas kiel oni parolas pri la knabo! En la vilaĝo, en la nacio, kaj ĉie oni parolas pri la pentraĵo kiun li prezentadis!

## IZIDRO

Mi tion scias.

## BAJLET

Kaj la pentraĵo estas la portreto de la mastrino!

IZIDRO

Ankaŭ tion mi scias, kaj de la kapo ĝis la piedoj, tia kia ŝi estas! Sed mi rediras al ci, kompatinda domo!

BAJLET

Kaj kie li prezentis ĝin, oni diras ke eĉ la reĝo iris tien por vidi ĝin, kaj ke li stariĝis aŭtaŭ ĝi kaj diris al la lakeoj kiuj estis apud li: «Muy bien! Muy bien!» (Tre bone, tre bone) du foje, kaj ke ili respondis: «Es verdad!» (estas vero!) kaj ke oni deziras doni al li ateston!

ISIDRO

Kaj el kie ĉi eliris tion?

BAJLET

Vidu? Tio ĉi estis skribita en ĵurnalo *La Comarca* (komarka) kaj ne unu, el ili ĉiuj parolis pri tio! Tiu de la kazino, tiu de la kafejo kaj tiu de l'aptekisto, la saman tagon skribis tion!

IZIDRO

Naivulol! Ĉu ci ne komprenas, ke oni presas ilin samtempel!

BAJLET

Estas la sama por mi, ke oni ilin presu aŭ nel! La ĉefa afero estas, ke ili multe laŭdas lin! Izidro: mi ankaŭ dezirus esti pentristo!

IZIDRO

Silentu aŭ mi forpermesas cin, senhontemulo! Ni havis nur unu, haj ci jam vidas kiom da kontraŭaĵoj tio okazis: Kiam la afero malbone funkciadis, tiam ĉar tio estis tiela, kaj tuj kiam ni ricevas bonajn novaĵojn, tiam okazas al la naivulino, lia patrino, tiu akcidento! kaj pro kio? nul fulmoj! pro gajeco! Nu bone, mi ne komprenas la vironojn!

BAJLET

Mi ne aukaŭ!

IZIDRO

Kiel ci volas ilin kompreni, bubeto!

BAJLET

Nu bone, Izidro, ne kolerigu pro tio, ĉar tial ke l'knabo alvenas, ĉio finiĝas!

IZIDRO

Sed li jam devus esti tie ĉi. De ses jaroj kiam li migras, ne unu foje li venis tien-ĉi, ŝajnas al mi ke jam estas deca tempol

BAJLET

Tute certel

ISIDRO

Kaj ĉu ci scias, kial li ne venis?

BAJLET

Mi ne, kaj vi?

IZIDRO

Li ne venis, ĉar li hontis.

BAJLET

Tute nel

IZIDRO

Li hontis, ĉar li maltrafis la fermentilon. Sed se li jam faris bonan bakadon, kaj li estas jam oficisto, kiel oni diras, kaj ke li povas gajni bonajn monerojn, nun li jam povas veni kontenta. La tago kiam li foriris ŝajnis, ke ni vidas foriri la vilaĝan feliĉegulon, kaj nun eĉ oni iros ricevi lin, kvazaŭ la *elektitan* deputaton.

SINJORO JOHANO (*enirante la postvendejon*)

Izidro! Izidro! Rigardu, kion mi legis en la ĵurnalo! oni parolas pri la knabo, kaj tute regule!

IZIDRO

Se oni malbone parolas ne legu ĝin al ni!

BAJLET

Tute nel



SINJORO JOHANO

Kaj kial oni mialbone parolus! Aŭskultu! (*Legante*). «Ni povas sciigi niajn multnombrajn legantojn, pri novaĵo, pli ol plaĉa, por tiu, kiu ŝatas la progresadon de tiu ĉi mormoderata malgranda patrujo, amanta la grandan patrujon. Ni havas kredindajn sciigojn, kiuj ne estas kontraŭdiritaj, ke la tasko de nia samvilaĝano la pentristo Manuelo Pujol (Pujol)...»

BAJLET

Ĉu nia samvilaĝano estas la knabo?

IZIDRO

Kaj kiun do ci volas, ke ili nomu, malspritulo?

SINJORO JOHANO

«...la pentristo Manuelo Pujol, jam de tiu ĉi historia momento, klera kiel samtempe juna, estos baldaŭ laŭreata per multkosta rekompenco. *La Comarca*, la popolo amase, la riĉuloj, la amikoj, kaj ĉiuj intelektuloj kiuj ĉiam antaŭenpuŝis siajn konsilojn al la nobla probatalanto de la nobla arto, sentas nin... k. t. p. k. t. p. Nun sekvas multe da *ni sentas nin* kiel oni kutimas en tiuj ĉi okazoj. Kio ŝajnas al vi? Nu, kion vi diras?

BAJLET

Bonege, mi diras!

IZIDRO

Tio estas, ke oni donas al li diplomon!

SINJORO JOHANO

Mi ne scias kion oni donos al li, sed ion oni preparas por li.

BAJLET

Ah! tio ĉi estas gloro!

SINJORO JOHANO

Tio ĉi neniel mirigas min. Kvankam mi agis kiel neŭtrala en la decaj momentoj, mi ĉiam diris al mi mem,

ke li fine estus fama viro. Jam al lia patro, li estu en la ĉielo, tion ci mi diris antaŭ ol li mortis: «Cia filo mi ne scias kio li estos». Kaj vi jam vidas, ke mi ne eraras.

## SCENO II

*La samaj kaj la SINJORO INSTRUISTO*

INSTRUISTO

Dio gardu ĉiujn vi el la malbono. Mi alvenas alportante bonan novajon! Ne unu: du, tri, kaj ĉiuj tri estas urgaj.

SINJORO JOHANO

Kio estas?

INSTRUISTO

Ke mi kaŝite sciis ke l'knabo deziras surprizi, kaj ke li estas alveturinta!

SINJORO JOHANO

Kaj kiel vi sciigis?

INSTRUISTO

Mi havas artan policon. Mi skribis al li ke la mastriro estas malsana, kaj li alvenas en la seshora veturilo.

SINJORO JOHANO

Ĉu tiun ĉi vesperon?

INSTRUISTO

Nun!

SINJORO JOHANO

Tiam li alvenas per la forportista veturilo.

INSTRUISTO

Per tiu ĉi aŭ per kiu ajn ĝi estu, sed li alvenas.

BAJLET

Vivu, kia plezur!

INSTRUISTO

Nu tio ĉi estas jam la malplej grava. Li alvenas plenglora oni donis al li la ĉefan medalon. La oran kaj laŭran! La Bonan! La regno aĉetis lian pentraĵon, kaj li revenas, kvazaŭ li estus: eminentecol

SINJORO JOHANO

Tio, kion diris *La Comarca*.

INSTRUISTO

Mi ne miksas min pri *La Comarca*'aj aferoj, sed, kion mi scias, tio estas, ke li triumfis!

SINJORO JOHANO

Mi tute ne miras pro tiol! Ĝus mi tion diris, kaj ĉiam mi diris tion.

INSTRUISTO

Mi ankaŭ, sed mi sciante, kial mi diris tion. Estas tri belecaj klasoj, sinjoro Johano! Estas *natura beleco*, *eksterordinara beleco*, kaj *beleco prope nomita*. Kaj kiel li sekvis la *prope*, kiun mi enradikigis al li, al mi! al mi, li ŝuldos sian gloron!

SINJORO JOHANO

Mi dubas pri tiol

INSTRUISTO

Ni jam *sagece* diskutos tion, ĉar ni havos tempon por diskutadil Nun preparu la mastrinon. Kaj mi iros vidi la urbkonsilantaron por ke ili tuje, decidu fari ion pruvon al nia unua glora flol! Kaj poste akcepti la knabon. La faman knabon! Mia instruito! La nura lernanto, kiun mi havis, pri kiu mi povas esti flera, ke li estis tial (*Li foriras. Bajlet sekvas lin kaj restas en la vendejo*).

---

SCENO III.<sup>a</sup>

SINJORO JOHANO kaj IZIDRO

IZIDRO

Jesuo, Jesuo kaj ĉiela Diol! Kia gajeco kaj kia momento por nia kompatinda mastrino!

SINJORO JOHANO

Eble troel Oni devas prepari ŝin, kaj atenti multe, kiel oni diros tion al ŝi!

IZIDRO

Mi jam tion diros al ŝi kaj laŭ mi kredas! Unue ke eble li ne venos; due ke eble ne aŭ jes; kaj poste, ke ni estu akurataj, ke li jam alvenas! Tiel dirita; per ekpuŝoj kaj haltaĵoj vi jam ekvidos, kiel ŝi ne atentos pri tio!

SINJORO JOHANO

Rapidu dol! Irul! Sed precipe...!

IZIDRO

Lasu fari min sinjoro Johano. Atendu min!

SINJORO JOHANO

Silentu, jen ŝi estas! (*Rozo eniras apogante ŝin sur la seĝaro*).

IZIDRO

Despli bone! Proksime de la forno mi estas pli kuraĝa

## SCENO IV.<sup>a</sup>

*La samaj kaj Rozo*

IZIDRO (*al Rozo*)

Mastrino, nu kio okazis al vi? Kial vi eliris el la ĉambro?

Rozo

Mi multe timas esti proksime de la lito.

IZIDRO

Sed virino...

Rozo

Mi timas pro mia morto, kaj mi ne volas mortil! Mi ne volas ankoraŭ mortil!

IZIDRO

Sed, kiu parolas pri tio!

ROZO

Mi sentas min maljuna! Tre maljuna!

IZIDRO

Milfulmoj! Se vi maljuna vin juĝas, kiel mi devas nim  
juĝi, kiam mi jam perdis la kalkulom de miaj jaroj!

SINJORO JOHANO

Tute certel

IZIDRO

Mi jes, jam maljuniĝas, ho ve! Kaj tial, la tombisto  
jam salutas min, kaj la vikario estas al mi afabla! Sed vi...!

ROZO

Sendube ne estas la jaroj kiujn oni havas, kiuj maljuni-  
gas, sed la okazintaĵoj de la vivo!

SINJORO JOHANO

Sed ni vidu, resume kion vi havas?

ROZO

Ke mi estas laca! Tre laca! Mi dezirus ripozi kaj fermi  
la okulojn, sed vidante antaŭe, tion, kion mi deziras vidil  
(*Sinjoro Johano alportas al ŝi seĝon*).

IZIDRO

Nu, se vi estus preta por ricevi bonan novaĵon, nova-  
ĵon, kiu vin ne malordigus, ni donus al vi unu el tiuj,  
kiuj revivigas la personoj!

ROZO

Kio estas?

IZIDRO

Estas... Estas ke ni eĉ ne kuraĝas tion diri al vi tiom ĝi  
devas vin gajigi.

Rozo (*per granda kuraĝo*)

Mi tion jam scias! Mia filo alvenas

• IZIDRO

Mil fulmoj! Kiu tion diris al vi?

Rozo

Vi parolas al mi pri gajecoj! Kaj pro kio alia mi povas gajigi, ol nur pro la alvenio de mia filol!

SINJORO JOHANO

Nu, tion vi divenis.

Rozo (*malsidiĝante*)

Kaj kiam li alvenos? Diru al mi kiam li alvenos?

IZIDRO

Do, li alvenos... ĉirkaŭe... post du tagoj.

Rozo

Tiel malfrue!

IZIDRO

Aŭ... morgaŭ.

/ Rozo

Ne. Vi trompas min!

IZIDRO

Nu, do, li alvenas hodiaŭ mem! Kaj nun, tial ke vi estas jam preparita, jen per unu fojo la novaĵo: eble li estos tie ĉi antaŭ ol... duono da horol

Rozo

Ne estas eble! Tiel rapide, ne estas eble!

SINJORO JOHANO

Nu ĝi estos, kaj plie alia surprizo. En tiu ekspozicio, kien li sendis la pentraĵon, kiun vi jam scias, tie oni donis al li la ĉefan premion!

Rozo

Ĉiela Dio! Por lil Por lil Dankojn!

IZIDRO

Kaj tio okazis pro via portreto, mastrino!

Rozo

Ĝi ja estas la sola bonaĵo, kiun mi povis fari por lil! De nun mi ŝatas miajn blankajn harojn kiuj estas utilintaj por liaj deziroj! Isidro en la mondo, mi jam plenumis mian devon. Se estas certe, kiel ja tio estas, ke la patrino estas la arbo de la filo, mi jam fruktodonis! mi jam povas mortil (*Si lasas sin fali kvaraŭ laciĝinta su segeĝon*).

SINJORO JOHANO

Nu, virino, trankvilecon!

Rozo

Mi neniam ja estis tiel trankvila! Mi deziras morti, sed antaŭe, mi deziras vidi lin! Mi deziras vidi kaj havi lin apud mi! Mi deziras diri al li, ke li ne sopiru al mi, pro mia baldaŭa manko! tial ke mi jam faris ĉion eblan por lil! Tion, kion povas fari malriĉa virino, malriĉulino kiel mi, kiu nur volon kaj larmojn havis por doni al lil

IZIDRO (*kortuŝita*)

Sed kion vi diras nun? Ni pensis kontentigi vin kaj kontraŭe ŝajnas, ke ni penigas vin!

Rozo

Malzorgu kion mi diras. Antaŭ du tagoj, kiam okazis al mi tiu malsano, mi kredis ke mi plu jam ne vidos lin, kaj nun kiam mi scias ke mi vidos lin, mi estas malgaja pro tiel granda gajeco. Vi jam vidos! Vi jam vidos kiel bela li revenos! Kiel juna, kuraĝa kaj vira! Mia filo certe estas kontenta! Kaj vi vidos ke kiam li estas tia, ĉar kompatinda li jam malmulte povis esti tial, tiam li fariĝas bela, kiel suno! Almenaŭ mi kredas ke li fariĝas tial! Mi ne scias ĉu miaj okuloj trompas min, kaj se ili trompas min, benataj ili estu!

SINJORO JOHANO

Tio, ja estas virino! Kuraĝon kaj antaŭen!

## IZIDRO

Kaj ne estu malklera, je mil fulmoj! Li jam certe estos tre kontenta reveni hejmen! Konita hejmo valoras pli ol tridek palacoj konotaj!

## Rozo

Izidro mi tion scias. Kaj ĝi estas tiel certa, ke eble vi kredas ke mi malordemas, kvankam mi ne estas nek iam estis tia; sed mi deziras ke li ĉion trovu same kiel la tagon kiam li foriris! se eble, kompatinda je mi! mi gardus lian lulilon, liajn infanajn vestojn, eĉ la ŝviton de la muroj! por ke li sin kredu infano! Ni patrinoj dezirus ke la filoj kreskiĝu, sed haltigante ilian kreskadon! Ke ili rapide fariĝu viroj, sed ke ni povu ilin subteni per niaj brakoj!

## SINJORO JOHANO

Nu, Rozo ja neniu estus aginte, kiel vi!

## Rozo

Mi ne scias kiel la aliaj patrinoj estas, sed mi nur estis tio: patrino! Ĉiam patrino! Ĉiam kaj ĉiuhore patrino! Ĉiam ŝajnis al mi, ke mi estis la tero kaj li la floro kiu naskiĝis de mi... Ke mia animo ne estingiĝos mortiĝante: ke ĝi daŭrigos vivante kun li!... Kaj ke nenia plezuro en la mondo estas tiel granda kiel suferadi pro tiu, kiun oni amas!...

## IZIDRO

Mil fulmoj, vi devas esti prava! Ĉar eĉ al mi kiu estas obstina okazas tio.

## Rozo

Jes Izidro. Tial li venu! li venu baldaŭ! Kiam mi povis iri vidi lin, tiam mi jam faris tion, sed nun mi ne povas... li venu! li revenu, kaj suferadoj, korporetoj, mizero, kaj ĉio, ĉion mi enhavigos inter miaj brakoj, inter tiuj ĉi miaj falantaj brakoj, sed sufiĉe fortaj por akcepti lin...!



## SCENO V.<sup>a</sup>

*La samaj*, MANUELO, ALBERTO, SRO. INSTRUISTO  
kaj BAJLET.

BAJLET (*elirante, elirante kaj ekvokante Izidro'n aparte*)

Izidrol li jam estas tie ĉi! Li alvenas vestita kiel sinjorol

IZIDRO

Silentu, kaj foriru. (*Enirante*) Mastrino: la koro diras al mi ke la knabo devas esti proksima de tie ĉi...!

Rozo (*levigante kaj deŝirante iri al la pordo*)

Kie li estas? Li venul Li tuj venul

SINJORO JOHANO

Trankvilecon! Trankvilecon!

ROZO

Nel Lasu min iri akcepti lin!

SINJORO JOHANO

Vi ne devas eliri, ĉar jen li estas! Rigardu lin! Li komplimentas la vilaĝanojn kaj li eniras! (*Dum ili tiel parolis, Manuelo diras adiaŭ al kelke da admirantoj kiuj akompanis lin, ĝis la domo: preminte iliajn manojn, li eniras kun la Instruisto apogita sur lia brako. Tuj kiam li vidas la patriron, li ĉirkaŭpremas ŝin*).

ROZO

Manuelo! Manuelo el mia koro!

MANUELO (*kisante Rozon*)

Alian kison patrinol... Kion vi havas? Kion vi havis? Mi alvenas forlasante ĉion, ĉar oni diris al mi, ke vi estas malsana!

ROZO

Ne, filo mia! Eble oni diris ĝin al ci, por ke ci venu.

MANUELO

Kia plezuro se tio ja tiel estus, sed mi ne kredas tion.

ROZO

Oni ĝin diris al ci ĉar mi deziregis? vidi cin.

MANUELO

Nel Diru al mi la veron!

ROZO

Mi estis malsana, ĉar ci ne ĉeestis; sed nun ci alportas al mi la sanon!

MANUELO

Ĉu vi tion ĵuras al mi?

ROZO

Kredu al mi! Ili ne sciis kiel sciigi vin pri cia reveno!

IZIDRO

Guste! Tio: por ke ci venu!

MANUELO

Ĉu vere?

IZIDRO

Tiel certe kiel mi maljuniĝas... Sed trankviligu kaj rigardu nin, ĉar ni ankaŭ estas el karno kaj ostoj, kaj ni estas ankaŭ tie ĉi.

MANUELO

Vere, vi ĉiuj estas tie ĉi! Mi dezirus esti centbraka por ĉirkaŭpremi samtempe ĉiujn el vi! (*ĉirkaŭpremante Izi-dro'n*). Vi ĉiam la sama, ĉu vere, Izidro?

IZIDRO

Mi... ĉiam elĵetante jarojn en la fornon!

MANUELO (*premante la manon de sinjoro Johano*)

Kaj vi?

SINJORO JOHANO

Mi gardante la domon!

BAJNET

Kaj mi?

MANUELO (*ĉirkaŭpremante lin*)

La Bajlet'ol Kiel ci fariĝis viro, Bajlet'ol

BAJLET

Mi kreskadis! Ĉu ne vere, ke mi kreskadis?

MANUELO

Ĉio kreskis, por miaj okuloj.

INSTRUISTO

Kaj ci precipe! Ci alvenas fama artistol

MANUELO

Lasu tion pri la fama artistol! Mi alvenas kiel mi foriris!

ROZO

Ĉu kontenta, filo mia?

MANUELO

Vi demandas min, ĉu mi estas tio? Tio mi estas, kiel ekzilito kiu alvenas al sia lando. En la mondo nenio, tiel bona estas, kiel la emocio reveni hejmen! Kisi per la okuloj ĉion, kion oni amis: la murojn, la fornŝovelilojn, la ŝtipojn, la varmajn cindrojn de la forno, kiu neniam estingiĝis! Ĉion! Ĉion, kion oni vidis en la infaneco, kaj ĉion, al kio oni sopiras poste!

ALBERTO (*flanken, prenante la manojn de Rozo*)

Ĉu vere vi fartas bone?

ROZO

Aj Albertol

MANUELO

Lasu min enspiri ĉion ĉar ŝajnas al mi, ke mi enspiras rememorojn. Neniu princgardeno havas la parfumon kiun oni flaras en la domo, kie oni naskiĝis.

IZIDRO

Knabo, tiu ĉi odoro estas farunal

MANUELO

Izidro ĝi estas el lulilol! Ĝi estas nestal el tio, kion vi volos, sed ĝi revivigas!

ALBERTO

Pli ol tiu de la oleaj koloroj.

MANUELO

Jes, Alberto: laodoro de greno, de benko, kaj de vilaĝo ne enhavas venenon por la animo!

SINJORO JOHANO

Mi ĉiam tion predikis al ĉi!

MANUELO

Sed por, ke oni sentu tion, oni devas esti estinta longtempe malproksime, kaj esti suferinta tion, kion mi suferadis, alimaniere oni ne atentas pri tiol

INSTRUISTO

Kaj ankaŭ esti venkinte.

MANUELO

Oni bezonas lacigon. Ĝis tiam, kiam la koro estas kontenta ne estas eble, rigardi malantaŭen. La estinto oni ne vidas plezure ĝis kiam oni ripozas, kaj la pentristo ne havas tempon por ripozadi.

ROZO

Ĉu eĉ ne, por ekrigardi nin?

MANUELO

Por nenio. Nek por neniu el la mondo! La artistoj ni estas sendankemaj!

INSTRUISTO

Sed malavaraj. Mi konas ekzemplojn!

MANUELO

Tio jes! Dum la revaj momentoj, ni ne memoras pri tiuj kiuj suferadas, sed tuj kiam ni vekigas, ni irus semantaj la ĝojon, al ĉiuj anguloj de la tero. Mi pasis ses jarojn ne reveninte, kaj mi ĉion donus por tiu ĉi momento de mia alveno! Kiom da koro oni malŝparas dum la vivo!

IZIDRO

Tio estas, ke ĉi fariĝus bakisto?

MANUELO

Nun, nel Nun mi jam malsaĝamas la Arton!

ALBERTO

Kaj, oni amas ĝin malgraŭ ĝiaj malfidelecoj kontraŭ ni!

MANUELO

Nun mi rekomencus ne sole pro la ambicio venki, sed eĉ pro la voja suferado!

ALBERTO

Malgraŭ ke estas radkavoĵ sur ĝi!

MANUELO

Kvankam en ĝi estus profundegaĵoj. Sed ni lasu la galon ĉe l'pordo, kaj ni enirigu nur la gajecon!

ALBERTO

Bone parolitel! Akcizejo de malgajecon!

MANUELO

De malgajecon kaj mizeroj. Nun, ĉar mi devas pensi pri nenio, nek vendi mian vivon por travivadi, nek luigi la penson po horoj; nun kiam mi povas alveni kun tio, kion mi ellernis, la pano kiun mi elŝiris el tiu ĉi forno, ĉu vi scias, patrino, kion mi venas fari?

ROZO

Kion, filo mia?

MANUELO

Tion ĉi. Esti via filol! Neniam foriri el via flanko!

ROZO

Jes! Ĉi ne forirul! Neniam plu ĉi foriru.

MANUELO

Mi jam konvinkigis pri tio: Ke oni ne devas serĉi la pen-  
traĵojn malproksime: ke ili estas proksimaj de tio, kion oni  
amas. (*Rozo farigas kraĉaŭ duondormanta*).

SINJORO JOHANO

Jen tio, kion mi ĉiam diris al ĉi!

IZIDRO

Mi ne diris tion, sed mi pensas tion!

INSTRUISTO

Plie, ankaŭ tie ĉi, oni povas progresadi. Mi pruntos al ĉi librojn pri estetikol

MANUELO

Dio danku vin, Sro. instruisto, por tiuj ĉi libroj pri kiuj vi parolas. Gardu ilin en la grenejo de la rememoroj. Mi jam trovis la librojn: ili estas la vivo! Izidro knedante jarojn post jaroj, ja li estas libro: li estas Biblio! Biblio sankta de l'laboro! Bajlet'o estas silabaro. Vi antikveta vortaro—Sinjoro Johano liniilo, kaj vi, patrino, mia breviario, mia horlibro, kiun mi legos mian tutan vivadon! (*Li sidiĝas je la piedoj de Rozo*).

INSTRUISTO (*al Sro. Johano*)

Bone, ni lasu ilin, kaj ni iru prepari la surprizon! (*Li eliras kun Sro. Johano. Izidro kaj Bajlet starigas en la fundo*).

## SCENO VI.<sup>a</sup>

Rozo, MANUELO, poste IZIDRO kaj ALBERTO

MANUELO

Jes, patrino. Mi jam ardenas al vil Al vi sola, kaj por ĉiam! Ĉu vi estas kontenta, ke mi venis?

Rozo (*per malfortiginta voĉo*)

Multe!

MANUELO

Ĉu vi ekscitiĝis pro mia alveno? Ĉu ne vere, ke vi ne atendis min?

Rozo (*per voĉo malfortiganta rapide*)

Ĉiam!

MANUELO

Ĉu vi ne vidas kiel mi fariĝis viro? Ĉu oni sciigis vin pri malbonaj novaĵoj? Ĉu vi estas malgaja?

ROZO

Ne!

MANUELO

Kion vi havas? Ĉu vi memoras pri la estinteco? Ĉu vi ne ekvidas ke de nun vi estos feliĉega, ke jam finiĝis viaj suferadoj?

ROZO

Jes.

MANUELO

Ke mi jam plenumis viajn dezirojn!

Rozo (*per la kapo*)

Jes.....

MANUELO

Patrino, kion vi havas? Kion vi havas? Kial vi respondas al mi tie? Aŭskulku: ĉu vine fartas bone? (*ekkriante*) Izidró! Albertol!

ALBERTO

Kion ci deziras?

MANUELO

Mi ne scias, kio okazas al mia patrino! Mi parolas al ŝi, kaj ŝi ne respondas! Ŝi ne respondas al mi!.. Patrino!.. Patrino!..

ISIDRO (*kurante al la vendejo*)

Bajlet! Iru alvoki la kuraciston!

MANUELO

Aŭskultu min!... Aŭskultu min!...

ALBERTO

Ne alarmiĝu, ĉar tio estas nenio! Tio devenas nur pro kortuŝecol

MANUELO

Ŝi mortigas!.. Ŝi jam ne vidas min! Ŝi ne vidas min!..  
 Patrino ekvekigu.... Ekvekigu! Estas mi! Mi estas via filol  
 Manuelo! Via Manuelo, kiu estas apud vi kaj mortos, se vi  
 ne ekvekigas! Aŭskultu min! Je Dio, aŭskultu min!.. Re-  
 vivigu, ĉar mi estas tie ĉil Estas via filo, kiu bezonas vin!..

Rozo (*revivigante*)

Kion vi deziras?

MANUELO

Rigardu min!

ROZO

Mi dormis.

IZIDRO

Ŝi jam rekonsciigas.

ALBERTO

Nel Ŝi reviviĝas por lil

MANUELO

Rigardu min, ĉar estas mi, kiu tion ĉi petas de vi!

ROZO

Nenio okazis! Filo, ne alarmigu!... Korpremol Korpre-  
 mo..... pro gajecol

ALBERTO

Izidro, ni lasu ilin ambaŭ solaj. Se la voĉo de sia filo  
 ne reviviĝas ŝin, nenio jam povos tion ĉi faril (*Ili aliras  
 al vendejo*).

SCENO VII.<sup>a</sup>

Rozo

Pardonu min! Mi jam bone fartas! Ŝajnas al mi ke mi  
 ekdormis, sed mi aŭdis cian voĉon, tiun de kiam ĉi estis  
 juneta, kaj mi lulilis cin, kaj lulitante cin, mi ekdormigis  
 anstataŭ ĉil



MANUELO

Kial eĉ reveninte, mi devas penigi vint!

Rozo

Ci ja ne penigis min! Male! Neniam mi estis tiel feliĉa,  
kiel nun! Mi jam povas morti sen bedaŭro!

MANUELO

Mi ne volas, ke vi parolu pri via morto!

Rozo

Ci estas prava dirante tion ĉi! Mi tion diris... parkeret  
Ĉar... la malforteco devigas min tiel paroli! Ne atentu pri  
tio, kion mi diras! Mi estas maljuna!

MANUELO

Ne kredu tion.

Rozo

Nu..., mi ne kredas tion... sed se mi mortus, kaj mi ne  
mortos ĉar ci ne volas tion, mi deziras atentigi cin pri kel-  
kaj aferoj. Memoru pri nia Izidro, kiu neniam forlaris cin!  
Li ne havas filojn! Li ne havas ilin, kiel kompatinda li  
estas! Li ja ne povos morti kiel mil Pagu al li per juneca  
konsolo, kion ci alimaniere ne povis pagi al li. Ne foriru  
el la domo dum mi vivos, ĉar ci ne estos devigata atendi  
longtempe... Kaj pensu... pensu, filo mia, kiam aliajn  
penetraĵojn ci komencos, ke ci povos pentri plejvalorajn  
penetraĵojn sed neniun alian dum cia vivado pentrita, tiel  
ame.

MANUELO (*plorante*)

Ne mortigu min!

Rozo (*per klopodo*)

Ĉu ci diras, mortigu cin? Mi bonfartas! Mi senvalore  
parolis! Mi jam sensensafe parolas! Atentu: Poste mi desi-  
ras eliri apogita sur cia brako kaj promeni tra la tuta vilaĝo!  
Mi deziras iri domon post domo. Mi volas trovi tiujn viri-  
nojn, kiuj diris al mi «kompatinda virino! Kompatinda  
virino!» kiam ci forestis, kaj diri al ili kriante, kriante per  
la koro: «Diru nun al mi kompatinda virino» kiu el ni es-

tas pli tio, vi kiuj ne vivis, aŭ mi, kiu havis du vivojn: la mian, kaj tiun de mia filol.

MANUELO

Sed kion vi havas?

ROZO

Mi havas... Mi havas... Levu min... mi deziras eniri mian ĉambron (*Manuelo levas sin ĉirkaŭprenante sin*). Levu kaj akompanu min! Alvenu, kun ci mi deziras tien iri... Sen ci... mi ne povos... iri... eĉ mortil .. (*Si mortas inter la brakoj de Manuelo*).

MANUELO

Kion vi havas? Sed... kion vi havas? (*Palpante al ŝi*) Hal ŝi estas malvarma!... Ŝi mortis! Ja ŝi mortis! (*Lasante sin sur la seĝo*) Patrino de l'mia vivo!...

(*Manuelo elĵetas sin je la piedoj de sia patrino oni ekaŭdas malproksiman orkeston kaj kriojn pli kaj pli bone aŭdataj.*)

## SCENO VIII.<sup>a</sup>

*La samaj*, IZIDRO, ALBERTO, BAILET, SINJORO INSTRUISTO,  
SINJORO JOHANO kaj vilaĝanoj

IZIDRO (*kurante*)

Kio... kio... kio okazas.

MANUELO

Patrino de l'mia vivo!

ALBERTO (*palpante Rozon*)

Jes! Ŝi mortis... Kompatinda kaj malfeliĉa virinol...

Voĉo (*en la strato*)

Vivu la knaboj!

ĈIUJ

Vivul (*multo da gajaj vilaĝanoj eniras en la vendejon. Antaŭ ili marŝadas la Sinjoro Instruisto kaj junulo kiu alportas laŭran kronon*).

INSTRUISTO (*enirante en la vendejon*)

Vivu nia artistoj!

ĈIUJ

Vivul

ALBERTO (*alkurante al la pordo*)

Ke ili ne eniru! Sinjoro Instruisto, ke ili ne eniru. Ili ne eniru, ĉar la patrino mortis!

INSTRUISTO

Kion ci diras? Ke ŝi mortis? Ke la patrino de la knabo mortis?

ALBERTO

Rigardu ŝin!

INSTRUISTO

Ĉiela Dio!

SINJORO JOHANO

Rapidu! Ke ili ne ludu plu! (*La muzikistoj ne ludas plu*).

INSTRUISTO

Kia malfeliĉo, kompatinda virino! Eĉ ne aŭdi unu momenton la glorigon de sia filo!

ALBERTO

La patrinoj aŭdas eĉ mortintaj!

MANUELO (*plorante apud la piedoj de Rozo*)

Patrinol... Patrinol... Patrinol...

ALBERTO (*vidante Izidro'n kuntiriginta*).

Nu, leviĝul... Kompatinda maljunulo!...

MANUELO (*ĉirkaŭpremante lin*)

Izidrol...

INSTRUISTO (*al vilaganoj*)

Filoj miaj, ni foriru!

ALBERTO (*ekprenante la kronon*)

Foriru, sed lasu la kronon! La krono estas por la patri-  
no! Ŝi ja estas, kiu ĝin gajnis!

(*Alberto metas la kronon antaŭ lu piedoj de la patrino,  
kaj li foriras por plori kaŝante sian vizaĝon*).

## Kurteno

## KOREKTAĴOJ

Paĝo	Linio	Diras	Devas diri
4	16	Trilyes	Triljes
12	19	laudata	laŭdata
14	12	traktoj	trajtoj
15	15	tiujn	tiuj
16	9	desegnante	deŝegnante
17	10	vi	ci
18	24	vi	ci
18	25	cin, ke ci	vin, ke vi
20	16	kiel	kial
20	24	liu	lin
22	6	oui	oni
22	21	tiun, ĉi	tiun ĉi
24	22	kiel	kial
26	13	Siujoro	Sinjoro
37	26	Knabo	Knabo
37	7	ceremoniajn	ceremoniojn
45	6	envemaj	enviemaj
46	22	cambreton	ĉambreton
48	2	logejon	loĝejon
48	19	manganta	manganta
49	5	ĝi	ĉi
49	22	junulojn	junuloj
53	17	prova	prava
78	13	plon	filon
78	22	eumetos	enmetos
79	2	ne scias, kiel	ne scias kiel,
79	23	kve-	kre-
90	4	velaĝo	vilago
101	9	d-vikteco	de kvieteco
110	22	iom prenas	iom post iom prenas
111	20	keoni	ke oni
115	32	tio, estas	tio estas,
121	6	malbono	malbona
121	12	ci	li

